

*Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503
dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana*

*Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas
vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës*

Retpaĝo- Faqja në internet: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet:
albanajesperantistoj@yahoo.com



BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

Nr. 137, junio- qershor 2018

Albanaj proverboj

Shkalla e parë e marrëzisë është të kujtosh se je i mençur.

La unua ŝtupo al stulteco estas kiam vi pensas ke vi estas saĝa

Njeriu ka nevojë për arsim ashtu si bima për ujë. Ashtu sikundër që thahet pema kur është e njomë, po nuk u vadit, edhe njeriu thahet shpirtërisht po nuk u edukua qysh në fëmijëri (vogëli).

Homo bezonas edukiĝon kvazaŭ planto akvon. Tiel kiel freŝa planto sekiĝas se ĝi ne akvumiĝas, same homo sekiĝas spirite se li ne edukiĝas ekde infanaĝo.

Njeriu nuk është i përjetshëm, le të përpiqet të jetë e pavdekshme ajo që do të thotë dhe ajo që do të bëjë.

Homo ne estas eterna, sed li devas klopodi ke estu eterna tio dirota kaj farota de li mem.

Gjërat që numërohen të shenjta, si mendja, njohuria dhe dituria, nga shkak i lakmisë për famë e madhështi, s'mund t'u qëndrojnë disa dëshirave të kota, ndërsa dashuria mund çdo gjë. Dashuria duron varfërinë, nevojën, urinë, mundimin, poshtërimin — çdo gjë. Dashuria e ndryshon skëterën në parajsë. Në qoftë se kërkohet një shenjë e botës shpirtërore në botën lëndore, ajo shenjë është dashuria.

Kozoj konsiderataj sanktaj kiaj menso, scio kaj kono pro avido por famo kaj gloro povas malrezisti al vanaj deziroj, dum amo konkeras ĉion. Ĝi eltenas malriĉecon, bezonon, malsaton, suferon, humilon, ĉion. Amo ŝanĝas inferon al paradizo. Se vi serĉas signon de spirita mondo en materia mondo, tio estas ja amo.

Enhavo

Ni kaj UEA, ILEI,AIS

Tradukoj kaj eldonoj- Tomasz Chmielik kaj Edmond Ludwig
Nia konto- Shaban Hasani
Vizito de esperantistoj- Bardhyl Selimi
AMO- Stefan MacGill
Ĉina kunsido pri esperanto en altlernejoj- Wu Guojing
Edukado.net- Katalin Kovats
Nitobe Simpozio
Grezilono invitas, somera programo- Berto Ŝuman
Libroj por vidigi
Universitato de Liaoling

Niaj leteroj

Augustin Kokazwa- RD Kongo
Ian Fantom- Britio
Elio Nocent- Italio
Bak Giwan- Suda Koreio
Alex Mazzeti- Francio
Trude Sinno- Germanio
Daniela Power- Usono
Andrea Kuenzli- Svisio
Germain Pirlot- Belgio
Julia Szalaine Timar- Hungario
Hori Jasuo - Japanio
Sigmond Julia- Italio
Edmond Ludwig
Maria Aparecida da Silva- Brazilo

Propagando por Esperanto

Juan Diego Diaz- Hispanio
Wang Tiangzi- Wang - Ĉinio
Amir kaj Eldad- novaj digitalizitaj libroj
Muzeo pri Esperanto de Luan Jaupi
Semajno de enigmoj- gazeto

Internacia vojo esperanto- Berto Ŝuman

Informaĵoj

Kongreso de Itala Esperanto Federacio en San Marino
Revuo Kontakto- Homeopatio, Amo
200 jariĝo de Karl Markso
Aranĝoj en Rusio
Maria Majerczak- Pollando

Artikoloj

La angla kaj aliaj lingvoj en sciencaj publikaĵoj- Lu Wunsh Roldhaver
UEA- tempo por reelpensi- Ian Fantom

Vojaĝoj

So Gilsu en Grekio kaj Mediteraneo

Beletraĵoj

Anekdotoj
Eseo- Spiros Sarafian
Rakonto- Apadi Kovacs Bela
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti
Rakonteto tradukita de Marie-Anne jouanique

Ni kaj UEA, ILEI,AIS

- **Tradukoj kaj eldonoj**

tchmj@wp.pl

Kara

vi trovos alkrôcite la kovrilon de la libro de Starova. Kun financa apogo de Edmond ĝ aperos komence de junio. Finfine! Sed laŭ mi valorus iom atendi. Kio novas ĉe vi. Mi fartas diverse, sed elteneble. Kiam mi sendos al vi ekzemplerojn de *La tempo de la kaprinoj* mi aldonos aliajn librojn, kiuj aperis ĉe mi.

Amike

Tomasz Chmielich



Kara,

Mi ne partoprenos fizike la lanĉon de la libro, sed spirite mi partoprenos.

Sciu, ke de tempo al tempo, mi havas la impreson, ke mi sizifas koncerne Esperanton, sed pro la regula anonco de apero de nova libro esperantlingva, mi sukcesas iom optimismi. Same post sukcesa aranĝo, kiun mi partoprenis aŭ kunaranĝis.

Ĉion bonan al vi! Edmond E. Ludwig

PS Jen kelkaj fotoj pri nia lasta staĝo kun Spomenka





- **Nia konto**
Raporto de kasisto

2016	Postim letra UEA		300	
Viti 2016		3000	5800	-2800
	Gjendja 31.12.2016			2600
2017	Bardhyl Selimi	500		
2017	Shaban Hasani	500		
2017	Engjell Gusho	500		
2017	Gjergj Gusho	500		
2017	Martha Otto	1000		
2017	Posta letra UEA		200	
Viti 2017		3000	200	2800
	Gjendja me 10.05.2017			5400
2018	Bardhyl Selimi	500		
2018	Martha Otto	1000		
2018	Shaban Hasani	500		
2018	Engjell Gusho	500		
2018	Gjergj Gusho	500		
Maj 2018	Martha Otto	1000		
	Shuma	4000		8400

LLOGARIA A.E.A në UEA

Dato: 31.03.17 Konto: aela-h

Jen eltiro de via konto kiu montras g`ian staton JE LA DATO 17.03.31.

enskr. t kodo dok/N priskribo eu`roj s

161231 kredita saldo valida je [31.12.2016 = 218.32 k](#)

170313 u ilek-a 437 Albana ILEI-Sekcio>kot. '17 7.00 d

170313 u am17 438 12 am, 8 jam ... Albanio 7.68 d

170313 u jam17 438 12 am, 8 jam ... Albanio 5.12

d

kredita saldo valida je [31.03.2017 = 198.52k EURO](#)

RUBRIKO s(enco): d debeto, k kredito

Dato: 31.03.2018 Konto: aela-h

Jen eltiro de via konto kiu montras g`ian staton JE LA DATO 18.03.31.
enskr. t kodo dok/N priskribo eu`roj s

171231	kredita saldo valida je	31.12.2017 =	198.52 k
180313 u ilek-a 431	Albana ILEI_sekc.>kot.'18		7.00 d
180313 u am18 432	11 am, 8 jam ... Albanio		7.04 d
180313 u jam18 432	11 am, 8 jam ... Albanio		5.12 d

kredita saldo valida je 18.03.31 = 179.36 k EURO

RUBRIKO s(enco): d debeto, k kredito

Shaban Hasani

- **Vizito de esperantistoj**

Aprilofine kaj frumaje vizitis Albanion germana esperantistino Trude Simmo. Ŝi renkontiĝis ankaŭ kun s-ino Martha Heide Otto en Vlora kaj s-ro Bardhyl Selimi en Tirana.



- La 15-an de majo alvenis en Tirana, enkadre de turisma grupo ankaŭ du hungaraj esperantistoj, sinjoroj. **Júlia kaj Sandor Szalainé Tímár**. Mi renkontis ilin en la hotelo Tirana Kapital kaj akompanis ilin morgaŭon dum promenado tra urbo kaj vizito en la Nacia Muzeo. Poste la grupo daŭrigis ekskursojn al la turisma komplekso sur monto Dajt, al Durres kaj aliaj urboj de Albanio.





Renkontiĝo kun Martha

Majfine Martha Heide Otto, nia samiedeanino el urbo de Vlora, vizitis ĉefurbon. Ĉi kaze ni kunkafumis. Ŝi donacis por nia asocio 1000 L.



- Renkontiĝo kun Luan Jaupi



S-ro Luan Jaupi veturis al Tirana kaj kunkafumis kun mi apud mia hejmo Bardhyl Selimi

Estraro en Roterdamo

Se estas aprilo, devas okazi la ĉiujara fizika kunsido de la Estraro de UEA. Tio daŭris tra preskaŭ tridek horoj kaj tri tagoj. La konsisto estis preskaŭ plena – mankis nur nia azia estrarano, LEE Jungkee, momente en Japanio, kiu partoprenis du horojn per Skajpo. Kompense, en Roterdamo

volontule restadis komitatano HUANG Yinbao (Trezoro), kandidato por la Estraro, kies elekto per reta voĉdono estis konfirmita frue en la kunsidado. TEJO sendis observanton – Charlotte Scherping, ILEI same – Mirejo Grosjean; la projektoj de tiuj partneroj ricevis multan atenton.

Neeviteble la financoj staris centre de la atento: la Asocio frontas gravan deficiton en la jaraj spezoj, kaj la Ĝenerala Direktoro, Martin Schaffer, prezentis raportojn kaj analizojn pri la rezultoj de 2017, la evoluoj en 2018 kaj la prognozoj por 2019. Pri tio venos baldaŭ pliaj detaloj. Per intensa kaj konstrua diskutado la estraro pretigis kelkajn signifajn reformproponojn por la konsidero de la Komitato en Lisbono, kiel unua paŝo al resanigo de la financoj. Alia gravega temo estis la evoluigo de la nova retejo de UEA, kiu ne nur montros pli allogan retpaĝan aspekton kaj navigeblon, sed donos multe pli da flekseblo, interalie en la traktado de la asocia administrado. Partoprenis la plimulton de la kunsidado Ana Ribeiro, kiu staĝas en la oficejo dum tri monatoj por pretigi la transiron el la nunaj retejoj kaj datumbazoj al la novaj. La lanĉo okazos en kelkaj etapoj; la unua, ene de mallonga tempo, disponigos al nia membraro novan membrospacon por faciligi kontaktadon kaj kunlaboron.

Por antaŭenigi la informadon pri Esperanto, la rilatojn kun UN kaj Unesko, la instruadon de la lingvo kaj la trejnadon de aktivuloj, la Estraro interkonsentis pri pluraj paŝoj kiuj celas malfermi la Asocion al pli diversnivela konkreta aktivado de niaj membroj, kaj pli konstanta kaj inspira fluo de informoj pri tiaj iniciatoj. La Jaro de la Esperanta Kulturo, inspirita de la rekono de Unesko al tiu “nemateria heredaĵo”, estos bele festata kadre de la 103-a UK en Lisbono. Tie krome unuafoje okazos AMO-seminario (kredeble la 50a), kun temo gravega kaj aktuala: ‘Kiel UEA transformu sin por logi kaj reteni membrojn?’ Prepara artikolo por tio aperos en la junia revuo *Esperanto*.

Sekvos pli formala kaj kompleta resumo pri la kunsido, unuavice por la komitatoj.

Informilo por Interlingvistiko

La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj, 104) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists, 04) haveblas rete:

IpI (Esperante):

Nova numero: http://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/04/IpI_104_final.pdf

Pli fruaj numeroj: <http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/>

IfI (angle):

Nova numero: http://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/04/IfI_04_final.pdf

Pli fruaj numeroj:

<http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro

de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). IpI kaj (IfI) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas informojn por universitatoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj. La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 30a de junio, 2018.

La redakcio (Humphrey Tonkin kaj Ĵenja Amis); ipi@esperantic.org

- **Dum la Lisbona UK okazos Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto, IJK.**

Aliĝis 20 [knaboj](#) (6 ĝis 16 jaraj), sed nur 8 [knabinoj](#) (8 ĝis 16-jaraj), zorgataj de 10 [eksinfanoj](#).

La [IJK-ejo](#) estas samtempe la plej pitoreska [UK-dormejo](#) (plu mendebbla!)

kio ebligas ke gepatroj povas kun siaj infanetoj dormi sed iri tage al UK per rekta buso (vidu bildojn en la PDF).

La nunaj [IJK-prezoj](#) plu validas ĝis la 30a de aprilo.

Multlingveco en Internaciaj Organizoj kaj Internacia Kunlaboro

La Studgrupo pri Lingvoj en Unuiĝintaj Nacioj (alianco de individuoj kaj organizoj, inter ili Universala Esperanto-Asocio) okazigas dutagan simpozion ĉiujare, en kiu esperantistoj kaj la Novjorka Oficejo de UEA ludas aktivan rolon. La Simpozio ja okazos en la konstruaĵo, kie troviĝas la Oficejo de UEA, kaj UEA estas inter la ĉeforganizantoj. En la PDF jen la afiŝo, kiu konigas la ĉi-jaran eventon. Estas arigitaj prestiĝa listo de kunlaborantaj universitatoj kaj esplorcentroj. La ĉefa prelego estos donita de Michele Gazzola, de la universitato Humboldt en Berlino kaj la Universitato de Leipzig.

Inter la esplorteroj de la organiza studgrupo estas la sekvaj:

- Kiel la lingvo-politiko de UN funkcias praktike
- Kiel la homoj en UN uzas lingvojn kaj faras lingvo-elektojn
- Kiel UN komunikas lingve kun homoj ekster la organizo mem.
- Kiajn avantaĝojn havas multlingvismo kompare kun la emo al (angla) unulingvismo.

Post la ĉefprelego la simpozio traktos multajn subtemojn ene de diskutgrupoj kaj prezentado de referaĵoj. Inter la temoj:

- Lingva inkluziviĝo en multlingvaj medioj
- Interpretado kaj tradukado en internaciaj organizoj
- Rapideco de decidofarado kompare al informperdo en unulingvaj kuntekstoj
- Lingvuzo en internacia pac-flego
- Lingvo kaj homaj kaj minoritataj rajtoj
- Multlingvismo en NeRegistaraj Organizoj (NROj).

Almenaŭ du el la prezidontoj de tiuj diskutgrupoj estas esperantistoj; la Oficejo de UEA ludas grandan rolon en la preparoj kaj posteventa laboro; la seminarion finance subtenas kelkaj organizoj, inter ili *Esperantic Studies Foundation*. La detala programo estas legebla en la angla ĉe: <http://www.languageandtheun.org/symposium2018.html>

smg/hrt

- **AMO 47, majo 21-22. Programo por lundo, la 21a de majo:**

Okazos en Góra, pola urbeto 86 km. nordokcidente de Wrocław. Tiu urbo havas aktivan ĝemelan kunlaboron kun Herzberg-am-Harz, la Esperanto-urbo.

Esperanto serve al la artoj, la artoj serve al Esperanto

Enkonduko pri AMO kaj la temo flanke de SMG (15 min)

Laboro en subgrupoj:

Bloko 1:

La artoj serve al Esperanto

1. La nuna kultura sceno en Esperantujo.
2. La rolo de Universalaj Kongresoj en stimulo de la arto j(du fotoj en la PDF)
3. La roloj de kulturaj festivaloj kaj aliaj renkontiĝoj.
4. Perspektivoj kaj defioj por artistoj en Esperantujo.
5. La malfacilaĵoj specife por la teatra arto.
6. La rolo de la parolaj artoj kontraste al neparolaj.

Bloko 2:

Esperanto serve al la artoj

1. La reputacio de Esperanto en artismaj rondoj.
2. Esperanto kiel pontolingvo por literaturo kaj aliaj artoj.
3. Sukcesaj iniciatoj tra la lastaj jaroj.
4. Kulturaj eksteraj rilatoj por esperantistoj.
5. Favoraj kondiĉoj por tia kunlaboro.
6. Subvenciaj ebloj por arta agado en aŭ pere de Esperanto.

Ĉina kunsido pri Esperanto en altlernejoj

En marto 2018 en la urbeto Fengcheng LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) okazigis kunsidon specialan por Esperanto en altlernejoj. Ĝin ĉeestis entute 40 personoj (vidu la foton), i.a. tri estroj el Esperanto-asocioj de du provincoj kaj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Profesoro Liu Zhengkun, prezidanto de la asocio, faris la bonvenan paroladon, kaj sino Jiao Xiyang, ĝenerala sekretario de la asocio, prezidis. S-ro Sun Lianshan, juna entreprenisto, financis tiun ĉi aktivadon.

Por la kunsido LEA invitis edukajn specialistojn el tri universitatoj. Pluraj instruistoj raportis pri siaj kursoj tra la lastaj jaroj. Por instigi kaj gratuli ilin s-ro Wu Guojiang en nomo de s-ro Hori Yasuo donacis al ili la libron *Raportoj el Japanio*. Naskiĝis du rezultoj: Oni konsideras konstrui Espelorcanton de Esperanto-kulturo unue en Orienta Liaoning Universitato, poste en Shenyang Universitato kaj Liaoning Universitato. Post la kunsido estroj de LEA invitive vizitis tiun universitato tiucele.

Oni oficiale konfirmis ke la 10-a Esperanto-kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio, okazos inter la 6-a kaj 8-a de julio 2018 en Fencheng, la plej granda lima urbo de Ĉinio. En- kaj eksterlandaj esperantistoj estas bonvenaj.

Raportis Wu Guojiang, vic-prezidanto de LEA, Ĉinio



- **edukado.net**

Estimataj membroj de edukado.net

Ni informas vin pri tio, ke ni faris la jure devigajn paŝojn, kiujn la novaj privatecajn reguloj de la Eŭropa Unio preskribis.

Laŭ tio ni pretigis detalan priskribon pri tio, laŭ kiuj manieroj nia retejo kaj ties diversaj partoj traktas viajn informojn. Ni indikas la metodojn kaj paŝojn laŭ kiuj vi povas kontroli tiujn aferojn kaj pli sekurigi viajn datumojn. En la priskribo estas indikitaj ankaŭ maniero kaj loko, kie vi povas nuligi vian membrecon kaj forlasi la paĝaron, se vi tion volas.

Ni petas vin viziti la paĝon kaj atenteme legi la dokumenton: <https://edukado.net/prie/privateco>

Viajn konton kaj datumojn plej simple vi povas trovi, kontroli kaj modifi en la sekcio MIA ANGULO kaj en ties ligoj apud la fotokadro:

<https://edukado.net/mia>

Por vidi tiun parton vi devas esti ensalutinta: <https://edukado.net/ensaluti>

Se vi forgesis la ensalutnomon, vi povas peti aŭtomatan sendadon de nova pasvorto ĉe la

ensalutpaĝo per klako al la frazo: "Mi forgesis mian pasvorton."

La poste ricevitan, malfacile memoreblan pasvorton, vi nepre ŝanĝu je memorebla pasvorto. Tion vi povas fari apud la fotokadro ĉe <https://edukado.net/mia>.

Ni esperas, ke vi daŭre fidus nin kaj la paĝaron kaj vi restos membro de www.edukado.net

Kun saluto: Katalin Kovats, redaktoro

AMO atingas jam sian kvindekon!

Tiun rimarkindan atingon ĝi plenumis en nur iom pli ol 4 jaroj. Plia unika atingo, AMO unuafoje aperas en la Universala Kongreso – almenaŭ en nia kompreno de la signifo de AMO. Grava kaj urĝa temo trudas sin al la bezono de vasta debato – kiel UEA kreskigu sian membronombron kaj limigu la perdon de membroj. Tiu temo tro specifas por AMO-seminario ie ajn aliloke en la mondo, do alvenis la tempo por la jubilea 50a AMO-seminario, kiu okazos en 2 sinsekvaj tagoj dum la UK en Lisbono, kun eble enkonduka sesio en tria tago (kredeble la dimanĉo). Tiu seminario estos alirebla de ajna kongresano, sed samtempe lokos sin inter la seminarioj de la komitato, kiuj devas fronti la vivgravan demandon – manke de aliaj signifaj enspezfontoj – kiel UEA pli forte kreskigu la membronombron por tiel resanigi la financon pozicion de la Asocio.

Jen kiel ni atingos la AMO-kvindekon:

AMO 50 en UK:

Kiel (re)altigi la membronombron de UEA. Aperos en la junia numero de la revuo *Esperanto* enkonduka artikolo, kiu aliras la demandon per sepo da temoj, kiuj iĝos la diskuttemoj por grupoj en la lisbona seminario. Venu kaj kontribuu – aŭ pli grave, proponi vian propran laborforton al la urĝega bezono. La seminarioj okazos ĉu lunde-marde aŭ ĵaŭde-venrede, depende de la postuloj de la formulado de la UK-programo. Jen la sep subtemoj:

1. Ĉefaj mesaĝoj, celgrupoj, okazoj
2. Rolo de la junuloj kaj TEJO en membro-varbado
3. Rolo de la landa kaj loka agado
4. Rolo de revuoj kaj komunikiloj
5. Rolo de seminarioj kaj gvidiloj
6. Rekonceptado de la servoj de UEA
7. Alternativoj al la dependeco je membrokotizoj

AMO 49 en Madrido:

En la semajno tuj antaŭ la UK, okazos la 51a Kongreso de ILEI (jam kun preskaŭ 200 aliĝoj), samtempe kaj samloke kun la 77a Hispana Kongreso. Ambaŭ kongresoj jam gastigis AMO-seminaron. La traktotaj temoj estas eksteraj rilatoj kaj la transdono de kulturo. Inter la gvidantoj: Robert Kaminski (PL) pri ZEO-j, Marc Cuffez (BE) pri la Unio de Internaciaj Asocioj (UIA), Mirejo Grosjean, Stefan MacGill kaj Sara Spanò.

AMO 48 en NASK:

Tiu nordamerika somera lernejo jam plujare gastigis AMO-seminarion, ĝenerale pri son- kaj film-registrado kaj uzado. Seminario okazos denove en 2018 en Raleigh, la ĉefurbo de la Norda Karolino inter la 4a kaj la 11a de julio. Informoj: <http://nask.esperanto-usa.org/venonta/>

AMO 47 en Pollando:

La seminario okazos ene de semajno en Góra, urbeto en la okcidenta Pollando, kies programo estis jam prezentita en EKO 12 kiu disiris en la 30a de aprilo. La temo estas ‘Esperanto serve al la artoj -- la artoj serve al Esperanto.’ Ni raportos la rezultojn, kiuj utilos por pli vasta publiko, ĉar tiu temo revenos kadre de la populara aranĝo ‘Kleriga Lundo’ en la UK en Lisbono, kadre de la Jaro de Kulturo, kiun UEA kunfestas.

Nitobe-simpozio tuj post UK en Lisbono

La 4-an kaj 5-an de aŭgusto en Lisbono okazos nova Nitobe-simpozio kun la temo “instruado kaj esplorado pri Esperanto en soci/inter-lingvistiko kaj en sociaj sciencoj”. La simpozio estas aŭspiciota de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi estas subvenciata de *Esperantic Studies Foundation* (ESF). Danke al tio ne estas kotizo. ESF ankaŭ prizorgos kafo-pauzojn kaj komunan manĝon. La simpozio okazas ĉe la Universitato de Lisbono en la konstruaĵo Reitoria da Universidade de Lisboa, Alameda da Universidade, PT-1649-004 Lisbono. Pli da informoj en la alkroĉaĵo.

Greziljono: La somera programo

- 2018-julio-09/27 2-a Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj (7+5+6) kun Perlo Miela, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja, Mikaelo Bronŝtejn
 - 2018-julio-09/16 4-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso
 - 2018-julio-15/21 Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer
 - 2018-julio-16/21 Speciala semajno kun kursoj de Esperanto
 - 2018-julio-21/27 30-a Internacia E-Konferenco de OSIEK « Esperanto en Artoj »
 - 2018-aŭgusto-11/19 8-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj
-
- **Libroj donas al ni eblojn vidigi nin**

Okaze de la Internacia Tago de la Libro, la Distrikta Biblioteko “Dinicu Golescu” Arĝeŝ kaj la Teknologia Liceo “Dacia” en la urbo Piteŝti, organizis sesion “Publika Legado” en la rumana kaj en Esperanto, fine de aprilo. Invititoj estis s-ro Marian Vochin el Bukureŝto, historiisto de la

rumana esperantista movado, kaj s-ro Cristian Sabaŭ, ĵurnalisto kaj E-tradukisto en la urbo Pitești. Ĉeestis ankaŭ la verkistinoj Denisa Popescu kaj Simona Liutiev.

Tri tagojn poste, la rumana televido Antena 1 Pitești invitis s-ron Marian Vochin partopreni en televida disaŭdigo “Draga Personaj Principal” (kara ĉefa persono), kie li estis intervjuita de s-ino Denisa Popescu, televida ĵurnalistino kaj verkistino, pri la lingvo Esperanto, L.L.Zamenhof kaj la esperantista movado en Rumanio. La rumanlingvan intervjuon eblas rigardi ĉi tie:

https://m.facebook.com/story.php?story_fbid=990641411100035&id=100004625562599

- Je la 10-a horo, dimanĉe la 29-an de aprilo 2018 okazis la malferma ceremonio de la Esplora Centro pri Eduko kaj Kulturo de Esperanto en **Orienta Liaoning Universitato**. Ĝi estas la unua Esperanto-Centro de Ĉinio. Tion kune atestis pli ol 30 invititaj ĉeestintoj el Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), la estraro de LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) kaj aliaj sociaj neesperantaj grupoj, i.a. reprezentantoj el studentoj, kiuj estas studentaj Esperanton.

Orienta Liaoning Universitato, situanta en la urbo Dandong, Liaoning, estas konstruita laŭ la Rivero Yalu, kiu ligas Ĉinion al la Norda Koreio. Ĝis la ĉi-jaro ĝi ĝuste havas historion de 70 jaroj. De multaj jaroj gvidantoj de la universitato ĉiam priatentas kaj subtenas Esperanton. Inter 2001 kaj 2003 ĝi enkondukis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kun 4 studpoentoj. Tiu studpoento tiam estis la plej alta en tiuj universitatoj en la mondo, kiuj havis Esperanto-objektojn. En 2010 ĝi gastigis la 6-an Esperanto-Kongreson de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio (EKNI). Ĉi-foje Prof. D-ro Guo Yongĝin, prezidanto de la universitato kaj aliaj estraranoj, refoje donis la plej grandan subtenon al la centro per bonaj kondiĉoj, ekz. altnivela akcepto de gastoj, la kunvenejo por la ceremonio, oficejo por la centro ktp.

Vic-prof. D-ro Hu Guohong, kiu okupiĝas pri eduko kaj esploro de la angla lingvo, gvidos la centron. “Akcelado” estas fizika kvanto. La “Akcelado” eduka modelo de angla lingvo kreita de li estas alte taksita. Tiucele la universitato fondis por li Instituton de Akceladaj Fremdlandaj Lingvoj. En la ceremonio li esprimis, ke li provos tiun modelon al eduko de Esperanto krom tio ke li kunlaboros kun vastaj esperantistoj por ke ĝi konstruiĝu hejmo de Esperantistoj, internacia interŝanĝa esplora centro pri Esperanto kaj transformiĝa platformo de atingoj en Esperanto-esploro.

Post la ceremonio sekvis la unua seminario. La paroladojn faris la ĈEL-vicprezidanto Wang Ruixiang, la ĈEL-vicĝenerala sekretario Jiang Limin, la LEA-vicprezidantoj Wu Guojiang kaj Liu Enwei, la eksa vicprezidanto de Liaoning-a Universitato Prof. Zhang Wei, la ĝenerala sekretario de Liaoning Instrua kaj Esplora Asocio de Fremdlandaj lingvoj Prof. Zhang Zhiming, la prezidantino de Instituto de Fremdlandaj Lingvoj de Shenyang-a Universitato Prof. Wang Yan kaj la veterana tradukisto Song Yunsheng en esploraj temoj, internacia kunlaboro kaj kulturado de talentuloj. Prof. Liu Zhengkun, prezidanto de LEA, faris resumon. Li diris, ke ekde 2001 jam kvin universitatoj funkciigis la Esperanto-kursojn en la provinco, i.a. la asocia Bazo de Esperanto-instruado en Shenyang Konservatorio de Muziko. Por subteni la centron la asocio decidis fondi Esploran Bazon de Esperanto en la Orienta Liaoning Universitato. Li emfazis ke la centro altiras plimultajn junulojn al Esperanto, kaj konstruas bonkvalitan platformon por esploro

pri eduko kaj kulturo de Esperanto. Vic-profesorino Xu Jun kaj Vicprofesorino Wang Xiaoyi el Liaoning-a Universitato, docento Pan Chengbo el Shenyang-a Universitato kaj la juna entreprenisto Sun Lianshan ĉeestis la seminarion ankaŭ.

Ne mankas internaciaj atentoj. Gratulojn sendis Prof. D-ro Mark Fettes, s-ro Lee Jungkee kaj s-ro Huang Yinbao el la estraro de UEA, la eksa UEA-prezidanto Renato Corsetti, la ILEI prezidantino s-ino Mireille Grosjean, la danlanda komitatanino de UEA s-ino Ileana Schrøder, la Senegala Esperanto-Asocio prezidanto s-ro Assane Faye, la Iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) s-ro Bert Boon, la komitatano de la franca regiona federacio Espéranto-Limousin D-ro Christian Lavarenne, s-ro Germain Pirlot el Belgio, s-ro Prof. Jozef Willem Haazen el Rusio, s-ro Bardhyl Selimi el Albanio, Alessandra Madella (shasha) el Italio kaj tiel plu. i.a. D-ro Jorge Antonio Leoni de León, direktoro de Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de Universitato de Kostariko, esprimis volon kunlabori kun la centro. S-ro Luigia Oberrauch Madella el Italio esperis, ke kontaktoj kaj rilatoj inter Orienta Liaoning Universitato kaj Universitato de Parma povos en ne malproksima estonto iĝi realeco. S-ro Lee Jungkee ĉiam priatentas preparon de la centro kaj kelkafoje donis bonajn proponojn. Krome ĈEL, LEA kaj s-ro Hori Yasuo, eksa prezidanto de KAEM, donacis al la centro librojn. Ĉiuj gratuloj estis voĉlegitaj.

Post la seminario D-ro Hu Guohong, invitis 13 ĉeestintojn kiel la unuajn esploristojn de la centro kaj disdonis al ili atestilojn. Samtempe li esperas ke plimultaj en-kaj ekster-landaj esperantistoj partoprenos en la centro. S-ino Jiao Xiyang, ĝenerala sekretariino de LEA, prezidis la tutajn okazojn. Ĉiu ĉeestinto spertis kaj sentis entuziasman servon de volontulinoj el studentoj ankaŭ, vidu la fotojn.

Wu Guojiang

Vic-prezidanto de LEA, Ĉinio

Adreso: Fushun Xinfu-Qu, Qianjin-Lu, 45-Hao, 113015 Fushun, Liaoning, Ĉinio.

Retadreso: ghemelurboj@sina.cn amikeco999@21cn.com

• **SOMERA PROGRAMO 2018**

- 2018-julio-09/27 → 2-a Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj (**7+5+6**) kun *Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja, Mikaelo Bronŝtejn*
- 2018-julio-09/16 → 4-a [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso
- 2018-julio-15/21 → [Semajno de ĉiĉeronado](#) en la regiono Anĵuo kun *Catherine Kremer*
- 2018-julio-16/21 → [Speciala semajno](#) kun kursoj de Esperanto
- 2018-julio-21/27 → 30-a [Internacia E-Konferenco](#) de OSIEK « Esperanto en Artoj »

- 2018-aŭgusto-11/19 → 8-a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj

Aliĝu 2 monatojn antaŭe por ĝui redukton

Bonvenon !

Esperanto-Kulturdomo Greziljono,
F-49150 Baugé en Anjou

Niaj leteroj

- **Augustin KAKOZWA**

Saluton Karaj,

Mi nomiĝas Augustin Kakozwa, kongolando de la Respubliko Demokrata Kongo, loĝanto en Goma urbo kie mi instruas esperanton al multaj infanaj georfoj kiuj nia esperanta asocio enkadrigas.

Mi volas ekinterŝanĝi kun vi kaj krei lignaj amikecoj.

Mi antaŭ dankas vin.



- **Ian Fantom** <ian@keptalking.info>

Kara ,

Keep Talking: mardon 3an de aprilo 2018: British Council, Mensoregado kaj Rusio

Tiun ĉi cirkulaĵon mi sendas ankaŭ en Esperanto, kvankam la kunvenoj estas en la angla, kaj verŝajne ekster atingo de la plimulto de Esperantistoj, pro la granda danĝero al la monda paco en la nuna momento. Dum jardeko mi diris, ke kiam la nunaj militoj estos for, Esperanto denove havos sencon al la mondo. La eksigo de British Council el Rusio eble markas la turnopunkton ankaŭ por Esperanto.

Ni revenis al mardoj, kaj la hinda restoracio Chutney's (rekte kontraŭ la iama kunvenejo de La Londona Esperanto-Klubo), kiu estas ĵus redekoraciita. Bela loko por manĝi antaŭ la kunveno! Lastatempaj eventoj en aktualaj aferoj estis harhirtigaj. Agresega parolado pri la rusoj ne nur

alportis nin al la sojlo de milito; ĝi alportis nin al malkaŝa agnosko fare de la rusoj, ke ni jam estas en milito. La peragenta milito en Sirio ne plu estas peragenta milito, sed senpera militado inter Rusio kaj Usono - kaj implicite ankaŭ Britio. Aferoj kiun konstatis homoj en la veromovado dum iom da tempo nun rapide fariĝas komuna scio. La eksigo de British Council el Rusio provizas oportunan momenton por ekzameni ĝuste kio estas la rolo de British Council en tiu ĉi milito de vortoj.

La Afero Skripal estis la militpreteksto kiu malsukcesis. Tio ne nur ŝanĝis la internacian scenon, sed ĝi sendube markas turnopunkton en la kredindeco de la brita registaro. Sed kial unu el la plej altaj prioritatoj de la rusoj reage al tio estus eksigi British Council el Rusio? Ĉu tio estis nura reciproka gesto, aŭ ĉu estis en tio io pli profunda? Ĉu British Council estas tio kio ĝi ŝajnas esti, aŭ ĉu ĝi estas fronto por io alia? Mi komencis pridemandi tion ĉirkaŭ 1970, kaj nun povas kunmeti la informojn amasigitajn dum la jaroj, kiuj kondukis min al la opinio, ke British Council ludas gravan rolon en la novkonservativa plano por la subfoso de aliaj nacioj kaj kulturoj, kaj ke ĝia ĉefa celo estas mensoregado. Kiam la rusoj diras, ke British Council estas plena da MI6-spionoj, tio estas nur duono de la rakonto. Tamen la meza dungito restas kontenta en la nescio pri iu ajn pli profunda signifo ol nura lingvoinstruo.



- **Elio Nocent**

Dankon pro Bulteno kaj mi recipokas!



- **박기완 BAK Giwan**

Koran dankon, s-ro Selimi,

Mi bone ricevis la bultenon, tre enhavoriĉan.

Sincere via,

BAK Giwan

Alex Mazzetti

Saluton al ĉiuj,
mi plusendasal vi la anoncon de Francaj samideanoj.

- Alex Mazzetti
Saluton Alex,

Ĉu vi povas ankaŭ disvastigi nian eventon?

Jen la ligilo kaj la bildo.

<https://krokodila2018.wordpress.com/>



[Krokodila renkontiĝo 2018 – Esperantista renkontiĝo en ...](#)

Krokodila Renkontiĝo okazos de la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2018 en la pirinea vilaĝo Arrout (suda Francio / Okcitanio). Krokodila Renkontiĝo (aŭ mallonge KR) estas esperanto-aranĝo, kiu okazas foje printempe kiam la 1-a de majo falas lundon, mardon, ĵaŭdon aŭ vendredon tiel ebligante longan 3-tagan aŭ 4-tagan semajnofinon.

krokodila2018.wordpress.com

Ĝis! La teamo de EKC Tuluzo

- **Trude Sinno** <t.sinno@gmx.de>

Karaj geamikoj,
mi salutas vin el Germanio, Post kelkaj semajnoj mi vizitos Albanion kun vojaĝgrupo "Marco Polo". Ĝojigus min renkonti E-istojn, se iel eblus. Nia vojaĝplano estas tiel:
24.4., 30.4., 1.5.: tranoktoj en Durres, hotelo "Dolce Vita"
25.4., tranokto en Vlora, hotelo Bologna
26.4. + 27.4. tranokto en Saranda, hotelo Maestral"
28.4., tranokto en Korca, hotelo "Grand Palace"
Eble ja iel funkcios.
Kore,
Trude Sinno

- **Daniela Power**

En Egiptujo mi shparos multe kun tio grupo - se la grupo iras (mi jam spertis du okazojn, kiam oni ne povis trovi sufiche da homoj por grupo kaj nuligis la ekskurson, mi iris sola). Tio prezo de \$500 estas duono, validis nur dum du semajnojn kaj mi hazarde kaptis; ech la prezo de \$1000 estas bona por Egiptujo - antaŭ 20 jaroj ghi estis \$2000. Nun ili havas problemojn (tamen kie ili ne ekzistas?!), kaj ili strebas revenigi la turistojn. Do, mi atendis pli ol 20 jarojn !!!

Albanio ne estas pli kosta lando ol mia (Bulgario), kaj \$2000 por BG estas tro multe por du semajnoj!

La albana grupo havos popoldancadon dum la vesperoj, kaj se mi veturos individue mi ne havos krom se mi trafos hazarde ion okazajhon; sed por mi pli gravas vidi lokojn kaj popolojn, kiujn mi memoros tutan vivon dum por la popoldancistoj gravas pli la dancojn ol lokojn - ni lernis 20 dancojn en la albana veturo kaj neniu memoras nenion, ili estas certe agrablan pasigon de tempon. En nia danc-klubo ni havis instruistojn kiuj instruis nin albanajn dancojn kaj ni chiuŝemajne dancas ilin lau muziko de la komputilo (lastan vesperon 4). Krome, mi shatus cheesti la grandan festivalo in Girocaster iam - jes, tio estus tre alloga kaj valora. Cetere, chu estas transportado al Montenegro? Devas esti.

- **Daniela Power**

Ni ne dancas "modernajn" dancojn, sed popoldancojn, t.e. de vilaghoj; ili ne estas paraj dancoj, sed "horo"/vale - chiuj dancistoj tenas la manojn kaj formas rondon. Chu estas io pli "demokratia" ol "horo/vale"?

Via lando estas eta, tamen tre interesa - multe pli ol Kanado/Usono ekzemple. Iliroj kaj tracoj estas kuzoj, kaj por mi estas tre interese "fosi". Chi vintre mi decidis fari genetikan teston - tiuj nun estas tre popularaj en Usono. Mi elektis National Geographic char ili volas vidi kiel homaro disvastighis komence de Afriko. La rezultoj estas interesaj; ili bone devenis, ke mi estas bulgarino:

Orienta Europo 57%; Malgranda Azio 25%, Italio 10%, Okcidenta Mediteraneo 6%, Proksima Oriento/Persio 2%.

Tio Malgranda Azio estas tre interesa, mi supozas, ke temas pri tracoj. Bedaŭrinde mi havas nur la genetikan averajhon por rumanoj (tio NG metis kiel dua ebleco por mi), mi estas tre scivolema pri la albana - veshajne la Orient-europa frakcio estus tre malgranda (slavoj kaj antikvaj bulgaroj)?! Ni chiam pensis, ke la traca sango estas plej parte che ni...

Cetere, plimulto de la homoj en Usono elektis fari la teston pere de komercaj kompanioj, kiuj povus vendi la rezultojn al aliaj interesota. Ankau multe da homoj estis shokitaj; shajne, ke multaj familioj dissolvighis...

Unu naziisto, apoganto de la nova prezidanto, shokighis, ke li estas 10% afrikano!!!

Tre interese! Jes, la pelazgoj estas la antikva popolo de la Balkanoj kaj la lingvo estas la plej malnova.

De ili devenis albana kaj traca. Mi ne sciis, ke sanskrita devenas de ghi. Mi vizitis Hinduojn en 2011 kaj legis multe tiam, sed forgeisi; eble mi ne atentis pri la deveno de sanskrita, au^ la au^toroj ne sciis. Rumanaj dacoj estas tracoj, kiuj loĝhis trans Danubo; en Bulgario ili havis nomon "geti" - mi vizitis ilian chefurbon kaj la tombojn en Norda Bulgario. La slacoj venis el nordo, ankau^ "pra-bulgaroj" - la unuaj estis simple triboj, sed la lastaj havis grandan shtaton sur la teroj de nunaj Ukraino kaj Ruslando - de tie mi akiris miajn 57%. De tio "Granda/ Great" Bulgario post la morto de la granda kano Kubrat/Kurt la filoj elmigris:

Asparuh - al Danubo kaj formis grandan shtato che la fino de la rivero, norde kaj sude, se kie venas nian lando:

Alcek - al nuna Norda Italio; alia frato - al nuna Makedonio, kvara - al Panonio/Hungario. Bat Bajan restis en la iama Granda Bulgario en nuna Ukraino, sed liaj homoj elmigris norden, che Volga kaj fondis "Volga Bulgario".

Nia estighis kristana, volgaj bulgaroj akceptis islamon (ili komercis kun la araboj kaj estis tute nature, dum la okcidenta EU estis sovajha loko).

Mi legis pri Dardanio - la kontakta regiono inter iliroj kaj tracoj; tre interese.

Dankon pri la amuza matematiko - mi bezonos tempon tralegi kaj pripensi. Che ni estis tre populara la rusa libro "La fizikistoj shercas", fare de la fizikistoj el Moskva Universitato. La 1an de aprilo chiu jare che nia fakultato okazis amuziga vespero, kun shercoj kaj eksperimentoj.

- **Andreas Kuenzli** <kuenzli@osteuropa.ch>

Komento pri

<http://www.liberafolio.org/2018/04/06/la-srumpado-de-uea-momente-haltis/>

Kial la ĝenerala direktoro ne havas tempon? Kion li ankoraŭ faras krom esti ĝenerala direktoro de UEA? Ĉu tio estas por li kroma (neglektnda) posteno apud multaj aliaj (nekonataj) okupoj, en Meksiko kaj diablo scias ankoraŭ kie? Persone, mi tute ne fidus al tiu ĝenerala direktoro kaj neniam pagus kotizon, tiom longe ke tia ulo estas ĝenerala direktoro. Same kiel mi tute ne plu fidus al la prezidanto mem, kiu lau mi prisilentas diversajn aferojn.

Kongrue kun Penk mi ankau opinias, ke en UEA oni provas falsi kaj manipuli faktojn (per statistikaj trukoj) por eviti prezenti la veran veron pri la situacio de la asocio, kiu estas verŝajne eĉ pli malbona, ol oni klopodas kredigi. La daŭra panika diskuto pri kelkaj membroj pli au malpli estas ridinda, sensenca kaj pura tempoperdo. Oni ja klare vidas, ke novaj membroj mankas. Mi nur demandas min kial UEA tamen sukcesas kolekti tiom multajn membrojn. La situacio povos draste malbonighi post 10-20 da jaroj, kiam la plej maljunaj membroj forpasis kaj okazos nova erazio de la membronombro, kiel ghi malrapide okazis ghis nun.

La kalkulo de Corsetti, kiun mi opinias sufiche kredinda, donis impreson pri la situacio. Ĉu en UEA entute iu serioze konsideras tiun analizon, au ĉu ghi estas sabotita kaj bojkotita de liaj malamikoj (oni gajnis la impreson, ke la malnovaj konfliktoj inter Corsetti, Fettes, Buller kaj

Kasini, kiuj ne povas elteni unu la aliajn revenis)?

aK, apr. 18

- **Andreas Kuenzli** <kuenzli@osteuropa.ch>

Komento pri:

"Pli ol miliono da homoj lernas Esperanton per Duolingo"

(<http://www.liberafolio.org/2018/04/06/la-srumpado-de-uea-momente-haltis/>)

Tio estas la plej groteska stultajho kaj blufu, kiun mi entute legis dum la pasintaj 40 jaroj rilate al Esperanto. Oni povas imagi kiel inteligenta estas la persono, kiu asertas tiajn fanfaronajhojn.

Cetere, kial UEA ghis nun ne venis al la ideo krei iun apartan kategorion por tiuj lernantoj, por ke oni povu diri, ke UEA havas unu milionon da membroj? Evidente oni ne kuraghas fari tion.

Oni povas nur averti UEAn, ke ghi honeste kaj reale montros la membrastaton je la unua de majo, sen ajna provo de manipulado, kashado au ruza misinterpretado de ciferoj, la samo validas rilate la prezentadon de la financoj. En UEA, al kies gvidantaro mi nuntempe tute ne fidis (fakte neniam fidis), devus okazi pli da sendependa ekstera kontrolo, por eviti, ke iu ajn (malkompetenta) funkciulo, kiu staras sub la premo de ies ajn influo au atendo, povas diri, aserti kaj skribi ion ajn.

La ggeneralala direktoro devus dokumenti ciujn siajn profesiajn kaj privatajn aktivecojn, inkluzive kiom da mono li enspezas el aliaj fontoj, por krei kompletan transparentecon de la aferoj antau la membraro. Krom tio, la rilatoj kaj la asocia korespondado inter Fettes kaj Schäffer devas esti publike dokumentitaj por krei plenan klarecon.

Ech se UEA havos 4600 membrojn: Kiuj tiuj membroj estas kaj kion ili reale faras por kaj per Esperanto? Se oni ne povas klarigi tion, ajna statistiko pri membroj perdas sian sencon.

Esperanto bezonus aktivajn kreantojn kaj verkantojn, ne papertigrojn kaj pasivajn membrojn.

Kompreneble, la delegita reto kaj la Jarlibro jam de longe perdis sian sencon.

La revuo "Esperanto" estas tiel senlime teda, tiel ke oni devas paroli pri arogo rilate al la abonantoj, kiuj devas legi tiun fatrason.

Mi ne povas vidi reagojn al la komitatataj komentoj de Kasini, kvankam ili estis tute utilaj kaj konsiderindaj. La samo validas rilate la analizon de la grupo Korseti.

aK, apr. 18

UEA - Kien nun?

En Zamenhofa Tago pasintjare mi sendis al ĉiuj membroj de la Komitato de Universala

Esperanto-Asocio analizon de la problemoj de la asocio sub titolo 'UEA: Tempo por Reelpensi'.

Mi ricevis neniun reason, eĉ ne de la Komitatano por mia propra landa asocio. Tio entute

kongruas kun la impresita ricevita, ke tiuj kiuj kaptis la potencon en UEA ne konsideras sin

reprezentantoj de la membraro de la asocio, sed aŭtokrata gvidantaro, kiu kelkfoje devas suferi la

malfacilajn membrojn. En mia artikolo mi demonstris la cenzuradon ankaŭ en La Libera Folio,

kiu ŝajnas estas je la servo de la aŭtokratoj. “Nenio pri libera ĵurnalismo”, iu skribis al mi, rilate al La Libera Folio. Fakte, estas nuntempe nenio pri libera ĵurnalismo en la tradiciaj amaskomunikiloj almenaŭ en mia lando, kiel ĵus demonstris la Afero Skripal.

La incidento kiu incitis min nun distribui tiun artikolon pli vaste estis plua cenzuro fare de La Libera Folio, kiam mi komentis pri la artikolo ‘La ŝrumpado de UEA momente haltis’ (<http://www.liberafolio.org/2018/04/06/la-srumpado-de-uea-momente-haltis/>). Mia komento rilatis al la grafikaĵo de individuaj membroj de UEA 1979–2018, per kiu eblas vidi la pinton en 2001 kaj la postan longdaŭran malkreskon. Mi skribis: “Do la trajto subite ŝanĝiĝis en 1992, kaj la ĝenerala tendenco, kun kelkaj perturboj, estis rekta linio malsupren. En Esperanto-Asocio de Britio la trajto subite ŝanĝiĝis en 1992 kaj dum jardeko la falo strikte sekvis rektan linion. Ne kulpas la kolapso de komunismo, ĉar Britio neniam havis komunismon. Tamen mi dum jardeko estas konstante silentigata kiam mi provas atentigi pri tio.” Tiu komento estis forviŝita nur kelkajn minutojn pli poste.

Mian artikolon ‘UEA: Tempo por Reelpensi’ mi denove sendis al la membroj de la Komitato unu semajnon poste, kiam mi konstatis fuŝon en la lingvoelekto de la unua provo. Sed ĝis nun mankas ajna respondo. Tamen ŝajnas, ke ĝi eble havis ian efikon ene de la Komitato. Aperis en La Libera Folio artikolo ‘Komitatano postulas demision de la estraro’ (<http://www.liberafolio.org/2017/12/20/komitatano-postulas-demision-de-la-estraro/>), kiu komenciĝis per: “Reage al la listo de kandidatoj por novaj estraraj postenoj, komitatano Edvige Tantin Ackermann postulis demision de la tuta estraro. Ŝia propono ĝis nun ne ricevis subtenon, kaj la balotado pri la kandidatoj komenciĝos la 22-an de decembro.” Mi aldonis komenton: “La Estraro ne bezonas plimultan voĉdonon en la Komitato por demisii. Cetere, estas laŭ mi etika problemo – kaj eventuale eĉ jura problemo – rilate al la decido de la Estraro enoficigi sian propran Ĝeneralan Sekretarion kiel Ĝeneralan Direktoron de UEA. Se temus pri mia landa asocio tio estus kontraŭleĝa.” Ankaŭ tiun komenton rapide forviŝis la redaktoro de La Libera Folio.

Mi eble aldonu ĉi tie, ke miaj konstatoj pri cenzurado entute kongruas kun la konstatoj de George Orwell (http://orwell.ru/library/novels/Animal_Farm/english/efp_go) kaj John Pilger (<https://www.nodo50.org/esperanto/artik84.htm>), kaj Udo Ulfkotte (<http://sezonoj.ru/2017/10/fantom/>). Mi nur demonstras kiel ĝuste la sama afero validas ankaŭ por Esperanto. Poste mi eltrovis, ke komento mia sub artikolo en The Guardian estis forviŝita de la moderiganto. (<https://www.theguardian.com/science/2017/dec/06/saluton-the-surprise-return-of-esperanto#comment-109364904>). Eĉ iuj verkistoj por The Guardian havis similajn spertojn, kaj finfine fondis novan retgazeton Off-Guardian (<https://off-guardian.org/>), por kontraŭi tiun cenzuradon. Ili raportas ne nur pri forcenzuritaj komentoj, sed ankaŭ pri novaĵoj kiujn neniuj en la tradiciaj amaskomunikiloj volas malkaŝi. Lastatempe ili spektakle malkaŝis aferojn rilate al la Afero Skripal.

La velko de UEA ŝajne ekis en 1974, kiam Ivo Lapenna plendis pri la malmunto de la servoj, kaj kelkajn jarojn poste ekis la malkresko en la membraro. Samtempe okazis io simila en mia landa asocio, kiel ankaŭ denove post la fino de la Malvarma Milito. Nur kiam okazis al mi io simila al

tio kio okazis al Ivo Lapenna mi vere komencis kompreni Lapenna. Estis enplektitaj iuj el la samaj homoj. La Prezidanto de UEA en 1995 publike pardonpetis postmorte al Lapenna pro la mensogoj kaj kalumnioj kontraŭ lin en tiu periodo. Tio tuj levis en mia menso la demandon, ĝuste kiuj estis tiuj mensogoj kaj kalumnioj, kaj kiuj faris ilin. Poste evidentiĝis, ke li ne pardonpetis en la nomo de UEA, kiel li diris, ĉar la Estraro de UEA nenion sciis pri tio antaŭ ol li faris la anoncon. Povas esti nur, ke li pardonpetis en la nomo de la koterio kiu kulpis, kaj kiu post la demisio de Ivo Lapenna mem transprenis la potencon en UEA. Mi nun atendas, ke li pardonpetu al mi – sed ne postmorte – pro la mensogoj kaj kalumnioj lanĉitaj kontraŭ min en 2006 kaj poste.

Ja estas tempo por reelpensi. La kongresa temo en la Universala Kongreso en Lisbono ĉi-jare estos ‘Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?’ Iu ĵus skribis al mi: “La kongresa temo estas io por retorikaj paroladoj. Neniu volas tuŝi la verajn problemojn.” Kio do estas la veraj problemoj? La veraj spertuloj pri tiu temo, tiuj kiuj komprenas la internan ideon pli bone ol la Esperantistoj mem, estas British Council, kiu rigardas Esperanton kiel rivalon. Ĉu ili reprezentigos en la UK? Laŭ mi tio estas tre verŝajne, sed nur kaŝe. Konstatu, kiom el tiuj grandaj oratoroj estas profesoroj pri la angla lingvo aŭ simile. De kie venas tiu stranga Raŭmismo, kies kvazaŭa devizo ŝajnas esti ‘Ni ne bezonas la movadon’. Kial British Council estis elĵetita el Rusio? Almenaŭ la rusoj opinias, ke British Council – aŭ almenaŭ la spionoj ene de British Council – subfosas la kulturojn kaj lingvojn de Rusio favore al anglalingva hegemonio. Kion vi opinias?
Kore salutas Ian

- **Andreas Kuenzli** <kuenzli@osteuropa.ch>

Didi Weidmann sendis al mi jenan komenton kun instruo:

Kara Andi

Bedaŭrinde (?) vi jam delonge perdis la kontakton kun la reala Esperanto-movado, tial vi ankaŭ entute nenion scias pri tio, kio okazas nuntempe ...

En Duolingo aktuale funkcias du Esperanto-kursoj, unu en la angla lingvo, kiun partoprenas 1'290'000 personoj kaj alia en la hispana, kiun nuntempe partoprenas 334'000 personoj, so sume temas pri 1'624'000 Esperanto-lernantoj sur tiu platformo. Tute ne temas pri blufado, sed pri kontrolebla fakto.

Salutojn Didi

- **Andreas Kuenzli** <kuenzli@osteuropa.ch>

Iu ricevinto komentis:

Kiom altaj estas la kvotoj de cesigo kaj interrompado de tiu(j) kurso(j)? Kiom da homoj vere

utiligas ghin? Sed pri tio Didi evidente ne interesighas.

Li estas kiel rusa turisto, kiu nur interesighas pri svisaj salajroj, sed pri elspezoj de la vivado en Svislando tute ne.

En la kazo de normalaj lingvokursoj maksimume 10% finas ghin.

Krom tio, necesas konsideri, ke tiu kurso estas disvastigata kune kun la angla.

Cetere, kie fizike aperas tiuj novaj e-istoj? Oni legis pri kelkaj homoj, kiuj renkontighas kadre de tiu grupo en Usono.

Chu tiuj lernintoj vere sciapovas Eon kaj chu ili faras pli ol nur kafoklachi?

Do, tiuj ciferoj estas pura iluzio.

Cu en tiu Duolingvo-kurso estas indiko pri UEA kaj alvoko al membrigho?

Sed ajna diskuto kun tiuj Eo-idiotoj havas nul sencon. Ankaŭ doni ajnan konsilon al ili estas senutila afero. Ilia nivelo estas tiu de la diskutforumoj en Libera Folio, komitato de UEA, Ondo kaj iuj aliaj privataj forumoj. Do, komplete senespera afero!

aK, apr. 18

<http://www.planlingvoj.ch>

Komento pri:

<http://www.esperantio.net/index.php?id=3487>

En svisa universitato, ciuj tiuj menciitaj verkoj pri Zamenhof certe falus tra la jughado kiel sciencaj verkoj, per aliaj vortoj, ili ne posedas la nivelon, kiu estus necesa por esti akceptita kiel disertacio au habilitacio au ec nur kiel scienca monografio de "normala" eldonejo. En tio ankaŭ ne helpas la fanfaronado kaj admirado de "profesoro" Silfer au de d-ro (au profesoro) Minnaja. Do, nur en Esperantio eblas verki tiajn librojn.

www.planlingvoj.ch

de kompetenta flanko mi ricevis jenan reagon, kiu estas ne nur interesa por mi

Karaj Andi kaj Didi,

eble ni iom pli zorge formulu:

Por la du kursoj _registriĝis_ ĝis nun entute proks. 1.600.000 Esperanto-lernantoj. Tage aliĝas por la du versioj proks. 2000 homoj. La jara novaliĝado estas nun ĉe proks. 700.000 homoj kaj

eble post aldono de la portugala kurso kreskos al unu miliono - se la sorto estos favora al ni (kaj la informado funkcias bone).

Laŭ privataj informoj de la Duolingo-administrantoj (al Chuck) tage proks. 100 homoj finas la kurson, do plenumas ĉion ĝis la lasta leciono, do proks. 5 %. Tio estas pli malpli normala por reta kurso. (Kaj cetere ankaŭ ne tro malkutima por ĉeesta kurso, se tiun ne akompanas tre zorga ensociigo.)

Kruda takso do povas diri, ke la kurso, kiu ekzistas en la angla versio ekde preskaŭ tri jaroj, zorgis pri ellernado de baza kurso fare de proks. 50.000 ĝis 70.000 homoj (Ja la homoj bezonas kelkajn monatojn, eble meze ĝis ses.) La kurso estas iom vasta baza kurso, ĝi instruas ion kiel 2000 vortojn (ne radikojn). Komprenoble la parola nivelo atingita estas malpli granda ol ĉe ĉeesta, interparola kurso, la kursanoj do devos ankoraŭ iom pluekzerci la interparoladon. Jam ekzistas unuaj ĉeestaj kunvenoj de Duolingo-lernantoj de Esperanto, ekz.

<https://events.duolingo.com/boston-esperanto/>

(Ŝajne ne ekzistas serĉado laŭ lingvo ĉe events, sed ja eblas serĉi ĉe Google laŭ

Esperanto site:events.duolingo.com

aŭ simile

Verŝajne la Duolingo-kurso estas la plej granda en la tuta historio de Esperantujo.

Se oni komparas kun la taksoj de Zlatko Tisljar pri la nombro de Esperanto-lernantoj, iam post 1980, proks. 50.000 ĝis 100.000 eklernantoj jare (ie en "Esperanto vivos malgraŭ la Esperantistoj"), ni povas konstati ion kiel kvinobliĝon ekde tiam.

Mi bonvenigas korektojn, kaze ke mi ie eraris aŭ misformulis.

Unu plian fojon mi esprimas mian miregon, ke la temlinioj de vi, Andi, ĉiam aŭ tre ofte tekstas "Re:UEA".

Por mi tiu nomo estas sufiĉe absurda, ĉar ekzemple ĉi-kaze la kontribuo de UEA proksimas al nulo.

La temlinio indikas la ideon, ke Esperantujo turniĝus ĉirkaŭ UEA, dum la realo intertempe estas multe pli, ke UEA provas postkuri (aŭ poststumpli) la sendependan evoluon de Esperantujo.

Komento pri

<http://svisa-esperanto-societo.ch/SESi/2018-1-SES%20informas.pdf>

La aktuala jarkalkulo de Svisa Esperanto-Societo, gvidata de Mireille Grosjean und Didi Weidmann, ilustras totalan groteskan miskalkuladon de tiuj responsuloj.

Char mi ne estas membro de tiu asocio, sed nur ekstera observanto, mi rezignas pri detala komentado de la unuopaj pozicioj. Ciu interesata leganto, kiu iom komprenas pri asociaj jarkalkuloj, povas mem fari siajn konkludojn.

Sed nur unu detalon mi volas montri: La pozicio "membrotizoj" ce la enspezoj montras, ke la

reala kotizpagado evidente draste reduktighis kompare kun la budghetitaj enspezoj. SES deklaras 151 membrojn. Ci tiu shajne sterila cifero pli malpli aperas jam de jaroj (kvankam shajne tamen okazis shrumpo de ch. 175 al 150 membroj). Se la plenkreskaj ordinaraj membroj (kaj ili probable estas la plimulto) pagas averaghe CHF 35.-, tio signifus, ce la enzpezo de CHF 2075.-, ke SES havis en 2017 cirkau 60 membrojn. Sed budgetitaj estis CHF 5500.-, kio jes signifus ch. 160 membrojn. Do, kial tiu nombro estas tiel malalta, kaj kian rolon ludas patronoj, paroj, junuloj kaj infanoj? Eble iujn detalojn mi ne konas, sed ciukaze tiu jarkalkulo sulkgigas mian frunton kaj hirtigas miajn harojn.

Konklude: UEA devus lau mi kontroli, kiom da pagantaj membroj la svisa Landa Asocio vere havis en 2017, por eviti publikigon de falsaj ciferoj kaj nombroj, kiuj eventuale beligas la membrosituacion de la landaj asocioj kaj de UEA entute. Persone mi suspektas, ke INTERNACIE la realaj asociaj membronombroj estas multe pli malaltaj ol deklaritaj.

- **Trude Sinno**

Kara,

mi kore dankas vin pro la interesaj artikoloj pri Albanio kaj la vivo de via familio. Kian tristan vivon via familio havis, sed finfine ĝoju ke vi havas tian kuraĝan patrinon, diligentajn filojn kaj finfine ankaŭ konatiĝis kun via patro. Kiajn sortojn civilaj homoj devas toleri pro milito, okupado, forpelo. Post kiam mi legis vian familian historion kaj iom pri la albana historio, mi pensas ke Germanio kaj Albanio havas multan komunan, koncernante forpelon, okupadon, kunigadon (GDR-BRD), rifuĝintojn. Kvankam Albanio longe estis forgesinta lando kaj enŝlosita, aldone via lingvo preskaŭ neniu konas.

Ĉi-jare en Germanio eldoniĝis interesa libro pri via lando (Trescher-Verlag, Frank Dietze, Shkëlzen Alite). En ĝi troviĝas ĉiuspacaj informoj ankaŭ i.a. pri la "piramido". Bedaŭrinde mi ne plu povas ĉion legi dum la restanta semajno.

Mi ricevis la informojn pri nia vojaĝo. Mi pensas ke ni tranoktos en Durres, ĉar estas proksime al la flughaveno kaj hoteloj malpli kosta ol en Tirana. Ni rondvojaĝos suden kaj orienten kaj nur vizitos Tiranon la 1-an de majo. Unue ni veturos al Kruja kaj poste faros rondvojaĝon tra Tirana. Bedaŭrinde mia vidkapableco estas treege malbona. Alifoje mi estus preninta buson de Durres al Tirana post la ekskurso, estas ja nur 40 km, sed sen lumo mi estos perdita.

Al vi kaj via familio ĉion bonan,
Trude

PS: Cu vi bezonas ion ajn el Germanio?

- **Germain Pirlot**

Kara,

Pri tiu temo por la venonta inform-bulteno de belga sekcio de AEDE (*Association Européenne Des Enseignants* – Eùropa Asocio de la Instruistoj) mi jam ricevis sciigojn el Pollando.

Ĉu mi povas esperi raporteton (12-15 linioj) pri Albanio? Fakte temas pri bonega okazo por pruvi al ne-e-istoj la valoron kaj la efikecon de Esperanto. **Limdato estus la 15-a de majo** por ke mi havus tempon por francigi la reagojn; antaŭdankon!

Temas pri jenaj punktoj : frua lernado, lingva mergado, nombro da horoj semajne, denaskaj instruistoj aŭ diplomitaj pri lingvoj, metodo (pli da gramatiko kaj kvalito de la esprimado aŭ preferinde komunikado-rilatoj), amplekso de la interŝanĝoj, de lernejoj vojaĝoj, de uzado de novaj teknologioj, k.t.p.

Ekzemple por Belgio :

1) *Elementa lernejo*

- Valonio : ekde la 5a j. 2 h/sem, eblas elekti inter la nederlanda, la angla, la germana laŭ la lernejo

- Bruselo : la nederlanda - ekde la 3a j. , 3 h/sem; ekde la 5 h/sem.

2) *Mezgrada lernejo*

- 7-8a : 1 lingvo : nederlanda, angla, germana ; 9-10a : 2 lingvoj : nederlanda, angla, germana;

11-12a : 3 lingvoj : nederlanda, angla, germana, itala, hispana, ...

Ĉu estas en via lando lernejoj en kiuj estas “lingva mergado”, t.e. lernejoj kie la lernantoj sekvas partojn de kursoj en fremda lingvo? Tio okazas en kelkaj lernejoj en Belgio, ĝenerale en la franclingva regiono estas en la nederlanda; eble pro la fakto estas pli facile trovi flandrajn instruistojn kiuj konsentas instrui en Valonio.

Krome ĉu estas kelkfoje interŝanĝoj kun alilingvaj lernejoj, i.a. skajpe?

Kompreneble tio dependas de la lernejoj mem.

SE vi **ne** havas informojn pri tiuj punktoj, ĉu vi bonvolus transsendi mian peton al spertulo, aŭ sciigi al mi retadreson de persono kiun mi povus kontakti tiurilate, eventuale de UEA-delegito?

Antaŭdankon pro via gravega kunlaboro.

Kore kaj kolege via,

Germain Pirlot

ILEI- kaj AEDE-membro

dumviva UEA-membro

- **Júlia Szalainé Tímár**

Kara!

Dum pasintaj tagoj vizitis nin (pere de Pasporta Servo) gaja juna virino el Estonio, el Tallinn. Dormis ĉe ni, vizitis la kurson. Mi akompanis ŝin al la fortikaĵo, rigardis la belegan panoramon de la urbo. Mi tre ĝojas ĉiam, se iu fremdulo admiras "mian urbon." Alitage ni veturigis ŝin per ŝipeto laŭ la rivero, por rigardi la pontojn, kaj la bordojn. Poste promenis tra la insulo Margareta. Posttagmeze ni muzikis, ĉar ŝi kunportis ŝian malgrandan gitaron ŝi nomis ĝin "ukulele," Sándor nun lernas ludi pianon, (ni havas malgrandan sintetizatoron), kaj instruis al ŝi hungaran



popolkanton.

Kiel vi fartas?

Ĉion bonan deziras al vi Júlia

- **HORI Jasuo**

Karaj amikoj,

1. Auskultu kontraŭ nuklean kanton

“Hejme floras certe sed ...” <https://www.youtube.com/watch?v=cAMgZ5VEPyc>

estas Esperanta versio de la originale japana kanto “Hanaŭa Sakedomo” pri homoj dispelitaj de siaj hejmoj pro la akcidento en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima (Fukuŝima Daiiĉi) post la Granda Tertremo en Orienta Japanio en la 11-a de marto 2011.

La muzikgrupo Kageboushi (Esperante: Silueto), kiu poemverkis, komponis kaj kantas la kanton, lanĉis la projekton inviti multajn aliajn muzikistojn kanti kaj diskonigi ĝin. Jen Esperanta versio partoprenanta en la projekto. Kantas JoMo, franca kantisto kaj esperantisto.

Bonvolu disvastigi ĉi tiun kanton al homoj ĉirkaŭ vi. Ni ne forgesu la katastrofon de la nuklea centralo de Fukuŝima.

Projekto: Esperanta versio de "Hanaŭa Sakedomo" -- "Hejme floras certe sed ..."

YAMAKAWA Setsuko <setsuko@gol.com>

2. Legu eseon pri tiu kanto verkitan de HORI Jasuo

Mi alkroc^{is} la eseon.

HORI Jasuo (s-ro)

371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3

<horizonto@water.sannet.ne.jp>

- **Trude Sinno**

Kara,

koran dankon por via afabla agado. La albana lingvo same kiel la vaska estas la du misteraj lingvoj en Europo. Volonte mi iomete lernus ĝin, sed bedaŭrinde mi ne estas L.L. Zamenhof, Elizabeth I aŭ Engels kiuj ĉiuj scipovis multajn lingvojn. Tamen, kiel ĉ. E-istoj, lingvoj ĉiam interesis min. Kiam mi ankoraŭ membris en Pasporta Servo vaskaj gastoj venis kaj kantis/rakontis en/pri la vaska kaj Vaskolando. Mi provos encerbigi almenaŭ kelkajn vortojn. Vi ne respondis al mia demando: Ĉu mi kunportu ion ajn el Germanio por vi. Por mi eblos nur morgaŭ iri al la urbo. Do, se ion ajn vi deziras, mi volonte provos fari tion. Diru! Bedaŭrinde la vojaĝasocioj pro diversaj kaŭzoj ne plu estas komunikemaj. Mi nur scias ke 24 personoj partoprenos, eble iu el Kolonjo au Bonn??? La nomo de la gvidanto kiu atendos nin en Tirana nekonata, nur la vojaĝasocio en Skopje. Eble li/ŝi estas el Albanio, Kosovo au Makedonio, feliĉe ŝi/li parolos ambaŭ lingvojn.

Kelkajn capitrojn pri via lando mi jam legis. Mi pensis ke nuntempa Albanio estas iomete kiel Kosovo relegie. La plejmulto muslima, forgesintan sian kredon, krom maljunuloj. Ortodoksaj kristanoj en malmultaj lokoj kaj kelkaj monaĥejoj. Nun mi legas rom-katolikoj, serbaj, grekaj ortodoksoj ktp., ĉiuj serĉas influojn. Mi ankaŭ sciis ke en Kosovo la albana lingvo estas diversa de via, sed pensis ke en Albanio nur ekzistas 1 albana lingvo, kaj ne 2 kiel la toska kaj gega albana.

En Germanio ni ja ankaŭ nur ek de la tempo de Luther havas komunan lingvon. Li tradukis la biblion por la popolo kaj elektis la dialekton de la regiono Hanovro kiu nun estas nia germana. Persone mi estas feliĉa esti senrelegia kaj ne estis presita en iun ajn kredon.

Antaŭ kelkaj tagoj belga amiko de la E-o grupo "senlime" (kies membrino mi iam estis) sendis interesan informon pri la belga kariljonisto Jo Haazen (artikolo pri li ankaŭ estis en E-o, marta eldono). La malsupra kontribuo estas en la ĉina kaj E-o, eldonita de "El popla Ĉinio). Ĝuu lian prezentadon.

Kore,

Trude

PS Mi kunportos mian antikvan poŝtelefonon, eble ja sukcesos renkonton.

- Karaj amikoj,

Jen du memorajhoj pri kelkaj jhus pasintaj Esperanto-eventoj en Ĉinio, kie en la Esperanto-parko estis plantita arbo nome de la Antverpena Regha Esperanto-Societo "La Verda Stelo" kaj kie estis realigita interesa dokumenta filmo fare de la Esperanto-redakcio de la China Radio kaj Televido.

Se vi opinias ke la mallonga filmo estas sufiche interesa, mi proponas ke vi uzu ĝin kiel kultura parto de la programo dum la inauguro de la Esperanto-domo en Antverpeno. La filmo ja havas

impresigan propagandan valoron, ankau por neesperantisoj kiuj cheestos la malfermon de nia Esperanto-centro.

Sukceson karaj samideanoj!

Jo H.

Sinjoro Jo Haazen estas unu el la plej eminentaj kariljonistoj en la mondo. Li naskiĝis en Belgio, kaj strebas diskonigi kariljonarton. Dank'al lia klopodado en Rusio, Sankt-Peterburgo retrovis sian tradicion pri tiu ĉi instrumento. En 2004 Haazen estis honorita de rusa prezidento Vladimir Putin per la medalo "Ordeno de la Amikeco". En la sekva jaro ili renkontiĝis en Belgio en la periodo de "Europalia". En 2012 la belga reĝo Alberto la 2-a honoris lin kiel "Komandoron en la Ordeno de la Krono".

"Muziko estas speco de Esperanto (Music is a kind of Esperanto, an international language that needs no translation, a language that brings people together.)", tion diris rusa prezidento Vladimir Putin en 2017. Kaj en la sekva jaro tion praktikigis sinjoro Jo Haazen per sia Esperanto-muzika vojaĝo en Ĉinio.

La vojaĝo de Haazen komenciĝis en Pekino. En la 31a de marto, li vizitis la Pekinan Lingvan kaj Kulturen Universitaton, kaj ĉeestis en la regula E-kurso de profesoro Li Weilun kaj Pekina Esperanto-Asocio. Tie li faris "muzikecan" instruadon al ĉinaj junaj esperantistoj.

En la 1-a de aprilo, la esperantisto-muzikisto atingis la urbon Zaozhuang de la provinco Shandong. Sinjoro Haazen iris al la Parko de Esperanta Arbaro.

En la ĵus konstruita ligna dometo, Haazen estis informita de Sun Mingĝiao, estro de Esperanto-Muzeo kaj reprezentanto de lokaj esperantistoj, pri historio de la parko, administrata de Sun Shoude, kiu per ĝi celas estigi ekologian programon por verda ekonomio kaj hejmon por ĉiu esperantisto.

Kortuŝita, Haazen monofere elektis 3 arbojn por la Reĝa Antverpena Esperanto-societo "La Verda Stelo", la Esperanto-Societo "Kariljono" en Sankt-Peterburgo kaj la amikeco inter Belgio, Ĉinio kaj Rusio.

Povas diri, ke la verda etoso en Zaozhuang estas varma. Sekvatage, sinjoro Haazen koncertis per pianoludado (pro la manko de kariljono en Ĉinio) antaŭ aro da studentoj de la Zaozhuang-a Universitato. Lia ludado kortuŝis ĉeestantojn, inkluzive de la estraranoj de la universitato.

Post la koncerto, Haazen vizitis la Esperanto-Muzeon. Rigardinte la eksponaĵojn, li montris grandan konon kiel veterana esperantisto pri la historio de nia movado en Eŭropo. Kelkaj informoj estis eĉ unuafoje sciigitaj al ĉinaj samideanoj. Kaj samtempe, lia scio pri E-movado en Ĉinio riĉiĝis kaj profundiĝis.

En la 3a de aprilo, Haazen veturis al Nankino (en la provinco Jiangsu de sudorienta Ĉinio), fama urbego kaj turismejo sude de Zaozhuang. Posttagmeze, Haazen koncertis en la halo de Nankina Agrikultura Universitato. Ankaŭ la studentoj de arta fakultato faris prezentadon kiel kunago al la estiminda majstra muzikisto.

Haazen, kiu neniam forgesas diskonigi Esperanton, prelegetis esperante pri kariljono kaj pri la lingvo.

En la lasta tago de tiu ĉi esperanta kaj muzika vojaĝo, Haazen atingis la Nankinan Normalan (Instruistan) Universitaton, en la halo de la arta instituto, faris ĝuindan pianan ludadon por lokaj studentoj kaj ĝuis la prezentadojn de la Esperanta artrupo. Lia muzikludado denove enterigis verdajn semojn en la koroj de ĉinaj gejunuloj.

Post la koncerto, sinjoro Haazen vizitis la ĝardenojn de la du nankinaj universitatoj. Brakumante la printempon, verdas la ĝardenoj de la junularo. Muziko estas translandlima, internacia kaj eterna "Esperanto" de la homaro, kaj esperanto povas esti "muziko" de ni ĉiuj. Sinjoro Jo Haazen, unuiĝo de muzikisto kaj esperantisto, plej bone realigis la idealon de Zamenhof per belega ludado. Lia vojaĝo en Ĉinio jam kaŭzis fortan eĥon, espereble en la lando pli kaj pli multaj homoj scios, konos kaj lernos la "muzikan" lingvon.

Ipernity: [El Popola Chinio](#)

Facebook: [EPC El Popola Chinio](#)

Twitter: [El Popola Chinio](#)

WeChat: Skani la du-dimensian kodon por legi EPC en WeChat

- Komento pri la membrostatistiko en la revuo *Esperanto*, majo 2018:

En ghi oni povas observi kelkajn interesajn tendencojn, kompare kun la statistiko de la antaŭa jaro, nome jenajn:

1. Tendenca malkresko de la membraro estas konstatabla en la kazoj de Belgio, Britio, Bulgario, Cehio (drasta), Danio, Estonio, Francio (che la individuaj membroj IM), Germanio, Hispanio (aligitaj membroj AM), Hungario, Irlando, Italio (drasta), Litovio, Malto (movado praktike elverpita), Nederlanda (drasta), Pollando (drasta), Portugalio (drasta), Serbio, Slovakio (drasta), Slovenio, Svedio, Svislando, Irano (che AM), Israelo (draste che AM), Vjetnamio (che AM), Ĉilio (che AM), Kanado, Kolombio (che AM), Meksiko (draste), Urugvajo (che AM), Peruo (che AM), Sud-Afriko.

Konklude: parte drasta shrumpo de la membronombro en Europo kaj che kelkaj amerikaj landoj precipe che la AM.

2. Tendenca kresko de la membraro estas konstatabla en la kazoj de: Albanio, Bosnio, Francio (sufiche granda che la aligitaj membroj), Hispanio (IM), Ruslando (precipe AM), Ukrainio (IM), Ĉinio, Hindio (kelkaj membroj pliaj), Japanio, Koreio (drasta),

Nepalo, Mongolio, Vjetnamio (IM), Brazilo, Kubo (draste che AM), Usono (70 pliaj AM, 18 pliaj IM), Benino, Burundo, Kongo DR, Nigherio, Togolando (draste che AM).

Konklude: parta kresko en diversaj ekstereuropaj landoj, precipe Japanio, Chinio, Nepalo, Brazilo, Kubo, kelkaj afrikaj landoj.

La membrostato de ciuj aliaj landoj restis pli malpli stabila (au stagnas).

3. Al UK Seoul (2017) aliĝis 262 koreoj; en 2015 Koreio havis 250 (87 IM) / en 2016 244 (68) / en 2017 389 (218) UEA-membrojn.

Al UK Lisbono (2018) aliĝis (ĝis aprilo) 31 portugaloj; en 2015 Portugalio havis 95 (11 IM) / en 2016 44 (8) / en 2017 12 (12) UEA-membrojn.

Samtempe, al la Lisbona UK aliĝis (ĝis aprilo) nur) 6 slovakoj kaj 45 koreoj.

La Nitra UK evidente ne kauzis grandan antaŭenpushon en la slovaka Eo-movado lau UEA-membroj (kiuj eble estis alimaniere absorbitaj en SK), kaj ghis nun oni ankau ne povas konstati grandskalan alighadon de portugaloj al la Lisbona UK (nu, la Eo-movado en ci tiu lando estas tradicie malforta), dum la Seula UK allogis multajn koreojn, kiuj ne povas reveni al Europo.

Oni vidos, kiel tiuj ciferoj influos la venontjaran membronombron.

UEA, precipe ĝiaj estraranoj (cefe estraranoj/ pri Landa Agado) kaj komitato estus bone konsilataj, se ili serioze okupiĝus pri tiuj tendencoj kaj eltirus la ĝustajn konsekvencojn. Sed tiajn diskutojn oni ne povas vidi en la komitato.

aK, apr. 18

www.planlingvoj.ch

- Komento pri la artikolo de Sergej Kuznecov pri René de Saussure en la revuo *Esperanto*, majo 2018:

Kun intereso mi legis tiun artikolon pri grava esperantisto kaj interlingvisto de la komenca tempo, kiu ighis pli kaj pli forgesita de la Eo-movado, kiu preferis okupighi pri idiotajhoj kaj stulta propagando.

Tamen, la esperanta kaj planlingva influo de René al la lingvistikaj teorioj de Ferdinand al Ferdinand shajnas al mi forte idealigita. Sendube, la temo aktualis siatempe (en la vivotempo de Schleyer, Zamenhof, Couturat k.a.). En la faka literaturo (kiun mi legis) oni apenau parolas pri Esperanta kaj planlingva influo de René al Ferdinand. Eble oni ne komprenis ghin au oni scias tro malmulte pri ghi kaj devas kontentighi pri supozoj. La hipotezoj starigitaj de Kuznecov bazighas do tre forte sur la esperantista vidpunkto.

Necesus kontroli tiujn asertojn lau la nacilingva faka literaturo. Ekzemple en la bonega libro de John E. Joseph pri FdS la rolo de René en la familio de Saussure estas ofte traktita, kaj ech ekzistas aparta chapitro pri li kaj Esperanto. Aliflanke oni devas ankaŭ diri, ke la nacilingva faka literaturo ofte (ech kutime) ignoris la Esperantan au planlingvan interesighon au aktivecon de gravaj lingvistoj (kaj ne nur lingvistoj). En la menciita "Kurso" de FdS (kiu estis verkita de aliaj post lia morto) aperis nur eta mencio pri lia opinio pri Eo, kio lau mi jam estas sensacio kaj eble sufichas por konsideri, ke la influo de René postlasis spurojn.

La ignorado de R. de Saussure (kiu finfine farighis kritikanto de Esperanto) fare de la Eo-movado estas tipa kaj karakteriza por (maldekstra) propaganda movado, kiu nur mencias siajn pozitivajn flankojn kaj krude prisilentas chiun kritikon, kaj estas nepardonebla. En Vikipedio komplete mankas Esperanto-versio pri li kaj la nacilingvaj versioj estas suprajhaj kaj nekompletaj. Kvankam en Esperanto ekzistas kelkaj kontribuajoj kiel http://www.planlingvoj.ch/39_ENCYCL_INTERLINGVISTIKO.pdf au tiu jhus aperinta de Kuznecov. Tio signifas, ke la Esperanto-vikipediistoj (inter kiuj ekzistas kelkaj elstaraj idiotoj) au ignoras la temon au komplete malinteresighas pri ghi, au ne konas ghin.

aK, apr. 18

www.planlingvoj.ch

- Komento pri <http://sezonoj.ru/2018/04/trezoro-11/#more-11938>

Chu oni unue kontrolis, chu tiu chino ne estas kunlaboranto au informanto de chinaj sekretaj servoj?

En jesa kazo ekzistus la risko, ke li sendus chiujn (konfidencajn au internajn) informojn, kiujn li povas akiri en la estraro, al tiuj servoj.

Lau mia scio, grandparto de chinoj, kiuj internacie agadas kaj laboras eksterlande, estas au spionoj au iel ligitaj kun la chinaj sekretaj servoj. Ekzemple ciuj chinaj entreprenoj en Chinio, kiuj kunlaboras kun eksterlandanoj, devas fari raportojn al la chinaj registaraj instancoj, do rekte au malrekte al sekretaj servoj de Chinio. Despli sub la nuna rigora reghimo en Chinio, kiu volas kontroli chion kaj chiun kaj kiu komplete ignoras diversajn rajtojn kaj liberecojn de la homoj, kiu subpremas la interreton kaj enkarcerigas homojn, kiuj ne plachas al la reghimo. Pri la giganta milita rearmado de tiu shtato, la sistema chikanado de la homoj en Hongkongo kaj la industria spionado kaj kontraulegha reuzado de eksterlandaj patentoj ni tute ne parolu. Chu pri tiuj temoj oni skribas en la Unesko-

Kuriero, kiu estas financata kaj kontrolata de Pekino?

Mi nur avertas, ke oni ne ripetu erarojn de la pasinteco, kiam dum la komunisma tempo en UEA ekzistis pluraj "agentoj" de komunismaj landoj, kiuj hejme raportis al siaj instancoj.

Sed UEA chiam blinde kaj naive fidis al komunismaj reghimoj, kiujn oni tondre aplaudis dum universalaj kongresoj (kvankam tiuj reghimoj grandstile lezis la homajn rajtojn) kaj probable ghi blinde kaj naive fidis ankau al Chinio, unu en la plej shatataj landoj de la Eo-movado (krom Irano kaj Kubo). Ne asertu, ke vi distingas inter lando, popolo, reghimo, shtato kaj politiko.

aK, apr. 18

www.planlingvoj.ch

- **Pri la enhavo de la revuo Esperanto (UEA) oni povas nur komenti:**

Ege stranga enhavo.

Sed char temas pri stranguloj, kiuj diktas la tonon en UEA, tio ne estas miriga. Mi do daure rezignos pri abonado, gis kiam tiu kompatinda revuo proponos ion vere interesan por legi.

aK, okt. 17

- 2018 APRILA LETERO

KARAJ ĈIUJ!

MALĈAGRENIGA PRINTEMPO

Finfine ĝi alvenis! En nia ĝardeno grandega arbusto de *ora pluvo* floras kaj aperis ankaŭ la flavaj tulipoj. Inter la multaj verdaj herboj dense ekaperis la bonodoraj violoj.

FELIĈA KORBATEGADONNur esperi mi aŭdacis, ke la fabellibroto STEĈJO-FABELOJ plaĉos ankaŭ al la plenkreskaj legantoj. Ĉiun ĝojon superiga estas la fakto, ke ankaŭ la esperantistaj legantoj esprimis en la konfirmaj leteroj de la libro-donaco sian plaĉon. Pluraj el ili uzis la vorton "ĉarma", sed multaj skribis, ke la libreto aŭ la fabeloj kaj la ilustraĵoj estas "belaj" aŭ eĉ "belegaj". Bedaŭrinde mi ne ricevis de ĉiuj la konfirmon pri la ricevo. Al vi ĉiuj, kiuj legas ĉi leteron, mi sendis la libreton, kun la helpo de mia bofratino, Erika, el Kluĵo! Do, mi petas vin, **kiu ne ricevis** la libreton, sciigu min, ke mi resendu ĝin al vi!

Mia karega edzo, Filippo kaŭzis la feliĉan korbategadon! Kiam mi diris, ke nun mi devas serĉi geamikojn, kiuj tradukos la dekdu fabelojn en italan lingvon, li diris: ci ne devas serĉi ilin, ĉar la fabelojn tradukos mi!

DELONGE MI NE HAVIS SIMILE GRANDAN FELIĈON!

Li tradukis ilin, per belega itala stilo, kaj nun mi provas eldonigi la italan version de STEĈJO-FABELOJ.

TURKA MALBENO

Laŭ la hungara proverbo: MALBONA NAJBARO ESTAS KIEL TURKA MALBENO.

Tagon telefonis la najbaro, ke sekvan tagon li venos por tranĉi la branĉojn de niaj arboj, kiuj etendiĝas super lia ĝardeno. Frumatene oni eklaboris; kiam ni iris rigardi la laboron, li jam esis forseginta du tutajn arbojn: nur stumpoj restis. Filippo komencis kriegi al li kaj minaci lin, ke tuj ni alvokos la karabenistojn. Eble pro tio aliaj tri arboj saviĝis. Mi ege timis, ĉar Filippo treege nervoziĝis. Ĉe la maljuna aĝo similaj aferoj estas mortdanĝeraj! Tiu najbaro estas vere “turka malbena”! (Laŭ Filippo: kanajlo!)

ROSY

Ekde 14 aprilo ni havas helpantaron. Rosy ĉiu sabate venos por tri horoj. Ni ekfaris grandan purigadon en la tuta domo. Mi ege ĝojas, ĉar vane mi ŝatas la puran domon, se mi ne havas sufiĉan fizikan forton por la laboro.

TULIPOJ

Ĉirkaŭ cent mirindaj tulipoj beligis nian ĝardenon en aprilo. La pli multaj tulipoj estas flavaj, sed ankaŭ kelkaj ruĝaj estas kaj aliaj kun specialaj koloroj. Kaj ankaŭ la pirarbo ekfloris!

BONŜANCO EN LA MALBONŜANCO

La ligno sufiĉis: dum la tuta vintro ni ne malvarmis. NUR NUN, en aprilo malboniĝis la varmiga sistemo: la akvo komencis guti el la stovo. Dum la somero oni refaros la tutan varmiga-sistemon per la modetrnaj tubetoj el kupro. Ho ve! La tuta domo estos renversita!

DEZIRO

Neniu havu similajn problemojn, sed ĝojoplenan someron ĝuu vi ĉiuj!

Kun amikeco, Julia

- **Júlia Szalainé Tímár**

Kara!

Hierau vespere nia klubo prezentis la menciitan humoraĵon. Ĉeestis multe da interesiĝantoj. La rolantoj estis entuziasmaj, rolis bone, kaj kunportis multajn aĵojn por helpi la prezentadon. Imagu eĉ la aktoro ĉeestis. Ni tre ĝojis pri la ĉeesto de Stefan MacGill. Niaj klubanoj pretigis eĉ "monon" (ĉar temis pri aĉetado) laŭ mia opinio la mono sukcesis ege bela.

Mi sendas al vi fotojn pri la ĉefprovo (la lasta tri) kaj pri la prezentado.

Amike Júlia

- **Júlia Szalainé Tímár**

Kara!

Ni ricevis de la turisma agentejo la detalan programon.

Mi tradukos al vi (kompreneble ne la tuton, ĉar estas multaj paĝoj, sed la esencon.

Unua tago:

Ni alvenos al Tirana la 15-an de majo je 14.50, WIZZ AIR W6 2233. Loĝos: Hotel Capital Tirana 1 nokton. Posttagmeze ni laŭ la programo Et'hem Bey, Horloĝturo, Scanderbeg placo, Nacia Historia Muzeo.

2. tago:

Matene ni vizitos Bunkar, poste reveturos al Tirana, monto Dajti, poste al Durres. Ni vizitos Amfiteatron, Muzeo de aĉeologio. Loĝos: Hotel Fafa Complex (2 noktoj)

3. tago: en Durres libera tempo

4. tago:

Matene al Berat, fortikaĵo, Muzeo Onufri, poste veturi al Vlora. (dumvoje Ardenica kaj Apollonia) Loĝos en Vlora: Hotel Palace 2 noktoj

5. tago:

La foiro (merkatplaco) en Vlora, la domo de Prezidanto, kaj la statuo de fondintoj. posttagmeze ĉe la bordo libera tempo.

6. tago

Matene al Saranda. (dumvoje fortikaĵo Ali Pasha), Butrin. Loĝos en Saranda Hotel Saranda International 1 nokto

7. tago

Matene al Gjirokastra, (dumvoje preĝejo Mesopotam) fonto de blua-okulo, ĉe la alveno fortikaĵo de Gjirokastra, muzeo pri armiloj, kaj popol-industrio. Loĝos en Gjirokastra: Hotel Nr 1, 1 nokto

8. tago

Matene al Korca: La Muzeo de mezepokaj artoj, poste Mirahori. Al Pogradec: (dumvoje Drilon parko, kaj Villa Art. Loĝos en Pogradec, Hotel Perla 1 nokto (ĉu vere "perla"?)

9. tago

Matene al Sveti Naum, poste Elbasani, denove al Tirana, loĝos denove kiel 1. tago.

10. tago

Matene verŝajne libera tempo, veturo al flughaveno; forveturo: 15.30 Wizz Air W6, 2234
Mi petas vin, se mi eraris, pardonu min, mi forte estimas vian landon, sed tiuj nomoj por mi nun nekonataj, mi esperas, ke ni ekkonos ilin dum voje.

Amike Júlia

- **Trude Sinno**

Karaj,

mi esperas ke vi bonfartas kaj ĝuas la somerajn helajn tagojn. Ankaŭ ĉe ni someras, kvankam pro la klimata ŝanĝo ofte pluvegas en malgrandaj regionoj dum ĉi-tie ĉio estas seka. Ĉar mi nur "blinde" fotas, sen vidi klarecon de la motivoj, mi hejme metas ĉiujn fotojn en la komputilon kaj iom post iom provas fari "filmeton" sur disko - kiun mi poste vidas sur TV-ekrano, anstataŭ sidi en la komputila angulo. Mi finis Frankfurt - Sarandë kaj Durrës -Krujë - Tirana. La vojaĝo de Sarande al Ohrid - Elbasan sekvos iom poste.

Mi faris kopiojn de la 2 finitaj filmetoj por vi kaj volonte sendus ilin al vi. Fakte, ili ne estas tiel profesiaj, ĉar mi forgesis kiamaniere fari tion. Heide Martha, ĉu eblas sendi ilin al viaj familianoj en Leipzig, kiujn vi ja viziitos en julio???

Salutojn el Bonn!

- **Edmond Ludwig** <esperanto.eludwig@orange.fr>

Kara,

Nekredeble ! Tamen!

Eta demando: mi supozas, ke mi povos antaŭ eldono kontakti la eldoniston por aldoni dankojn pro helpo al mia edzino Henriette kaj nia komuna konatino Ursula Bachmann. Ĉu?

Jam mi ne plu kredis !!!

E.L.

Eĉ bonege se dulingve!

- dankon pro viaj respondoj. Miaj filmetoj ne estas profesiaj, sed mi ĉiam ŝatis fari tion. Bedaŭrinde la lastan mi faris antaŭ 3 jaroj kaj intertempe mi fariĝis forgesema, malrapida. Mi tute forgesis kiamaniere mi faris tion. La nunan version mi lasis kaj faris kopiojn por vi, sed fakte estas kelkaj punktoj kiujn mi denove ŝanĝus, se mi estus paciema. Bedaŭrinde mi ne trovis bonan albanan instrumentan muzikon. Unu el la "CD" mia aĝa komputilo ne akceptis. Se ĝenas vin la muziko, rigardu ilin mute. Ĉi-semajne mi sendos ilin al la filo de Heide-Martha.

Por fremduloj eble estas iomete teda, rigardi ilin, mi mem tre ĝuas rigardi Albanion en TV. Fakte mi denove ferias en via lando kun malfermitaj okuloj.

Ĝis iam,

Trude

-
- **Trude Sinno**

Karaj,

mi esperas ke vi bonfartas kaj ĝuas la somerajn helajn tagojn. Ankaŭ ĉe ni someras, kvankam pro la klimata ŝanĝo ofte pluvegas en malgrandaj regionoj dum ĉi-tie ĉio estas seka. Ĉar mi nur "blinde" fotas, sen vidi klarecon de la motivoj, mi hejme metas ĉiujn fotojn en la komputilon kaj iom post iom provas fari "filmeton" sur disko - kiun mi poste vidas sur TV-ekrano, anstataŭ sidi en la komputila angulo. Mi finis Frankfurt - Sarandë kaj Durrës -Krujë - Tirana. La vojaĝo de Sarande al Ohrid - Elbasan sekvos iom poste.

Mi faris kopiojn de la 2 finitaj filmetoj por vi kaj volonte sendus ilin al vi. Fakte, ili ne estas tiel profesiaj, ĉar mi forgesis kiamaniere fari tion. Heide Martha, ĉu eblas sendi ilin al viaj familianoj en Leipzig, kiujn vi ja viziitos en julio???

Salutojn el Bonn!

- Saluton! Vidu nia novaĵo tre kara s-ano Prof-ro **Bardhyl Selimi**

Jen nekutima, pripensiga demando: ĉu estus akceptebla la konvinka neado de la vivanta ĉeesto de Spirito, konsidere la sciencaj malkovroj, tia kia la Plank-Eisntein rilato? Rilate al tiu temo skribis la verkisto Paiva Netto: *“Ekzistos alianco prudenta, do ekvilibra, inter tiuj du polusoj de Saĝo: Religio kaj Scienco”*.

Se Vi, nia estimata samideano, taksas ke tio (Spirito kaj Scienco) estas interesa aŭ/kaj esplorinda, tiam Vi nepre legu la artikolon **Einstein, Planck kaj la frekvenco de Spirito** en la Blogo Paiva Netto ĉe

<https://goo.gl/DhULaq>

Se tiu artikolo pruvis utila al vi iel ajn, b.v. helpu nin diskonigi ĝin, kaj kunhavigu vian opinion. Ne forgesu lasi vian komenton en la taŭga skatolo.

Plej amike, kun bondeziroj kaj antaŭdanko,

Maria Aparecida da Silva

www.religiodedio.org

Propagando por Esperanto

-
- **Juan Diego Díaz**

Bautista <jd.diazbautista@gmail.com>

Estimata kolego,

Se vi ricevis ĉi tiun mesaĝon, tio signifas ke vi estas parto de speciala grupo de homoj kiuj parolas Esperanton kaj agadas favore al ĝi, kaj kiuj certe havas almenaŭ unu el la jenaj aliroj por tion fari: (1) ŝaton, (2) intereson kaj/aŭ (3) etikan aŭ ideologian kialon.

Pro tio, antaŭ ol prezenti la kialon de ĉi tiu retmesaĝo, **ni volas danki vin** pro via penado kaj strebo por ĉi tiu komuna projekto kaj realaĵo nomata Esperanto.

PREZENTO. Mi estas Juan Diego Díaz Bautista, homo kiu loĝas en Sevilla (Andaluzio, Hispanio) kaj kiu nuntempe respondecas pri la verkado de Raporto 'Esperanto kaj Universitato' por ESF (esperantic.org), kiu estos prezentata dum Nitobe-Simpozio, tiuj post la Universala Kongreso en Lisbono 2018.

PRI LA RAPORTO. Nia aliro por esplori la nunan situacion de la rilato Esperanto kaj Universitato estas samtempe larĝasenca kaj konkreta per tri flankoj: (1) priskribi la nunan situacion de Universitato kaj de Universitato-kaj-Esperanto, (2) kolekti kaj registri informojn, kaj (3) proponi kaj sugesti paŝojn por agadi estontece. Nia celo estas kunpensi kiel disvastigi Esperanton kaj enkonduki ĝin en la Universitato. Kaj pro tio ni kontaktas vin.

KUNAGADO: Ĉi tiu retmesaĝo estas sendata al homoj el ĉiuj partoj de la mondo. Tiel, ni povas diri ke nia propono por vi por helpi kunpensi la rilaton Universitato kaj Esperanto estas **monda kunpensado**. Ĉu vi partoprenus en nia esploro? Oni ne bezonas ke vi estu universitatano aŭ laboristo de Universitato. Ĉiuj homoj povas kontribui. Se vi jesas al tiu respondo, ni dankus se vi:

(1) plenumas la jenan

demandaron: https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSfqrjA3pBiv8Bp-B742_XP_vMaDHDvtjoKSaM467-EbaCu7NQ/viewform?usp=sf_link

(2) dissendas ĉi tiun retmesaĝon inter viaj konatuloj kaj

(3) helpas nin plenumi diversajn datumlistojn: <http://kunagade.org/datumlistoj/>

PLIA INFORMO: kunagade.org

Antaŭdankon,

-
- **INA EDUKA MINISTERIO AKCEPTAS ESPERANTON KIEL BAKALAŬRAN EDUKADON**

Karaj IKEF-anoj,

Estas grava novaĵo, ke la ĉina eduka ministerio **akceptas Esperanton kiel bakalaŭran edukadon** por 4 jaroj. Tio signifas, ke post kvarjara studado de Esperanto la studentoj havos kvalifikon peti ŝtat-oficistan kandidatiĝon same kiel aliaj diplomitoj el la ĉina universitato.

Jes, antaŭ iom da jaroj jam **okazis edukado de 11 diplomitoj en ĉina komunika universitato**, tamen tiu studado servis nur por EPĈ kaj Ĉina Radio Internacia (ĈIR), kaj ĝi havas esencan diferencon kun ĉifoj permeso de la ĉina eduka ministerio, ĉar ĉifoj bakalaŭra edukado estas laŭ merkata regulo pli vaste serva al la tuta socio.

Antaŭ la oficiala peticio al la ĉina eduka ministerio estrinoj BA Yan kaj HAN Jianxia de Universitato Zaozhuang multfoje diskutis kun mi (IKEF), **ĉu vere ekzistas merkata bezono de esperantigitaj studentoj aŭ ne?** - ĉar EPĈ kaj ĈIR bezonos nur kelkajn diplomitojn! Mi informas pri IKEF ke ja ekzistas merkata bezono, kvankam ne granda. Mi respondis, ke se la klaso havos kelkdek studentojn, la diplomitoj povos trovi sian laboron. Por kuraĝigi ilian peticion mi proponis ke **la studentoj povos staĝe praktiki en esperantistaj kompanioj en diversaj landoj**, eĉ nia IKEF helpos ilian laborigon krom kelkaj en EPĈ kaj ĈIR. Finfine kiel prezidanto de IKEF mi ankaŭ subskribis praktikeblan atestraporton de fak-aŭtoritatulo nome de IKEF.

Jen nia IKEF ankaŭ kontribuis al ĉi grava starigo de Esperanto-bakalaŭra edukado en Ĉinio. Tamen ni devas scii, ke tio estas nur naskiĝo, kaj tia edukado ekzistas ankoraŭ dependonta al aplika aktivado de IKEF kaj aliaj fakaj Esperanto-organoj, ĉar la universitato ne volas subteni tian edukadon nur por kelkaj dungotoj ĉe EPĈ kaj ĈIR! Fakte, Ĉinio estas merkatisma lando pli ol kapitalisma lando. Ĉiu ekzisto dependas de la merkata bezono, ankaŭ Esperanto. Pro tio ni devas pli rapide konstrui aplikan sistemon de Esperanto kadre de IKEF.

Ĉu via lando jam havas filion de IKEF? Se ne, senhezite kontaktiĝu kun IKEF, mi petas.

Amike via, Chielismo
prezidanto de IKEF

(Mesaĝo de s-ro Chielismo Wang Tianyi, Tianyi Wang, Prezidanto de IKEF)

- Libro propagando
[Esperanto](#) - vera rakonteto de [Wacław Rekowski](#) 10/04/2018
- [For de miaj okuloj!](#) - rakonteto de [Wacław Rekowski](#) 10/04/2018
- [Malgrandulo](#) - rakonteto de [Wacław Rekowski](#) 10/04/2018
- [Mi parolas esperanto – mi pensas Bjalistoko, kaj Elmigrintoj mi, vi, li...](#) - du Mallongaj Eseoj de [Wacław Rekowski](#) 10/04/2018

[Reformo](#) - vera rakonteto de [Wacław Rekowski](#) 10/04/2018

- [Zumo](#) - rakonteto de [Wacław Rekowski](#) 10/04/2018
- [Dua birdo](#) - poemo de Natan Zaĥ. tradukis [Amir Naor](#) 06/04/2018
- [Kvazaŭ sonĝe](#) - poemo de [Maria Nazaré Laroca](#) 02/04/2018
- [Mir, la pluŝ-anasido](#) (pdf) - bildserio de [Luiza Carol](#) kaj [Liette Lêla](#) 28/03/2018
- [Planedo de la virinoj](#) (pdf, epub) - erotika scienc-fikcia novelo de [Till Taster](#) 27/03/2018

- [Atendado de printempo](#) - poemo de [Rita Mkrtĉjan](#) 22/03/2018
- [Pripensoj](#) - poemo de [Rita Mkrtĉjan](#) 22/03/2018
- [Mi ŝatas vivon](#) - poemo de [Rita Mkrtĉjan](#) 22/03/2018
- [Autuna folieto](#) - poemo de [Rita Mkrtĉjan](#) 22/03/2018
- [Mi ne kapablas ŝanĝigi ĉiujn](#) - poemo de Aramais Sahakjan, tradukis [Rita Mkrtĉjan](#) 22/03/2018

Amike, Amir kaj Eldad

- Muzeo de Luan Jaupi

Je 20an de aprilo 2018 vizitis min esperantisto el Durres, s-ro Luan Jaupi. Ekde junaĝo li fondis privatan muzeon multifacetan, kromalie ankaŭ esperantan angulon. Ĉi kaze mi donacis al ties muzeo pakaĵon da esperantaj eldonaĵoj restintaj ĉe mi ekde jaroj. (B.S.)

- **SEMAJNO DE ENIGMOJ - La unua gazeto de enigmoj en Esperanto!**

Ĝi enhavas klasikajn krucvortenigmojn, kriptan kaj silaban krucvortenigmojn, vortoserĉon, rebuson, aliajn vortopuzlojn, novaĵojn, kaj ceteraĵojn. Ĉefredaktoro de Semajno de Enigmoj estas Giorgio Denti, ankaŭ prezidanto de Roma Esperanto-Grupo. Abono estas SENPAGA. La aktualaj numeroj estas dissendataj retroŝte al la abonantoj.

Detaloj ĉe la retejo:

http://www.semajnodeenigmoj.com/informo_2.html

- Berto Ŝuman

La internacia vojo ESPERANTO

Naciaj aŭ internaciaj vojoj, tra la mondo, ekzistas multaj famaj vojoj :

la Vojo Sankta Jakobo de Kompostelo estas konata por pilmigradi,

la Vojo 66 por trairi la Usonon de oriento ĝis okcidento (3945 km) motorbikikle,

la Vojo Rikardo Leon´Koro (fama batalanto) por viziti kulturan kaj artistan heredaĵon,

la franca Nacia Vojo 7 pro sia beleco, la Vojo Via Domitia kiel unua vojo ligante la Alpojn kun la Pireneoj. Do, pro diversaj kialoj, kelkaj vojoj estas tre konataj.

Mia ideo estas krei la internacian vojon ; ESPERANTO danke al ZEOj.

Sed ĉu vi konas « ZEOj 1 » ? « ZEOj » ekzistas delonge sed, laŭ mi, ili ne estas sufiĉe konataj, bedaŭrinde.

Do, mi deziras inviti vin pripensi tion kune : kiel valorigi « ZEOjn » por krei la internacian vojon ESPERANTO ?

Eble ni povus publikigi libretojn kun ĉiuj « ZEOj » de la Mondo kaj fari pasporton,

kiu estus subskribita de la turismaj oficejoj aŭ la urbodomoj ?

Tiel la vojaĝantoj havus belegajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj kaj Esperanto estu pli konata en la institucioj.

Ĉu vi havas aliajn ideojn?

Bonvolu skribi al la ĵurnalo

Informaĵoj

- **Ufficio Stampa - Federazione Esperantista Italiana**
stampa@esperanto.it [albanaj-esperantistoj] <albanaj-esperantistoj@yahoo.com>

La kongresa temo estas "Malgrandaj komunumoj - grandaj valoroj". Unu el la grandaj valoroj de San Marino estas tiu de akceptado de enmigrantoj, ĉar la unuaj loĝantoj de San Marino estis rifuĝintoj el Kroatujo, kaj tion oni ne forgesis. Tra la historio San Marino daŭre donis ekzemplojn de sia akceptemo. Dum la lasta mondmilito ĝi akceptis pli ol 100 000 rifuĝintojn, dum la malriĉa loka loĝantaro konsistis el 13 000 homoj. Pri migrantoj, unu el la grandaj problemoj de Eŭropo, kaj pri la lastaj decidoj tiurilate de la Konsilantaro Granda kaj Ĝenerala (=Parlamento) de San Marino okazos publika debato en la itala kaj Esperanto por la loka publiko inter lokaj reprezentantoj kaj niaj fakuloj, inter kiuj Xavier Alcalde.

Se vi volas sperti publikan diskuton pri serioza temo en Esperanto kaj se vi volas vidi, kiel reagis al tio la neesperantista publiko, simple iru al <http://kongreso.esperanto.it/85/> kaj aliĝu.

Ni atendas vin. La LKK

- **Homeopatio kaj la debato pri la scienca scio! Kontakto 2018:2 en la reto!**



Saluton!

En la jaro 2010, nelonge antaŭ mia redaktoriĝo, aperis en Kontakto artikoloj pri Medicino (n-roj 236 kaj 237 — vi povas ilin elŝuti en la retejo de UEA), inter kiuj la bonega "Homeopatio: la diluita medicino" de Aleksej Vodovozov, Rusio, kiun tradukis kaj aperigis la tiama redaktoro, Paŭlo Mojaĵev. La tempo pasis kaj fine de la pasinta jaro mi ricevis novan artikolon pri homeopatio, ĉi-foje originale verkitan de Matthieu Desplantes. Denove la sama temo, pli-malpli samaj konkludoj: Ĝi ne funkcias!

Legante ĝin, mi tuj memoris pri la malnovaj numeroj kaj pensis ke ĉi-foje estus bone havi artikolon, kiu povus doni alian vidpunkton al la afero pri alternativaj kuracmetodoj. Tamen la klopodo ne vere sukcesis, anstataŭe, ne mankis kritikoj al la temo kaj ĉefe al homeopatio. Do mi decidis fari nekutiman aferon. Ĉar sano interesas min multe, mi faris esploron kaj verkis mem artikolon. Kaj en ĝi, mi klopodis informi iom pri la historio de la scienco kaj iom inversigis la demandon: Kial tiom da skeptiko? Kiel statas la ordinara kuraca sistemo? Ĉu ĝi estas tiom priferinda kiel ĝi sin montras?

Daŭre pri mia artikolo pri sano, tiu elpaŝo sukcesis nur ĉar mi ne devis multe zorgi pri la intervjuo rubriko, ĉar ĉi-numere faris tion Kévin Morel-Fourrier, kiu mem havis la iniciaton intervjui Romain Filstroff, kromnome Monté, kiu havas video-kanalon nomatan Linguisticae. Ĝi specifas pri lingvoj kaj lingvoscienco.

KontakTEK, nia rubriko pri teknologio, revenas ĉi-eldone, kaj du-foje sinsekve Jonas Marx plezurigas nin per videoludaj novaĵoj. La Blaga Blogo firme markas sian ĉeeston kaj István Ertl — evidente ankoraŭ korkreva — revenas al sia Tiel La Mondo. Mi persone dankas al li pro

la klopodo daŭre kontribui al nia modesta magazino. Mi pensas ke verkado povas esti efika helpo en tiuj mornaj situacioj. Al mi tio helpis kaj daŭre helpas, kvankam mi kompreneble ankoraŭ fojfoje revenas al la dezerto de soleco kaj doloro. Dankon al ĉiuj, kiuj verkis, verkas kaj ankoraŭ verkos por Kontakto!

La elŝutado de tiu ĉi numero eblas nur por abonantoj. Se vi ankoraŭ ne estas abonanto, vi povas tuj aboni ĝin per reta abonilo. Laŭ la nova reguloj, homoj ĝis 35 jaroj daŭre estas TEJO-membroj. La "novaj junuloj" jam povas elŝuti Kontakto-n, sed kun nepra kondiĉo, ke en la datumbazo de UEA estu registrita ilia naskiĝdato. Por elŝuti *Kontakto*: uea.org/revuoj/
Agrablan legadon Rogener Pavinski Redaktoro de Kontakto

Revuo kaj kursoj – aktiva landa asocio

Aperis duobla n-ro 164/165 de Israela Esperantisto. 56-paga, rete <http://esperanto.org.il/dosieroj/ie164-165.pdf>. La papera versio estas presata kaj sendota al pli ol 200 membroj en Israelo kaj eksterlande.

En ĝhia literatura parto aperas premiita novelo pri fantazia renkontiĝo inter la gefiloj de Zamenhof kaj Ben Yehuda (trad. A.Wandel), kaj la daurigo de la artikolo pri la judaj poetoj en Rusio (Mikaelo Bronŝtejn). Vendrede finiĝis Esperanto-kurso en mezlernejo en la urbo Modiin, kun 18 lernejoj de la 10a klaso

=====

- **Amo**



"Amo estas stranga sento" kantas en *Kion ajn* la sveda rovggrupo Persone. Kiu el ni neniam amis, pasiigis, suferis pro amo?

Ĉu amo estas nobla sento aŭ iluzio? Kemia elverŝo de substancoj aŭ ĉu instinka emo de la homo? Ĉu la amo finiĝas post iom da tempo?

Kiel trovi amon? Ĉu scienco povas helpi nin ami pli trankvile? Ĉu vi havas sperton pri amo, kiun vi ŝatus kundividi? Verku por *Kontakto*!

- **Donaco el Ĉinujo por la 200-a naskiĝtago – Mega-Markso por Trevero**

de Spiegel-online 5a majo 2018

Kvin metrojn alta monumento de Karlo Markso nun apartenas al la urba bildo de Trevero. La donaco el Ĉinujo estis senvualigita okaze de la 200-a naskiĝtago de la ekonomikisto – kaj zorgas ne nur por entuziasmo

- **La prezidanto de Ĉinujo pri la marksismo**

La marksismo estas la instrumento por atingi la estontecon”, asertis la ĉefa gvidanto de Ĉinujo, Xi Jinping, en sia laŭdo de Karlo Markso kiel „gvidanto de la homaro“ dum la ceremonio.

- **rdumain <rdumain@autodidactproject.org>**

Mirinde, okazas multaj eventoj memore al Markso en Vaŝingtono, ĉefurbo de blankula faŝismo kaj nigrula antisemitismo. Pluraj okazas sub aŭspicio de germanaj kulturaj kaj intelektaj institutoj, sed ankaŭ sub aŭspicioj de laboristoj kaj maldekstraj instancoj. Temas pri filmoj, ekspozicioj, teatraĵoj

Mi ĵus retrovis du tradukojn fare de Yurij Finkel:

E. V. Iljenkov: Markso kaj la okcidenta mondo

http://esperanto.mv.ru/Marksismo/eo/Iljenkov_Markso/iljenkov_markso.html

(La anglalingva teksto kiun mi enretigis estis cenzurita de la sovieta reĝimo. Finkel tradukis la aŭtentikan tekston publikigita en 1990.)

M. Rjutin: Stalino kaj krizo de la proletara diktaturo; Boris Starkov: M. N. Rjutin. Skizo de politika portreto (kun mallongigoj); El antaŭparolo de B. A. Starkov al la libro «Mi ne surgenuiĝos»

<http://esperanto.mv.ru/Marksismo/eo/Rjutin/rjutin.html>

Mi utiligis la naskiĝtagon de Markso plejparte per kompilado de bibliografio/gvidilo al la verkaro de la jugoslavia praksis-filozofoj, unu el la plej gravaj marksismaj skoloj, paneinta kiel Jugoslavio mem. Temas pri abundaj anglalingvaj fontoj (mi dubas ĉu esperantaj tradukoj ekzistas, sed eble ion mi maltrafis?):

- [Yugoslav Praxis Philosophy Study Guide](#)

Lastatempe mi kompilis anglalingvan bibliografian gvidilon pri la ĝenerale nekonata hungara marksista filozofo Andras Gedo (1932-??):

- [András Gedö — Vita \(Bibliography\)](#)

Mi sendis mesaĝon al la Hungara Akademio de Sciencoj, kompreneble ne plu marksisma, por enketi, ĉu Gedo ankoraŭ vivas, sed ne ricevis respondon. Ĉu iu el vi havas rimedon trovi informon ĉi-rilate?

Kiu tradukis la libron pri praksiso Esperanten? Mi ja volas rigardi tion, ankaŭ publikigi ĝin. Post la disfalo de Jugoslavio tiu grupo degeneris, eble iuj konservis iom da dececo. Stojanovic verkis multe anglalingve pri la fiasko de la lando. Pli interesas min la verkoj de tiuj homoj antaŭ ol tiu disastro.

Gedo verkis plejparte en la germana, sed ankaŭ iomete en la hungara. Mi havas eseon de li (tradukon, kompreneble) en la ĉina sed mi ne kapablas legi ĝin. Liaj verkoj aperis en angla nur pro la presejo de la komunistoj Erwin kaj Doris Marquit, kies Marxist Educational Press ne travivis post ilia morto.

Mi ĵus revenis hejmen el la Goethe-Institut, kie okazas pluraj eventoj pri Markso. Hodiaŭ mi vizitis por ĵazkoncerto sen rilato al Marks. Mi faris fotojn de mi meze de ekspozicio pri Markso kiu enhavas volumojn de la kolektitaj verkoj de Markso kaj Engels (en la germana) pendantaj de la plafono.

- io estas konata scio kaj en Italujo kaj en San Marino. Fakte la 31-a de majo kutime estas la lasta tago por aliĝi al la Itala Esperanto-Kongreso per rabatita kotizo.
Sed ne aliĝu nur pro la rabato en la kotizo. Aliĝu ankaŭ pro la programo. Ekzemple vi ne bezonas vojaĝi al malproksimaj Universalaj Kongresoj por trovi la kursojn de AIS, la esperantista universitato. Vi trovas ilin en San Marino, kie okazos samtempe kun la kongreso la Universitata Studsemajno de AIS, SUS 35, kun la jenaj kursoj:
 - Astrobiologio: la eblecoj por vivo ekster-tera (prof. Amri Wandel)
 - Shakespeare sojle de nova jarcento: Hamleto kaj poste (prof. Humphrey Tonkin)
 - Ĝenerala Lingvistiko (prof. Davide Astori)
 - Bioĥemio (prof. Ewa Boyadjeva)
 - Malgrandaj komunumoj kaj grandaj valoroj (prof. Javier Alcalde)Ni ne parolos al vi ĉi-foje pri la vesperaj kaj noktaj programoj nek pri la ne malproksima marbordo.

Iru al <http://kongreso.esperanto.it/85.modulo.htm>.

La LKK la 85-a Itala Esperanto-Kongreso atendas vin.

- **Hèctor Alòs i Font**

Александр Блинов <al.blinov@gmail.com>:

Estimataj kolegoj,

Mi volas veki vian atenton pri la aranĝo, kiun mi ogranizas la 9an fojojn en mia regiono Ĉuvaŝio (Rusio). Temas pri la ĉuvaŝa tendaro Haval, kies celo estas kunvenigi la homojn kiuj interesiĝas pri la ĉuvaŝa lingvo k kulturo, kaj kiuj eventuale emu antaŭenigi la ĉuvaŝan lingvon kaj kulturon. Krom lerni la lingvon fari prelegojn pri la temoj rilataj al la ĉuvaŝaĵoj ni regule faras aranĝojn eventuale interesaj por aktivuloj de aliaj nerusaj popoloj (tataroj, baŝkiroj, erzjoj, mareoj, udmurtoj ks), nome seminarioj pri sociolingvistiko, historio, IT-teknologioj kaj simile.

Cetere Esperanto estas fakte unu el la laboraj lingvoj de la aranĝo (kune kun la ĉuvaŝa kaj la rusa) kaj ankaŭ la angla. Averaĝe de kvarono ĝis triono de partoprenantoj parolas au komprenas Esperanton. Interalie ĉi-jare ni atendas koncerton de Jomo kaj tradicie prelegon de Hector Alos-i-Font.

Ĉi-jare la aranĝo okazas inter la 8a kaj la 15a de julio ĉe la rivero Sura apud la urbeto Jadrin.

Mi ĝojus inviti esperantistojn etnistojn kiuj eventuale povus prelegi pri la situacio de ilia lingvoj, rakonti pri siaj kulturoj au aliel kontribui al la programo.

La unusemajna partopreno kostas ĉiakraŭ de 100 ĝis 150 euroj (depende de la loĝ kaj manĝ-kondiĉoj). La inviton por ricevi vizon mi povus fari nome de mia ogranizo (lernejo de fremdaj lingvoj, kie mi laboras)

Aldonindas, ke nuntempe invito por ricevi vizon por viziti Rusion estas tute nenecesa por civitanoj de multegaj landoj de la mondo. Do plej verŝajne interesitoj ne devos multe zorgi pri tio.

Pri la aranĝo, kiun mi regule partoprenas de multaj jaroj kun mia familio, eblas diri, ke ghi estas tre interesa. En ghi estas chiam pluraj chuvashemaj esperantistoj el diversaj landoj, ech foje prelegantaj en esperanto, sed evidente en la aranĝo vaste superregas la chuvasha kaj la rusa.

Hektor

- **Maria Majerczak**

Saluton,

jen vere printempa inf.

Ĵus la universitato akceptis presi kolore kaj afiŝi en sia granda lingva centro kaj en iuj lernoĉambroj la afiŝon (ĉi-kune), en kiu la tulipo Esperanto per siaj nomo kaj neordinara aspekto devus altiri al E-o la atenton de la preterpasantoj. Krome, ĉiam floroj influas la sentojn. Ankaŭ, la afiŝtempo estas ĝusta, ĉar nun, ĉe ni, ĉiuj sopiras al la printempo, kiu ankoraŭ ne venis.

La afiŝo estas en E-o kaj la pola.

Trad. de la nur pola teksto:

Z A P R O S Z E N I E - invito

ZAPRASZAMY na naukę esperanta i do Koła Esperantystów UJ - *Ni invitas al lernado de E-o kaj al la E-Rondo de JU*

La afiŝo, pendigita sur muroj aperas apud gravaj tekstaj inform-afiŝoj kun kelkaj detaloj pri la E-kursoj, kiuj pendas tie jam plurajn monatojn, kaj kies intensiva rolo jam preskaŭ pasis, do necesas refreŝigo, alimaniere kaptado de la atento.

De kelkaj jaroj, ni praktikas preskaŭ jarlongan afiŝadon. Ĝuste antaŭ kelkaj tagoj tia afiŝo, pendanta en la universitato de septembro 2017, kaŭzis ke grava kultura institucio de la sudpollanda regiono Małopolska kontaktis la E-instruistaron en tiu universitato, Maria Majerczak, por peti ŝin kunlabori kadre de okazonta en majo vasta festo pri la nacia kultura heredaĵo de tiu regiono. La celo estas enigi E-on en la programon pro iu grava fakto. Pri ĝi mi devos iam skribi aparte. Ĉiukaze, estas jam decidite, ke okazos prelego pri E-o, disdonado de materialoj, lecionoj de la lingvo por multnombra neesperantista publiko ktp.

Konstanta informado ludas rolon. Parto de la E-studentaro aliĝas al kursoj nur post kelkfoja kontakto kun informoj pri la lingvo, pri kursoj. Laŭ lokaj spertoj, per publikigo de informoj oni ofte ne tuj kolektas fruktojn, sed semas por la proksima estonteco.

Se iu Leganto bezonas, deziras, plene rajtas uzi, adapti la kunsenditan afiŝon.--

La universitata E-rondo kunprenas la tulipo-bildon al la sekva granda Scienc-Festivalo, kiun ĝi ĉiujare partoprenas (2018 estas ĝia 13-a partoprenjaro). Kiel ĉiujare, la festivalo okazos en majo. La tulip-afiŝo, kun nova, laŭokaza enhavo, estos uzata kiel dekorajo.

Esp-istoj sentas **mankon de grandaj, koloraj art-afiŝoj** universalaj, adapteblaj al div. cirkonstancoj de varbado. La prezentantoj de la aliaj lingvoj en la Scienc-festivalo kaj aliloke montras buntecon de altnivelaj afiŝoj pri div. kulturoj. La movado, bedaŭrinde, ne havas grandajn, kolorajn, riĉenhavajn kaj arte altnivelajn, mendeblajn afiŝojn, vere montrindajn en publikaj aranĝoj. Do ni uzu tion, kion ni povas.

Amike

Artikoloj

- **LA ANGLA KAJ ALIAJ LINGVOJ EN SCIENCAJ PUBLIKAĴOJ**

Antaŭ kelkaj tagoj mi ŝerce skribis: Laŭ enketo pri gazetoj, kiuj akceptas nur anglalingvajn artikolojn, ĉiuj tie publikigitaj artikoloj estis verkitaj en la angla. Al simila rezulto venis alia enketo, kiu studis tiujn artikolojn, kiuj estas referencitaj de anglalingvaj indeksaj servoj. Ankaŭ ĉi tie montriĝis, ke la indeksitaj artikoloj, kiam la indeksa servo referencas nur anglalingvajn artikolojn, estis verkitaj ĉiuj en la angla. La instigo komenti la temon venis de la sekva artikolo: *The Dangers of English as Lingua Franca of Journals* (La danĝero de la angla kiel lingvafrankao de (sciencaj) gazetoj). Oni enkondukas la tekston per la rimarko, ke la scienco estas per tio damaĝata en la tuta mondo, laŭ la aŭtoroj Mary Jane Curry and Theresa Lillis

(<https://www.insidehighered.com/views/2018/03/13/domination-english-language-journalpublishing-hurting-scholarship-many-countries>). Ofte ŝajnas, ke la angla estas preskaŭ centprocente uzata en la scienco. La aŭtoroj raportas, ke proks. 27 000 sciencaj gazetoj estas referencataj en la indeksoj de la "Web of Science" (WoS, Scienca Reto), ekzemple en la ŝajne plej renoma "Science Citation Index" (Scienca CitadoIndekso). Pli ol 9 000 sciencaj gazetoj kun sciencista prijuĝo de artikoloj estas publikigataj en aliaj lingvoj; la franca (3500 gazetoj), la germana (2700), la hispana (2300) kaj la ĉina (1400) estas tiurilate gravaj lingvoj. Laŭ la aŭtoroj la plimulto de tiuj gazetoj ne eniras la ĝeneralajn citado-indeksojn, kio vivtenas la ideon ke la angla estus tutmonde la ĝenerala akademia lingvafrankao. Jen estas kiel ekzemplo indekso reta por hispanlingvaj artikoloj, <http://www.redalyc.org>. La problemo de publikigado en la angla estas interalie, ke la lokaj komunumoj (kiuj cetere financas la esploradon) havas tiam problemon legi la artikolon. Bedaŭrinde aldona publikigo en dua lingvo kelkfoje kreas kopirajtan problemon. Ni konsciu, ke la multa uzado de la angla lingvo ne estas nur sekvo de natura evoluo, sed ankaŭ de certaj reguloj kaj premoj, ofte preskaŭ ideologiaj. Antaŭ kelkaj jaroj mi legis artikolon de la tiama prezidanto de la Berlin-Brandenburgia Akademio de Sciencoj, kiu rakontis pri plendo: Tiun li ricevis de iu komisiono pri scienco, ĉar 20 % de la artikoloj de la Akademio-kunlaborantoj estis verkitaj ankoraŭ en la germana kaj nur 80 % en la angla. Mi plene konsentas kun li, ke ne ĉio devas esti verkita en la angla; tio estas simpla forĵeto de labortempo kaj efikeco - ĉefe, kiam temas pri aferoj forte ligitaj al Germanio. Sufiĉas de tempo al tempo verki pri tio angle, iom superrigarde. Ankaŭ en universitataj lekcioj oni ofte uzas la anglan antaŭ studentaro plejparte germanlingva. Mi nomas tion "moderna malraciigo", ĉar laŭ mia takso kutime la docento sukcesas esprimi en difinita tempo en la angla nur eble 90 procentojn de tio, kion li aŭ ŝi povus esprimi en la germana. Simile la studentoj sukcesas verŝajne kapti nur proks. 90 procentojn de tio, kion ili kaptus kaj memorus, se la lekcioj estus en la angla. (Oni scias, ke enhavo legita aŭ aŭdita en fremdlingvo restas malpli bone en la memoro.) Sume mi supozas, ke la ideologie ordonita uzado de la angla en multaj kazoj signifas malraciigon, perdon de efikeco de almenaŭ 20 %. Kontraste mi tre bonvenigis la metodon de profesoro mia: Li enkondukis siajn lekciojn por progresintaj studentoj (90 minutoj) per 10-minuta resumo de la antaŭa lekcio. Bela kompromiso por enkonduki nin en la sciencan lingvaĵon kaj tamen gardi Eŭropa Bulteno Marto 2018, No 179 la efikecon. Jes, mi konscias, ke tio ne solvas la problemon de studentoj ne sciantaj la germanan - sed kiom da ili fakte estas? Laŭ mia impresoj oni ĝenerale subtenas la anglan interalie ĉar oni ne vidas realisman alternativon. Pri Esperanto granda parto de la lingvistoj, de la ceteraj sciencistoj kaj de la publiko kredas komplete erarajn misinformojn. Kolekto de tiaj eraroj kaj mitoj pri Esperanto troviĝas ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto#Eraroj_kaj_mitoj_pri_Esperanto . Aktualaj kazoj aperas en la grupo "Stop talking down Esperanto", <https://www.facebook.com/groups/250353055389540>. Tiom longe, kiom ni

Esperantoparolantoj ne energiplene laboras por diskonigi la veran situacion de Esperanto kaj de ties uzado, en sciencaj kaj ekstersciencaj rondoj, ni havu neniun esperon pri iom pli granda progreso kaj mildigo de la problemo. La ideoj, kiujn homoj havas pri la mondo, estas la bazo de iliaj agoj; necesas ke la homoj havu realisman bildon pri Esperantujo.

Lu Wunsch-Rolshoven Gazetara komisiito de GEA, ĉeforganizanto de NR

- **200-a jariĝo de Karl Markso**

Paul Jonson -**Intelektuloj**

Karl Markso

p.66

Markso sukcesis esprimi sian talenton, uzante escelente epigramojn kaj aforismojn, el kiuj multaj ne estis siaj kreaĵoj. Tiel li luis de Marato diraĵojn:.

Proletoj ne havas patrion

Proletoj havas nenion por perdi, krom siajn katenojn!

Fama ironia imaĝo pri burĝaro, portanta feŭdan stampon sur postaĵoj estas ricevita de Heine, same la diraĵo:

Religio estas opio por popoloj

Lui Blank luigis al li sian maksimumon:

De ĉiu laŭkapable, al ĉiu laŭbezone!

De Karl Ŝaper Markso luis:

Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!

kaj de Blanko diraĵon:

Diktaturo de proletaro

p.74

La stilo de Markso ne apartenas al esploristo- li apenaŭ citas ekzemplojn, nek starigas faktojn kontestantaj sian teorion, sed prezentas nur tiujn kiuj suportas klare aŭ pruvas tion kion li konsideras vera, definitiva.

Lia metodo baziĝas nur sur postulado, ne esplorado, postulado de io proklamita kiel perfekta vero, pri kio li estas konvinkita ne kiel sciencisto, sed kiel religiulo.

p. 80

Do, Markso apenaŭ povas konsideriĝi iam kredinda.

p.84

Lenin, Stalin kaj Maŭ Ze Dong, kiam alvenis ilia momento, praktikis je giganta skalo tiun perforton kiun Markso eskperimentis en sia animo kaj kio fontas el siaj verkoj.

- Vilhelmo Lutermano

Mi limigas min respondi nur al unu el tiuj fama citaĵoj, nome: "Religio estas opio por popoloj". Markso ne diris tion.

Li skribis: "Religio estas opio DE la popolo". Ŝajnas, ke la alia versio estas de Lenino.

Vilhelmo Lutermano.

- **UEA: Tempo por reelpensi**

En decembro pasintjare mi sendis al ĉiuj membroj de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio la suban artikolon, celitan por stimuli veran kaj efektivan diskutadon pri la nuntempa krizo en la asocio. Mi ne ricevis reagon. Estas nun la momento por dissendi al homoj pli vaste, ĉar ĉu aŭ ne vi mem estas membro de UEA, la afero signas ion pli grandan ol UEA mem. La tuto de la Esperanto-movado estas en granda danĝero. Mi esperas, ke ĝi utilis por tiuj kiuj vere volas progresigi Esperanton kaj la Esperantismon.

La jena analizo haveblas ankaŭ en formato PDF laŭpete.

Kore salutas Ian Fantom

La nova redaktora duopo de la revuo 'Esperanto', la periodaĵo de Universala Esperanto-Asocio, estas gratulinda pro la ĝisnuna laboro farita por vigligi la revuon. Nun estas bezonataj pluaj reformoj en UEA.

La nuna situacio rilate al la Centra Oficejo kaj la Estraro estas absurda. Demisiis la Kongresa Asistanto, Tobiasz Kaźmierski, dirante, "La Estraro de UEA venis kun novaj, foje komplete absurdaj ideoj, kaj la Direktoro verŝajne ne kapablis simple diri 'ne'". [1] Tio ne mirigas min. Mi mem suspektis, kiam la Estraro en Lille en 2015 anoncis la enoficigon de la plej juna el la kandidatoj, ke ili deziras iun kiu ne kapablas diri 'ne'. Tobiasz mem skribis, ke tio "ekde komenco ŝajnis esti stranga ludo aŭ malamuza ŝerco de la Estraro". Li skribis ekzemple pri la leterpapero, de kiu malaperis mencio de Unesko kaj UN. Laŭ La Libera Folio la Direktoro malaperigis tion "proprainiciate", sed laŭ la sama raporto la prezidanto mem defendis tiun malaperon, dirante, ke UEA uzas "malsamajn versiojn de la leterpapero depende de la celatoj". [2] Evidente la Estraro prenas respondecon.

Sekve de tio la Estraro anoncis, ke ĝi anstataŭos ŝin pere de la Ĝenerala Sekretario, Martin Schäffer, do unu el la Estraranoj. [3] [4] Kian sencon havas tio? Ĉu tio ne signifas, ke la Centra Oficejo estos des pli en la manoj de la homoj kiuj "venis kun novaj, foje komplete absurdaj ideoj"?

Financa strategio

Cetere, ĉu ne la respondeculoj por la financa strategio de UEA estas la Estraranoj mem? La rolo de la Direktoro estas plenumi la decidojn de la Estraro, ĉu sencohavaj aŭ ne. Se oni havas dubojn pri la "foje komplete absurdaj ideoj" oni ŝanĝu ne la dungitojn de la Centra Oficejo, sed la Estraranojn de la asocio. Se oni volas havi kompetentan financon konsilon oni petu tion de financaj konsilistoj. Kaj kie estas la Komitato de UEA en tiu afero? Ĉu ili ne devus havi voĉon en la financa strategio de UEA, kaj en aliaj gravaj decidoj de la asocio?

Tiu anonco aperis ĵus post kiam laŭ La Libera Folio, "La komitato de UEA akceptis buĝeton kun enorma deficino". [5] La artikolo citis la antaŭan prezidanton Renato Corsetti jene: "Por mi ne gravas, ĉu la komitato nun aprobas aŭ malaprobas la katastrofan buĝeton. Por mi gravas, ĉu NUN la estraro akceptas iun komitatan labor-grupon, kiu kune kun la financa komisiono, eklaboras por redakti la financon planon por reekvilibrado de la asociaj financoj. Mi resubstrekas, ke en tiu laborgrupo estu reprezentataj ĉiuj tendencoj, de Edvige al Loes, por doni ekzemplojn. Komprenoble, inter veraj homoj, se la estraro ne faras tion kaj simple provas gajni tempon, ĝi povas ankaŭ demisi en sia tuto, tiel ke en Lisbono oni faru la kompletan reelekton". Finfine la grupo uea-membroj havis ian influon, ĉar tie mi argumentis ĝuste por novaj elektoj en Lisbono.

Ĉu tio montras kompetentecon, kiun oni nun volas transigi de la Estraro al la Centra Oficejo?

Konsiderante la gravecon de la financoj, ĉu ne estas strange, ke oni ne havas apartan Estraranon pri Financoj, anstataŭ kombini financojn kun la aliaj taskoj de la Ĝenerala Sekretario? Ĉu ne estas ankaŭ strange, ke el ĉio kion mi ĝis nun legis pri la afero, neniu eĉ demandis, kiajn financajn kvalifikaĵojn havas Martin Schäffer?

Sablo en la okuloj

La Estraranoj estas elektitaj por antaŭenigi la celojn de la asocio, kaj ne devus mem profiti el sia laboro. Se la Estraroj de mia landa asocio de UEA tiel agus, sub angla juro, ili agus kontraŭleĝe. Tamen estis konstante malfacile libere diskuti pri tiaj aferoj, ĉu en uea-membroj, ĉu aliloke. Estas kvazaŭ la temo estas ofenda aŭ pro iu kialo tabua. Plue, la Estraro distancigas sin de uea-membroj, dirante ke ĝi ne estas 'oficiala' listo de UEA. Tiukaze kial ili rajtigas la administrantojn aliri la membraran datumbazon? Estas preteksto. Ĉu aŭ ne ĝi estas oficiala, ĝi estas la ĉefa komunikilo kun la membroj. Kiam mi respondecis pri la landa informado interagi kun la membraro estis unu el miaj ĉefaj prioritatoj; alia estis interagi kun la ĵurnalistoj kaj la publiko.

Sub artikolo 'Mark Fettes: "Ni ĉiuj konscias pri la granda laboro antaŭ ni"'[6] en La Libera Folio, iu Jovana skribis interalie, "La 'intervjuoj' en Lillo estis nur sablo en la okuloj de la naivuloj, kiuj ne sciis ke la decido estis farita jam antaŭ la Lilla UK". Mi aldonis komenton: "Tute prave: 'sablo en la okuloj de la naivuloj'. Mi pensis tiutempe, ke ili eble enoficigis la plej junan kandidaton por ke ili povu manipuli ŝin. Veronika verŝajne estis la plej pozitiva Direktoro kiun UEA havis dum multaj jaroj". Tiu komento mia estis forviŝita de la moderiganto.

Gbeglo Koffi skribis: "Martin jam delonge gvatas tiun postenon de Ĝenerala Direktoro. Jen nun li havas ghin. Jam antaŭ la foriro de Osmo, Martin flustris sian intencon esti ĝenerala direktoro kiam neniu jam kandidatighis. Kiam pluraj homoj kandidatighis kaj Martin trovis, ke tiuj [kandidatoj] estas pli bonaj ol li, je li kashis sian intencon. Se nun li revenas por kapti la postenon, tio signifas, ke li nun realigas tion, pri kio li pensadas delonge. Tio klare montras, ke VERE IO KASHIGHAS MALANTAU LA SUBITA ANONCO PRI LA NOMUMO de Martin. Ni vidos kio okazos poste. Do JOVANA tute pravas". Al tio mi respondis: "Bona observado, Koffi! Surbaze de tio, via konkludo certe estas pravigebla. Mi mem opinias, ke oni devus tuj voki elekton por la TUTA Estraro kaj demonstri justan kaj malkaŝan elektoproceduron por nova Estraro – sub nova prezidanto – en la venonta Universala Kongreso". Tiu komento mia estis forviŝita de la moderiganto.

Lu Wunsch-Rolfshoven skribis pli longe, komencante per, "Eble la kerna problemo de UEA estas, ke ĝi volas pli ol ĝi povas". Mi respondis: "Kaj eble la problemo estas io alia. Povus esti, ke iu faris plentempan esplorprojekton ĝuste pri la nekongruaĵoj kiuj aperis en la Esperantomovado, kaj estis silentigita, ĉar la temo estas tabua. Mi scivolas kiu. Mi ne volas skribi pli ol tio ĉi tie, ĉar mi tro ofte estis cenzurita, sed se vi volas scii pli, skribu al mi private (persona nomo

ĉe familia nomo punkto co punkto uk)". Tiu komento mia estis forviŝita de la moderiganto.

Makiavelaj metodoj

La retroŝta diskut-grupo uea-membroj apenaŭ estas pli bona. Iam mi skribis, "Lu ne estas stultulo sed inteligenta homo". Pro tio mi estis riproĉita de la moderigantoj pro uzo de 'insultvorto'. Daŭre estas malfacile levi tiujn tabuajn temojn. Kiam mi unue aŭdis la sugeston, ke Mark Fettes fariĝu Prezidanto de UEA mi estis subtenema. Sed sekvis longa silento, kaj mi fariĝis scivolema, do mi demandis en uea-membroj simple, "Kiu estos la venonta prezidanto de UEA?". La atenditaj mokaj kaj deflankigoj venis tuj, sed mi persistis, ĝis fine evidentiĝis, ke iuj el la obstaklantoj sciis dum la tuta tempo, ke la decido estis jam farita. Tuj mi sciis, ke estas io malĝusta, kaj provis averti pri tio. La posta strategio de konstanta parolado pri trejnado de membroj por iu glora epoko en la estonteco, kiam oni povos utiligi armeon da aktivuloj trejnitaj de UEA por antaŭenigi Esperanton ŝajnas al mi misdirektita. UEA ĉiam havis riĉan fonton da spertuloj tuj pretaj helpi en efektivaj agadoj kaj kampanjoj.

Dum mi verkis tiun ĉi raporton mi ricevis de la redaktoro de Heroldo de Esperanto cirkulaĵon kiu demandis: "UEA estas niaj plej forta kaj grava asocio kaj ĝi nepre bezonas rapide superi sian krizon, sed unue estas necese bone difini el kiuj trajtoj konsistas tiu krizo? Nu, esence el kio konsistas la UEA-krizo, viaopinie?" Li daŭrigis: "Ĉu vi kapablas difini klare kiuj estas en ĝeneralaj trajtoj la funda(j) kaŭzo(j) laUEA- krizo? Ĉu temas pri nur efekto de pli ĝenerala krizo de la nuna modelo de la Esperanto-movado? Ĉiuokaze, kiel UEA-povas superi la krizon kaj denove fariĝi granda kaj tre influa E-asocio?" Konsiderante ke mi antaŭvidis la nunan situacion antaŭ jardeko, vidinte ion similan en mia landa asocio, en kiu rolis iuj gravuloj de la internacia movado, kaj provis daŭre atentigi al la homoj pri la signoj, mi sentis min kvalifikita por respondi. Sed mi havis ankaŭ jardekon da spertoj provi diri al homoj aferojn kiujn ili ne volas aŭdi, kaj mi sciis ĝuste kiajn reagojn mi povus atendi. Plue, la redaktoro de Heroldo estas Fabricio Valle, eksa redaktoro de 'Esperanto', kaj partoprenanto en uea-membroj. Do kvankam mi jam estis meze de ĝuste tia analizo, mi respondis, "Vi ĉiuj scias pri miaj kontribuoj dum la pasintaj dek jaroj en uea-membroj kaj aliloke. Nun vi ĉiuj kondutas kvazaŭ vi ne povas imagi la kaŭzon de la nuna ĥaoso. Miaj mesaĝoj ĝenerale ne estas aprobataj kiam ili havas faktojn kaj ciferojn, do tio apenaŭ faras diferencon. Almenaŭ mi volis sugesti al la homoj, ke ili atentu kaj ekpensu serioze pri la afero por si mem, anstataŭ ŝajnigi ke ili neniel povas imagi la kaŭzon de la problemo". Mi aldone demandis, kio okazis al la artikolo kiun li komisiis de mi, pri kiu li skribis ke li estas kontenta, sed serĉas iun por meti 'la alian flankon'.

Mi sendis kopie al uea-membroj. Unu membro skribis, "Tre trafajn punktojn kara Ian", kaj alia skribis, "Mi ege bedaŭras ke en tiu ĉi listo venas multe pli da kvereloj ol da ideoj kaj solvoj". Mi provis klarigi, ke la sinteno de Esperantistoj similas al generalo kiu gvidas armeon kaj diras, ke estas bedaŭrinde, ke estas aliaj kiuj kontraŭas lin. "Tiu kvereloj estas instigitaj kvereloj, tute

same kiel okazis en ĉiu generacio post 1887", mi skribis, kaj detaligis komunajn elementojn inter la diversaj skismoj de la movado. "Se Esperanto estas movado, ni devas atendi tiajn aferojn, ne tutsimple bedaŭri pri ili kaj ignori la skoltojn kiuj provas averti kio kuŝiĝas en la ĉirkaŭaj kampoj", mi skribis.

De Heroldo mi ricevis pluan cirkulaĵon: "La redakcio de Heroldo de Esperanto forte bedaŭras, ke propono pri diskutado de la nuna krizo, ne nur en UEA sed en la tuta E-movado, estis kialo por tuja starigo de diskutoj pri pasintaj problemoj, kiuj tute ne kontribuos por la prilumado de niaj nuntempaj defioj, ĉu de UEA, ĉu de la landaj asocioj, ĉu de la fakaj asocioj, ĉu ankaŭ de Heroldo ktp.", kun aparta noto al mi, dirante, ke li inkluzivis min, ĉar mi "ĉiam plendas, ke miaj mesaĝoj ne estas akceptitaj". Sed tiel ne estis; mi tutsimple persistis malgraŭ la evitemo, deflankigoj, moketoj, kaj falsaj akuzoj de insultado, kiujn uzis iuj membroj por subpremi gravajn diskutojn. Ni havas esprimon en la angla 'control the narrative' [regi la rakonton], kio signifas, ke oni transprenas la klarigojn, kaj tordas ilin por la propraj celoj. Ĝuste tion oni provis fari en la Estraro de mia landa Esperanto-asocio, post kiam ili decidis, ke mia sola rolo estu esploro pri la longdaŭra malkresko en la nombro de membroj. Sed mi ne permesis al ili. Pro tio ili plendis, ke mi ne volas kunlabori kun la komitato. Ĝuste tion nun faras la redaktoro de Heroldo. Mi respondis al Heroldo, "Mia tuta tezo estas, ke se oni ignoros la historion oni neniam lernos el ĝi, kaj oni neniam solvos la problemojn".

Raŭmismo

La artikolo pri kiu mi demandis estis artikolo komisiita de Fabricio por la revuo 'Esperanto'. Li petis al mi verki pri Raŭmismo, sed sen mencii nomojn. Tio ŝajnis neebbla tasko. Kiel oni verku pri Raŭmismo sen mencii la nomon Giorgio Silfer? Kaj kial? Ne venis al mi kiel surprizo ke li volas iom post iom raporti pri Silfer, la Esperanta Civito, kaj Raŭmismo, sed venis kiel surprizo ke li volas uzi min por tion komenci. Mi pridormis la aferon, kaj venis kun solvo: 'Raŭmismo sen nomoj'. Mi provis prezenti ĉiujn flankojn en nerefutebla maniero, por ke li ne facile uzu tion kiel lanĉilon por pluaj raportoj. Li reskribis, ke li estas kontenta pri la artikolo, sed ke li volas trovi iun por meti "la alian flankon" antaŭ ol publikigi. Kaj nun, demandita pri ĝi, li diras ke nenion li memoras pri la afero. Se tiel estus, ĉu oni ne supozus, ke li petus vidon de la artikolo por konsidero por Heroldo? Kaj ĉu tio ne provizus pruvon ke mi kapablas verki kohere kaj racie, io kion li ŝajne nun neas?

La kialo ke mi ne miris pri la provo enkonduki la Raŭmismomon estas, ke tion mi suspektis esti malantaŭ la provo forigi Stanon Marček el la posteno de redaktoro en 2010. Kelkaj el ni opiniis, ke iuj jam havas la nomon de iu en la menso por la antaŭvidita posteulo, kaj dum tuta jaro mi petadis en uea-membroj pli da informoj pri tiu atenco. La evitemo estis bona indiko, ke iu havas ion por kaŝi. En tiu tempo Fabricio eĉ ne estis membro de UEA. Certe mi venis jam en 2005 al la ideo, ke la Raŭmismo estas en la centro de la problemoj, dum mi havis okazon pridemandi

homojn kiujn mi jam dum jaroj konis, kaj povis vidi per iliaj evitoj kaj deflankigoj ian simpation kun tiu movado. Similan impreson mi gajnis ankaŭ en UEA. En Lille iuj eĉ invitis Silfer al la UK, kaj la Prezidanto donacis libron de Silfer al Osmo Buller. Ĉu estis kredeble, ke Buller tiom malestimis Silfer kiom oni supozis?

Lastatempe furoris diskuto en uea-membroj pri asertoj de iuj, ke Esperanto bone fartas, kaj ke la nombroj kreskadas. Tio en mia lando ne estas kredebla, kaj tia propagando nur forturnos la homojn. Mi mem havas pli da sukceso dirante pri la situacio kia ĝi estas. Subite, neatendite, aperis artikolo en Guardian, asertante ke Esperanto kreskas. Kia koincido! La Esperantistoj estis ravitaj. La artikolo atribuis tiun sukceson al la landa asocio, kiam ni ĉiuj scias, ke la etaj progresoj ŝuldiĝas al la laboro de Renato Corsetti en Londono. Guardian estas en iuj rondoj konsiderata 'regata opozicio', en tio ke ĝi raportas pri relative negravaj aferoj sed evitas aŭ minimumigas la vere grandajn skandalojn. Tiu artikolo ŝajne helpas en la defendo de la gvidantoj de la landa asocio, kiu ankaŭ kondukas kvazaŭ 'regata opozicio', laŭ miaj esplorrezultoj de 2005. Estas nenio en tiu raporto por indiki ke la tuta afero ne estas falsaj novaĵoj, speciale en la manko de ciferoj aŭ konkretaj rezultoj.

Kiam mi afiŝis pri tiu raporto en la grupo 'reago', kiu laboras por reagi al artikoloj pri Esperanto en la gazetaro, Fabricio skribis, ke Heroldo raportos pri "Esperanto en la gazetaro". Bone, sed tio ne rilatis al tuja reagado al gazetartikoloj, sed nur reklamis Heroldon. Mi skribis, ke ankaŭ Heroldo estas 'regata opozicio' – kvankam mi intencis skribis 'kondukas kvazaŭ ĝi estus 'regata opozicio' en senco ĵus priskribita, gajnante regon de la rakonto, por minimumigi diskuton pri la veraj skandaloj. Li eksplodis, kun buŝpleno da insultvortoj kaj falsaj akuzoj. Tio ilustras la klassistemon en Esperantujo, ĉar en neniam ajn cirkonstancoj io tia estus permesebla se mi farus. La politika korekteco funkcias nur desupre malsupren.

La fonto

Frue en 1974 mi demandis al Ivo Lapenna, "Ĉu povus esti, ke la fonto de la nunaj atakoj estas la sama fonto kiel tiu de la Afero Connor?" Li respondis, "Tiu estis malbona afero, sed mi opinias ke ne ... ke mi estas kaptita inter martelo kaj amboso". Por mi la ŝoka afero estis, ke dum kvar jaroj mi estis ĉiusemajne inter homoj en Londono, kiuj certe bone memoris tiun aferon, sed neniam ajn diris eĉ unu vorton pri ĝi. Mi eltrovis nur kiam mi traserĉis dudek jarojn da revuoj por kompreni la tiutempajn antagonismojn. Se la homoj ne scias pri tiaj aferoj, kiel ili povas iam ajn lerni el la historio? Nur tridek jarojn poste, kiam okazis io simila al mi en la brita movado, mi komprenis tiun puĉon. Estis eĉ enplektitaj iuj el la samaj homoj.

Homoj ne ŝatas paroli pri tiaj aferoj, ĉar ili timas, ke tio forpelos membrojn, sed ili malpravas. La plej bona maniero perdi membrojn estas neniam lerni el la historio kaj daŭre ŝajnigi ke ĉio estas glora sukceso. Iam ĉe postenintervjuo la personara estro diris al mia estonta estro, "Montru al li vezikojn kaj ĉion". Mi akceptis la postenon sur tiu bazo, kaj tiun strategion ni nun devus

antaŭenpuŝi en UEA. Mi mem povas pli sukcese prezenti Esperanton inter la publiko, se mi montras 'vezikojn kaj ĉion', same kiel mi faris en la sepdekaj jaroj, kiam grupo kiun mi gvidis triobligis la gazetarajn menciojn en tri jaroj, kaj sukcesis varbi pli ol duonon de la parlamentejo al la Esperanta Parlamenta Grupo.

Estas kvazaŭ en ĉiu generacio iuj senkapigas la movadon; iu ajn kiu havas elstaran sukceson estos 'faligita'. Estas tempo por reelpensi la tutan aferon, sub gvido de malsamaj personoj.

Ian Fantom
Britio

Vojaĝoj

- Fotoreportaĝo de prof. So Gilsu
La vojo al Maratono, la urbo en Atiko,

fama pro la venko de la Atenanoj super la persoj, estis tra serpentuma montara vojo. ĉe la fino de la vojo aperis belega orienta maro de Grekio. hieraŭ okcidentan kaj hodiaŭ orientan –maron mi brakumas. Mi fine vidas kolorigitajn foliojn de la aŭtuno
Kontraŭsupoze la muzeo estis malgranda kun nur 2 oficistoj. La ruino fakte ne havis rektan rilaton kun Maratono, sed estis la antaŭhistoria. Mi tamen trovis 2 ceramikaĵojn el la eksponitaj artefaktoj. La ruino de tomboj en 2000~1600 a.K. estis bone konservitaj.

La plej malfacile estis trovi la muzeon de Atena Universitato, kiu situas malataŭ la Akropolo. kiam mi alvenis tien tra malvasta vojeto, sur la fermita pordo pendis la anonco “hodiaŭ la muzeo estas fermita pro la feria tago Politekniko.” Kio estas la ferio Plitekniko? mi tute ne sciis antaŭ la vizito, kaj fine eksciis.

En Grekio finis la militista diktatoro, kaj socialisma reĝimo ekhavis la potencon, kion Usono malŝatis, kaj pere de CIA helpis starigi la militistan registaron.

En 1973 studentoj kaj civitanoj manifestaciis kontraŭ la registaro, kaj ĝuste en la tago la tanko atakis la Politeknikon por disigi la manifestacio, pro kio multaj estis mortigitaj kaj vunditaj. Grekoj ankoraŭ memorferias la aferon.

Pro la neatendita ferio, mi ne povis viziti la unuan celon. bedaŭrinde, ĉar en la muzeo troviĝas aparte diversaj artefaktoj el la tuta Grekio, kiujn arkeologoj de univ. elfosis.

Kiam ni aĉetis ombrelon, la vendisto rifuzis ricevi la monpaperon kiun mi donis, ĉar tio estis malvera. Mi iris al biletistino de Agora muzeo, kaj ŝi donis alian. Feliĉe ŝi memoris min, ĉar tiel malmultis la azia maljunulo en la neturisma sezono.

La giganta muzeo Akropolo, ankoraŭ strikte malpermesas foti same kiel antaŭ 3 jaroj. Mi ne fotis, ĉar mi jam fotis nepre necesajn antaŭ 3 jaroj.

Mi ege klopodas ne aĉeti la fotolibrojn tiel pezajn dum al vojaĝo. sed mi aĉetis vere dikan kaj pezan libron “Partenono” en la lasta tago de la vojaĝo, ĉar ĝi enhavas tre detalan klarigon pri la

konstruaĵo, kiu donos al mi la scion pri la uzo de svastikoj ĉe la tegmento.



svastikoj en la metro-stacio.

En la stacio de metroo en Seulo troviĝas modernaj svastikoj, sed la svastiko en Atena metro-stacio oni eksponas verajn artefaktojn antikvajn.



Vespere komenciĝas manifestacio de civitanoj sur la strato sen trafiko, kaj ni komencas ripozi en hotelo.



En Ateno taksio pli malmulte kostas por viziti muzeojn proksimajn por du personoj ol metroo. la nacia muzeo de Ateno estis nove aranĝita kompare kun lasta vizito antaŭ 3 jaroj.

Χρονολόγιο Chronological Chart



ΧΑΡΤΗΣ ΤΗΣ ΕΛΛΑΔΑΣ / ΘΕΣΕΙΣ ΠΡΟΪΣΤΟΡΙΚΩΝ ΧΡΟΝΩΝ

MAP OF GREECE / PREHISTORIC SITES



6000 π.Χ.
3200 π.Χ.)
1100
3200 BC)

Ακρόπολη III
600 π.Χ.)
1100
600 BC)

Υστεροελλαδική III'
(1200-1100 π.Χ.)
Late Helladic III C
(1200-1100 BC)



- ΠΑΛΑΙΟΛΙΘΙΚΗ ΕΠΟΧΗ
PALAEO-LITHIC ERA
- ΜΕΣΟΛΙΘΙΚΗ ΕΠΟΧΗ
MESOLITHIC ERA
- ΝΕΟΛΙΘΙΚΗ ΕΠΟΧΗ
NEOLITHIC ERA
- ΠΡΩΙΜΗ ΕΠΟΧΗ ΤΟΥ ΧΑΛΚΟΥ
EARLY BRONZE AGE
- ΜΕΣΗ ΕΠΟΧΗ ΤΟΥ ΧΑΛΚΟΥ
MIDDLE BRONZE AGE
- ΥΣΤΕΡΗ ΕΠΟΧΗ ΤΟΥ ΧΑΛΚΟΥ
LATE BRONZE AGE

1. Παροβρύση / Parosia
2. Παλιόβρυση / Paliovrysi
3. Θέρμη / Therme
4. Πατρόβρυση / Patrovia
5. Νέα Βασιλειάδα / Nea Vasiliada
6. Καταπίνα / Katapina
7. Αποτρογγίλινα / Apotrongilina
8. Ουσιότοπος / Osiotopos
9. Μαρμαριόβρυση / Marmariovrysi
10. Δορυ / Doru
11. Κατακόλι / Katakoli
12. Κατακόλι / Katakoli
13. Λαονακόλι / Lاونakoli
14. Αλιά / Alia
15. Στενά / Stena
16. Ουροβρύση / Ovrovrysi
17. Φίλι / Filia
18. Βάβα / Vava
19. Μόνινα / Monina
20. Αρβίνα / Arvina
21. Μαρμαριόβρυση / Marmariovrysi
22. Μαρμαριόβρυση / Marmariovrysi
23. Στενά / Stena
24. Στενά / Stena
25. Μαρμαριόβρυση / Marmariovrysi
26. Μάρμα / Marma
27. Τριόβρυση / Triovrysi
28. Νουβίνα / Nuvina
29. Πυροβρύση / Pyrovrysi
30. Φυλάβρυση / Fylovrysi
31. Κασσάβρυση / Kassavrysi
32. Τριόβρυση / Triovrysi
33. Μαρμαριόβρυση / Marmariovrysi
34. Πυλάβρυση / Pylovrysi
35. Κόρυβρυση / Korivrysi

36. Μαρμαριόβρυση / Marmariovrysi
37. Θυροβρύση / Thyrovrysi
38. Βασιλειάδα / Vasiliada
39. Αλιά / Alia
40. Αλιά / Alia
41. Στενά / Stena
42. Στενά / Stena
43. Στενά / Stena
44. Στενά / Stena
45. Στενά / Stena
46. Στενά / Stena
47. Στενά / Stena
48. Στενά / Stena
49. Στενά / Stena
50. Στενά / Stena
51. Στενά / Stena
52. Στενά / Stena
53. Στενά / Stena
54. Στενά / Stena
55. Στενά / Stena
56. Στενά / Stena
57. Στενά / Stena
58. Στενά / Stena
59. Στενά / Stena
60. Στενά / Stena
61. Στενά / Stena
62. Στενά / Stena
63. Στενά / Stena
64. Στενά / Stena
65. Στενά / Stena
66. Στενά / Stena
67. Στενά / Stena
68. Στενά / Stena
69. Στενά / Stena
70. Στενά / Stena
71. Στενά / Stena
72. Στενά / Stena
73. Στενά / Stena
74. Στενά / Stena
75. Στενά / Stena
76. Στενά / Stena
77. Στενά / Stena
78. Στενά / Stena
79. Στενά / Stena
80. Στενά / Stena
81. Στενά / Stena
82. Στενά / Stena
83. Στενά / Stena
84. Στενά / Stena
85. Στενά / Stena
86. Στενά / Stena
87. Στενά / Stena
88. Στενά / Stena
89. Στενά / Stena
90. Στενά / Stena
91. Στενά / Stena
92. Στενά / Stena
93. Στενά / Stena
94. Στενά / Stena
95. Στενά / Stena
96. Στενά / Stena
97. Στενά / Stena
98. Στενά / Stena
99. Στενά / Stena
100. Στενά / Stena

'★Esperanto' 카테고리의 다른 글

전체 포스트 보기

- 76일간 지중해 답사 지출 보고 / la raporto de la
elspezoj dum la vojaĝ.. (1) 2018.03.27.
- 지중해 답사(16) : 그리스(3)
에레트리아 · 마라톤 · 아테네 / la vojaĝo en.. 2018.03.27.
- 지중해 답사(15) - 그리스(3) 펠레폰네소스와
델포이 / la vojaĝo en Medi.. (1) 2018.03.18.
- 지중해 답사(13) - 에게 섬의 미노아문명 / raporto
pri la vojagho en Med.. 2018.03.12.
- 지중해 답사(12) 알렉산더 대왕의 고향
테살로니키 / la hejmloko de Aleks.. 2018.03.05.

◀ 이전 다음 ▶

▲ top



맑은나라 (sokoguryo)

보정 서길수

전 국제대/서경대 경제학과

[la vojaĝo en Mediteraneo – Eretria, Maraton, Athens en Grekio.](#)



















28

THE PARTHENON

AND ITS IMPACT IN MODERN TIMES



"MELISSA" PUBLISHING HOUSE











Beletraĵoj

Anekdotoj

Urbano

Afanti promenis sur strato portante sur la kapo turbanon grandan kiel korbo. Lin renkontis iu, kiu petis: "Sinjoro instruito, bonvolu helpi al mi legi ĉi tiun leteron."

Afanti respondis: "Mi ne konas eĉ unu literon kaj tial mi ne povas legi la leteron."

La petinto ege miris kaj plu demandis: "Sed vi havas tiel grandan turbanon! Ĉu vi vere ne povas legi leteron?"

Afanti malvolvis la turbanon de sia kapo, volvis ĝin ĉirkaŭ la kapo de la homo kaj respondis: "Bone! Bone!"

Se vi kredas, ke sub granda turbano kuŝas ĉioscio, vi mem provu, ĉu vi nun povas legi leteron." (el Rakontoj pri Afanti, Ĉina Esperantoeldonejo, Pekino 1982).

Bona solvo

Ŝahpur Sosani estis reĝo de Persio kaj vivis en la 4a jarcento. Kiam li estis ankoraŭ knabo, li aŭdis tage bruon ekster la kortego. Li demandis siajn korteganojn, kio okazas. Ili respondis: "Urbanoj pasas la ponton, kiu estas apud kortego. Ĉar la ponto estas tro mallarĝa, pasantoj inter si insultas, disputas kaj krias."

La juna reĝo tion pripensis kaj diris: "Kian konsilon vi povas doni al mi por forigi la malhelpon?" Unu el la korteganoj respondis: "Starigu ĉe la ponto soldatojn kaj ili reguligu la transiradon."

La konsilo ne plaĉis al la juna reĝo: "Iu el la pasantoj povus havi urĝan aferon kaj la deĵoranta soldato povus malhelpi lin, ke li ne atingus sian celon."

"Do, kio estas farota laŭ la opinio de Via Reĝa Moŝto?" demandis altranguloj kun respekta voĉo.

"Oni tuj ekkonstruu duan ponton: unu ponto servos al la pasantoj irantaj tien, la alia ponto por irantoj reen."

Tiel ordonis reĝo Ŝahpur Sosani kaj la kontenta urbanaro laŭdis lian saĝon.

El persa lingvo Bahman Ŝidani, Teheran, Irano..

(fonto: http://esperanto.wz.cz/Legolibreto_I.pdf)

- **Eseo**

Kio estas ja pli forta, ĉu la ideoj aŭ la perforto?

Kio estas supera, ĉu la spirito aŭ la forto? kio estas pli rezultodona, ĉu la libera elekto aŭ la altrudita devo?

Estas demandoj unuavide simplaj, tamen tre malfacilaj, ĉar certaj tiatemaj respondoj devas esti akompanataj de pruvoj. Estas pro tio, ke mi konsilas sin turnon al la Historio, kiu ekzakte tion oferas, pruvojn!

Antaŭ preskaŭ 2500 jaroj, la sola tre granda, preskaŭ tutmonda, potenco estis la persa imperio. Mi diras "tutmonda", ĉar la povo de la Persoj kovris la tutan tiam konatan Azion kaj la solan signifan parton de Afriko, Egiptujon. Ĉiuj iam fortaj nacioj de la tuta tiu senlima mondoparto estis submetigitaj, impostpagantaj subuloj de la plej potenca, nevenkebla monarkotirano, la reĝo

de Persujo, kiu tiam estis Dario (Δαρείος). Inter la gentoj submetigitaj al la persa tiranio estis la Ionianoj (Ιωνες), la Helenoj loĝantaj ĉe la okcidentaj marbordoj de Malgrandazio. Kiam la Ionianoj ribelis kontraŭ la tiranoj, petis la helpon de la granda helena urboŝtato Ateno (Αθήνα) kaj ankaŭ de la amika Eretrio (Ερέτρια), signifa urbo sur la helena insulo Eŭbeo (Εύβοια). Ambaŭ helenaj civitoj sendis helpon el ŝipoj kaj batalantoj, tamen, malgraŭ tio, la ribelo post nelonge estis sufokita. La persa reĝo,

Dario, uzante tion kiel pretekston, decidis militiri kontraŭ tiuj du helenaj urboj, por ilin puni. La vero estas ke li ne interesiĝis pri tia puno, sed li opiniis ke estis favora la tempo por ke li plenumu sian revon, konkeri Eŭropon (Ευρώπη), la solan kaj lastan parton de la mondo, kiu ne apartenis al li. La persa reĝo bone sciis, ke kontraŭ tiu lia ambicio sola baro estis Helenujo kaj la Helenoj. Ofte mi demandas min kiom da Eŭropanoj, da Amerikanoj, da tiuj homoj kiuj apartenas al la nuna okcidenta mondo, scias al kio ili ŝuldas sian altnivelan civilizacion, plejparte bazitan sur la principoj de la demokratio kaj de la spirita libereco. Miloj da paĝoj estis skribitaj de historiistoj de ĉiuj epokoj, tamen, mi kredas, ke nur malmultaj ordinaraj homoj scias, ke ĉia ĝisnuna atingo de la okcidenta civilizacio estas ŝuldata al la feliĉa finveno de tri tre malnovaj militbataloj. Fakte, trifoje, en Helenujo, en 490 a.K. en Maratono, en 480 a.K. en Salamis (Σαλαμίς) kaj en 479 a.K. en Plate (Πλαταιαί) okazis tre signifaj militkolizioj, en kiuj la decidigaj venkoj de la Helenoj preventis definitive la barbaran konkeron de Helenujo kaj sekve de la cetera Eŭropo. Tamen, por reveni al mia rakontado, mi diru, ke kiam Dario decidis entrepreni la unuan invadon, kolektis sian multenombrian armeon (90000 viroj) kaj ŝiparon (600 triremoj kaj nekonata nombro de transportŝipoj) en Cilicio (Κιλικία). La persa militistaro konsistis ne nur el Persoj, sed ankaŭ el dekoj da armeoj, devige senditaj de la multaj satrapioj, de la submetigitaj nacioj. La Helenoj, unu popolo kun komuna lingvo, religio, ĉefaj kutimoj, estis administracie dividitaj en multaj, sendependaj, diversgrandaj civitojŝtatoj.

Tiuj civitoj havis inter si rilatojn jen amikajn, jen neamikajn, ili havis kontraŭecojn, depostulojn, komunajn aŭ kontraŭajn profitojn, ili havis inter si kunlaboradojn, aliancojn, kontraŭecojn, konfliktojn, ĉion. Kelkfoje, solvon al la pli komplikaj problemoj donis la armiloj, aliffoje arbitraciantoj eĉ orakoloj de komunaj sanktejojdivenejoj.

Tamen ĉiuj civitoj respektis samnivele la prapatran komunan heredaĵon, la helenajn morojn, ili kune partoprenis, en paca, unueca etoso la tradiciajn, tuthelenajn religiajn, atletikajn, belartajn, komercajn k.a. aranĝojn, kaj plejofte, tute fervore unuiĝis por kune kontraŭstari al serioza barbara militatako. La du plej potencaj helenaj ŝtatoj estis Ateno kaj Sparto (Σπάρτη), la unua precipe finance kaj kulture forta, la dua armee nekonparebla, milite nevenkebla. La pli multaj el la ceteraj ŝtatoj estis ordinaraj sub la protekto de unu el tiuj du potencoj. En la helenaj armeoj ne estis profesiaj militistoj, ĉiu civitano, kiu povis porti kaj uzi la armilojn estis batalanto, ĉiam preta meti sin sub la militordonoj de la respondaj ĉefoj. Nu, la persa floto, trapasante la Egean Maron atingis, atakis kaj detruis kelkajn helenajn insulojn, fine ĝi atingis kaj detruis Eretrion kies loĝantoj ĝustatempe forlasis la urbon kaj rifuĝis sur la montoj. Post tio la granda floto atingis la lokon plej taŭgan por la elŝipiĝo de la multenombra armeo. Tiu loko estis Maratono, ĉemara vasta kampo, estanta sufiĉe proksime al la urbo, al Ateno, kiu estis facile alirebla tra larĝa vojo. La bataltereno estis plejparte ebena kaj taŭga por la movoj de la kavalerio. Krome, estis tie lago, kiu provizus la armeon per la abunda akvo kiun ĝi bezonis. La elŝipiĝo kaj la starigo de la grandega kampadejo daŭris longe. Dume, la Atenanoj kun armeo el 10000 viroj (laŭ kelkaj historiistoj nur 8000) ekiris ĝustatempe de Ateno kaj kampadis en distanco de nur kelkaj kilometroj malproksime de la malamikoj, en loko, kiu donis al ili la eblon malhelpi aliron de la malamikoj al flankaj montaj vojoj, kaj ĉian encirkligan manovron de la malamika kavalerio. En

la helena armeo, krom la Atenanoj estis ankaŭ batalantoj senditaj de Plateo, urbo aliancita kun Ateno. En la helenaj armeoj estis kelkaj viroj kun speciala kapablo kaj ekzerciteco, kiuj povis senhalte kuri dum tuta tago. Pro tio ili estis nomataj “tagkurantoj” (ημεροδρόμοι), alivorte ili estis heroldoj, tiuj kiuj transdonis urgajn anoncojn aŭ mesaĝojn. La plej kapabla tia heroldo, fama en la tuta Helenujo, estis la Atenano Fidipido (Φειδιππίδης), kiu, tiun fojon estis sendita al Sparto, por peti la helpon de la Spartanoj. Fidipido atingis Sparton (distanco de 222 kilometroj) post dutaga senhalta kurado kaj pro tiu nekredebla atingo li restis por ĉiam senmorta en la helena Historio. Malgraŭ tio, la Spartanoj, pro lokaj problemoj, ne povis ekiri tuje kaj pro tio ili atingis Atenon post la fino de la granda batalo. La Persoj, tute certaj pri sia supereco, ne faris fuortojn aŭ remparojn, ili ne fortikigis sian kampadejon, ili nur difinis la pozicion de ĉiu sia armeparto, kaj post longa preparado kaj ekzercado ili eskalonis siajn batalantojn en longa rekta linio kaj en densaj vicoj. La tagon de la kolizio, militestro de la Atenanoj estis la stratego Miltiado (Μιλτιάδης), kiu faris la finan planon. Malgraŭ tio, ke la Atenanoj estis tiom pli malmultaj ol la kontraŭuloj, Miltiado lokis ilin en same longa linio, fronte al la malamikoj. Pro sia malgranda numero ili ne povis esti lokitaj en same densaj vicoj, do, Miltiado lasis en la centro de la eskalono nur kelkajn vicojn de bone armitaj kaj spertaj batalantoj kaj densigis la vicojn en la du ekstretoj. La Atenanoj ekiris la unuaj kaj marŝis rapide por ne lasi la kontraŭulojn malproksimiĝi de la marbordo. La plejmulto de la persaj kaj ceteraj barbaraj militistoj ne estis al kutimiĝintaj al miksbatalo. Ili portis mallongajn diversformajn pikbatalilojn, ponardojn kaj lancojn kaj mallongajn ledajn ŝildojn. Do, en miksbatalo kontraŭ la longaj kaj pezaj glavoj kaj lancoj de la Atenanoj ili ne povis longe kontraŭstari. Ilia granda atuto estis la arkistaro, tamen iliaj sagoj ne povis trapiki la longajn ferajn ŝildojn, la kirasojn kaj kaskojn de la Atenanoj. Tute male, la atenaj arkistoj kaŭzis grandan damaĝon al la persa kavalerio, kiu ne povis ludi signifan rolon en la batalo. Malgraŭ tio ĉi, la centro de la persa eskalono, alfrontante tre malmultajn kontraŭulojn, superis kaj iompostiome forpuŝadis ilin. La Atenanoj, en la centro, kiel eble plej malrapide kaj laŭorde retiriĝis, kaj tio estis antaŭvidita de Miltiado, kiu estis doninta la decajn ordonojn, laŭ kiuj, kiel longe la centro retiriĝis, la fortaj ekstretoj, batalante ŝtorme, forte puŝis la kontraŭulojn al la direkto de ilia antaŭeniranta centro, kaj tiel, iompostiome la Persoj estis ĉirkaŭitaj. Kiam la barbaroj, kiuj ne posedis remparitan kampadejon, komprenis ke la vojo al la direkto de la maro, al la ŝipoj, estis blokita, klopodadis ne plu batali, sed forkuri kaj sub la forta premo, la neelteneblaj atakoj de la Atenanoj, kiuj ne plu retiriĝis sed senindulge batadis ilin de ĉiuj flankoj, klopodadis senorde foriri, savi sian vivon. Estas kompreneble ke sekvis vera masakro, post kiu restis sur la batalkampo 6400 mortintaj barbaroj kaj 192 Helenoj. La ceteraj Persoj sukcesis enŝipiĝi kaj foriri. Mi devojiĝis al priskribo de la batalo kaj tio ne estis mia unua celo. Mi deziris unue montri kiu estis la unua fojo ke Helenujo kaj sekve Eŭropo evitis la barbaran konkeron. Mi celis ankaŭ ekspliki la fakton ke nur malmulta homoj povis tute venki tiom multenombrian armeon. Pri tio mi povas tute simple diri, ke sur la unu flanko staris homoj kies tasko estis rabi, konkeri, detrui, sklavigi, dum sur la alia flanko estis homoj kies devo estis la protektado de la patrujo, de la libereco, de la civilizacio. Por efektiviĝi taskon humilan, neniu pretas perdi sian vivon, male, por plenumi devon noblan, oni volonte oferas sian vivon. Tio estas principo fundamenta por ĉiuj liberpensaj homoj. Por definitive lasi tiun batalon en Maratono, mi diru ankaŭ, ke kiam iĝis evidente ke la venko estas certa, la strategoj ordonis kurieron, tagkuranton, kuri rapide al la urbo por anonci al la civitanoj la ĝojigan informon. Ne estas certe kiu heroldo ricevis la honorigan ordonon, ĉar la historiistoj ne konsentas je tio, unu parolas pri tiu Fidipido, alia pri iu Eŭkliso (Ευκλής). Ne gravas kiu estis, gravas tio, ke tiu viro, tuj post la longa batalo, portante, pro prava fiereco, sian tutan armilaron, kuris senhalte al

Ateno (distanco de 40 kilometroj), anoncis al la kunvenintaj civitanoj la venkon, kaj venkita de la lacegiĝo, tuj poste, falis kaj mortis.

Tiu okazaĵo restas viva en la tutmonda historio, ankaŭ ĉar du noblaj viroj, la Franco Pierre de Coubertin, patro de la modernaj Olimpiaj Ludoj kaj lia samideano kaj ĉefa kunlaboranto, la Heleno Dimitrios Vikelas, havis la brilan ideon meti inter la ceteraj sportkonkursoj de la unuaj Olimpikaj Ludoj de 1896 la maratonon, kuradon samdistancon kun tiu kiun trakuris la antikva kuriero. Mi ŝatas multe la atletismon, ĉiajn sportkonkursojn, tamen, mi aparte ĝuas, sidante antaŭ la televidilo, la penigan batalon de la admirindaj junuloj kaj junulinoj el la tuta mondo, kiuj partoprenas tiun kuradon. Mi ne serĉas pri la ĉampionoj, ne interesas min kiu estas la unua, kiu la lasta, mi admiras kaj benas ĉiujn, ĉar, kvankam ili ne scias tion, ilia heroa klopodo estas sankte simbola, Fakte, tiuj admirindaj junaj homoj ne estas atletoj, ili estas la kurieroj, kiuj kuras por disanonci al la mondo, ke la bono venkas la malbonon, ke la lumo ĉiam venkas la obskuro!

Verkis: **Spiros Sarafian**, el Grekujo

- Rakonto

Li malsatiĝis. Depost tagmezo li nek trinkis, nek manĝis. Liaj gekolegoj dum la labortempo konstante manĝis kaj manĝis.

Junaĝe ankaŭ li povis manĝi kiam ajn. Iam kun sia amiko li manĝis ĉetable preskaŭ tutan porkidon de la orelo ĝis la vosto. Ĝi estis bonega amuzo. Ili ĝuis la vivon.

Sed jam tiuj tempoj forflugis. Li mildiĝis. Ĉio mildiĝis ĉirkaŭ li. Jes, ankoraŭ li amas sian edzinon. Vere la fajro de l' amo ne flagras tiel intense kiel antaŭ du jardekoj.

Sed la virino restis por li aminda. Li mensogus, se ne estus turniĝinta al belulino. Malsana estas viro, kiu ne faras tion. Tiaj uloj ne plaĉas al virinoj. Ĉiu scias tion.

Ĝi ne estas kokro. La instinkto ordonas. Fari ion kontraŭ ĝi estas vana. La sango, la vivinstinkto superas ĉion. Tion ankaŭ lia edzino scias kaj ŝi ne koleras pro tio.

En la malproksimo hundo ekbojis.

Ankaŭ li havis hundon. Sed neatendite ĝi mortis. Ofte la perdo de nia ŝatata besto estas pli amara ol travivi la morton de nia proksimulo. Interese. Ĉu ne? La hundobojado silentiĝis. Denove iĝis profunda silento. Nur la griloj ĉirpis. Junaĝe li tre ŝatis aŭskulti la ĉirpadon. Ĝi trankviligis lin. Somervespere li kuŝis en la lito kaj la fenestro estis malfermita. En la florgardeno griloj dormigis lin per ĉirpado.

Li devus ekiri hejmen – li pensis, sed tiom bonege li fartis tie ĉi. La rivero estis lia amiko. Ĝi ĉiam finaŭskultis liajn plendojn. Ofte li aŭdis ankaŭ la respondojn de la akvogutoj, kiel ili konsolis lin.

Li ekstaris kaj mallaŭte adiaŭis de la rivero: Ĝis kara rivero! Mi devas iri. Eble morgaŭ mi denove vizitos vin. Mi estas jam laca, treege laca. Forpasis la junaj jaroj. Viaj kirladoj ĉiam estas karaj por mi. Do ĝis! Malrapide li ekiris. Kelkajn minutojn ankoraŭ li promenis sur la digo kaj revante li rigardis la riveron. Li estis tre laca. Ĉiuj paŝoj dolorigis lin.

Tamen ne la korpa doloro estis la plej terura, sed ege mordadis lian koron la anima. Ĝi povas kadukigi la tutan homon.

Morgaŭ alia tago komenciĝos kaj li devos ripozi, ripozi, kaj ripozi ĉar li hodiaŭ ege laciĝis.

verkis

Apáti Kovács Béla, el Hungario

(fonto: **Vesperto #213 februaro**)

- Ilir Zhiti

Poeziaĵoj



Ĉu mi estis sonĝo?

*Ĉu mi estis sonĝo,
aŭ Dio vidis sonĝon,
kio estis ja
mia vivo!?*

Tirana, januare 2015

Nur momenteto

*Nur momenteto,
nur momenteto,
limigas nenion,
disde miraklo.*

*Nur momenteto,
nur momenteto,
donas nin abismon,*

aŭ feliĉecon.

Nur momenteto,

nur momenteto,

dividas iluzion,

disde la vero.

Nur momenteto,

nur momenteto,

disigas morton,

disde la vivo.

Nur momenteto,

nur momenteto,

dividas militon,

disde la paco.

Nur momenteton,

nur momenteton,

distancas perdo,

disde la profito.

Nur momenteto,

*nur momenteto,
dividas sukceson,
disde simpla revo.*

*Nur momenteto,
nur momenteto,
estos ni pro
momenteto viktimo
Tirana, julie, 2017*

Braveco ne estas

*Ne estas braveco militi por
forkapti tion kio ne vin apartenas,
Ne estas braveco, puni malfortulon,
por simple havigi bonojn al si mem.*

*Ne estas braveco la frenezeco,
kiu mortigan spiriton flambruligas,
braveco ja estas nur amo,
ankaŭ al iuajn seninterese.*

*Braveco ne estas devigi,
iun ekami vin pro bezono,
braveco estas resti en ties koroj,
eĉ se tion ili ne buŝesprimas.*

*Braveco estas ne lasi foriri,
tiun kiu amis vin tutkore,
ke pentu ne sentu timon,
pro tio perdita iutage.*

*Braveco estas ke vi ĝisfine,
ne forlasu bonajn amikojn,
eĉ kiam vi pensas ke nenie troviĝas,
amikeco ne forviŝita de vivo.*

*Braveco estas malfortulon vi defendu,
alie estus frenezeco, ne braveco,
ekde miloj da jaroj de monda ekzisto,
vi erare komprenas sencon de vorto.*

*Braveco ne estas fariĝi diktatoro,
kaj al popolo imponi vi sklavecon,
Braveco estas labori ĉiuhore,
por alporti al homoj feliĉecon.*

Plaĝo, Durrës, 11-an e aŭgusto, 2017

Dum beletra lecionhoro

Profesori al studentoj diras:

-Hodiaŭ la temo estos

Deveno kaj signifo

de la vorto "homeca"

Kaj de plej bona studento

doni respondon li postulas

kaj ĉi tiu ne malfruas

respondon tuj proponi:

-Tio de vorto homo venas

La vera signifo estas

*Neniam malbonojn faru
dumvive krimojn ne faru.*

*Lin amo motivigas
por libero li batalas
ke malriĉeco ne ekzistu
ke homoj dignecon havu.*

*Li disdonas ien ajn
elkoran bonecon
por ke paco enmonde regu
kaj egaleco same estu*

*-Bravu!,-
profesoro lin aldiras
kaj kiel ĉiam
Markon dek vi meritas*

*Poste sian rigardon profesoro
ĵetas al plej inteligenta studento
sed samtempe plej ribelema,
kaj lian opinion demandas.*

*Kvankam do li
dum momento silentis*

respondon ne malfruigis

- de vorto homo

devenon ĝi havas

sed signifo kion ni donas

vera, tamen, ĝi ne estas

Diru min ĉu

estis krimo aŭ fiago

kiu ne estas plenumita

de la estaĵo homo?!

Ĉu ekzistas en naturo

alia vivaĵo

kiu masive mortigas

siajn similulojn

kaj neniam penton esprimis?!

Ĉiam li orgojlas pro tio

kiom multe da homoj mortiĝis

veraj homoj

sed alietnecaj..

Ĉu oni povas kompari

mortojn pro militoj

*kun tiuj pro malsanoj
aŭ dum akcidentoj?*

*Ĉu ekzistas pli granda hipokriteco
ol nomi homeca,
bona, nobla estaĵon
alportanta nur teroron!*

*Signifon kiun ni donas al tiu
per vorto "malhomeca" li meritas
alie iu ajn
grave eraras*

*Surprizite profesoro
fulme alrigardis lin
pensante ke ankaŭ li
saman opinion dividis.
Tirana, 19/08/2017*

Tutmonda narcisismo

*Ni vivas en mondo kie ĉiuj
enamiĝas al sia ekstera aspekto
kia koloro estas ties okulo kaj vizaĝo
kaj ĉu ili estas fascinaj?!*

*Ni konas nian aspekton je ĉiu detalo
laŭ ties formo kaj koloro
Ĉu ni aspektas pli aĝa aŭ pli juna
Demandu pri tio laciĝintajn spegulojn.*

*Ni konas ĉiun falton de vizaĝo,
ni sentas doloron pro perditaj haroj,
pro ĉiu ŝanĝo tutan nokton ni ne dormas
tio vivon nian igas malfeliĉa.*

*Kiom da mono elspeziĝas, kiu scias
por iu ajn kremo aŭ kosmetikaĵo,
por operacioj neniuj ŝparas
de vizaĝpartoj aŭ plasta mammo.*

*Spiritaj malbelaĵoj apenaŭ okulfrapas
tiel niajn malbonojn ni kovras,
profunde ĉe ni ili sin kaŝas
kaj nur por eksteraĵoj ni pensas.*

*Ni ege zorgas pri nia aspekto,
Ĉion ni havas en nia memoro,
pri nia interna mondo ni nenion faras,
fakte ni lasis tion perdita.*

Tirana, 30-an de aŭgusto 2017

Feliĉaj ni estis nur tiam

Neniam forgesos ni, kara mia,

kiam freneze ni enamiĝis

kaj por akiri feliĉecon

ĉiutage ni kunrevadis

*Kio travivite neniam forgesitos
Sed kial kvazaŭ tranĉilo nian koron ĝi tuŝas
kaj ni ne scias ĉu memoraĵo tio estas
aŭ profunda doloro kiu multe bruligas.*

*Sed ĉu tio plu valoras
kiam malfrue ni komprenis
Feliĉaj ni estis nur tiam
kiam freneze enamiĝis.*

Plug-Lushnjë, aŭguste 1986

Mi kaj soleco

*Ofte mi sentiĝas pli socia
je ĉeesto de mia soleco*

*Kaj mi invitas min drinki
eĉ unu glason kune
tiel foriĝas maltrankviloj
pro soleco ĉe ceteraj homoj.*

*Nun ambaŭ ni ne plu solecas
neniu rompas nian socion.
kaj en ĉi tiu ripozmomenteto
ni havas ŝancon babili pri multo
kion ni ne povis dividi
je socio de aliuloj.*

Tirana, 3.10.2017

Rideto

Kiom facile rideti estas

Malfermeti buŝon sufiĉas

Vangostoj suprenmovas

viaj okuloj radiobrilas

energio el koro fontas

kiom facile rideti estas

Rideto- plej bela rozo

de ĉiuj amoj

rideto- produktita de boneco

rideto- patrina amo

rideto- patra feliĉeco

rideto- nur kora donaco

rideto- plej bela rozo

de ĉiuj amoj

Ĝin donacante pli riĉaj ni fariĝas

Sed kial do ni tiel rare tion faras

Kial tiel kare tion ni vendas?!

Ni turnis ĝin simple al varo

En kiu maro do dronis la rideto

Tiu varma donanta nur bonecon?!

Kial ĝin anstataŭas malpura grimaco

Kiam ni ĝin fordonas pli riĉaj fariĝas.

Aŭ kiel varo dum vendo kaj aĉeto

por servilismo ĝi uziĝas

Ĉu turniĝis al lupo-intereso?!

pli ofte ĝi uziĝas por mokado, ironio

plurestas forgesita povra amo

*Se rideton, tiun belan, noblan
la homaro forgesos
tiam ni povas diri sentime
definitive animala mondo venkos.*

Tirana, 07.10.2017

Senkapigo

*Spektante makabrecan scenon kie soldato de ISIS senkapigas, sen ia ajn konsciriproĉo,
malfeliĉulon, mi verkis la sekvantajn versojn.*

*Senkapigi homon
tutsimpla kaj facila estas
kun la ruliĝanta kapon
sangumita lastfoje
ruliĝas ankaŭ mem Planedo
je sangoplenta formo
de kruele hakita kapo.*

*En momenteto kiam homo senkapiĝas
homo kiel mi kaj vi
la oceanaj ondoj inundi endas
ĉiun teran parton
je ululado pro doloroj.*

*Kun la hakita kapo
jam mortis ankaŭ Universo ene de li
mortis ja vivomemoro, perdiĝis
ĉiuj multaj vizaĝoj
konataj dum lia vivo,*

*plue ĉiuj lernitaj scioj
kaj tiuj hereditaj dum miljaroj
perdiĝis amoj, revoj, deziroj
kontinueco fontanta ekde pli fora pratempo
sed nun ĉiuj interrompitaj...*

*Li estis vera homo kiel ĉiuj
kaj ceteruloj estis ja similaj al li
Sen vivo de individuoj
eĉ Universo perdas sian signifon*

*Ili estas ja ĝia memoro
Kiam homo senkapiĝas
tio tutsamas kvazaŭ mortigis
ĉiuj kiuj bonŝancis naskiĝi en ĉi tiu Mondo.*

*Por kiu ajn ido de detruo
Ĉi ago tutsimplas kaj facilas
Eble ankaŭ Dio mem
sentas sin malkvieta
ke sia "ĉefverko"
kruele sin mem
estas detruante.*

Tirana, 17.10.2017

EPITAFO

*Ni skulptas ĉiuvivmomente
literon de nia epitafo
kaj ceteruloj nur ilin metas
ĉe nia kapo poreterne*

Tirana, 3-an de majo 2017

EGOISMO

*Pli multe ni volas
amojn kiuj neniam realiĝis
urbon kie neniam ni povis iri
librojn kaj poeziojn kiujn ni ne komprenis komplete
tiuj plurestis pli longe en nia memoro,*

*ofte ni amas pli multe diktatoron
kiu turnas nian vivon al penado
kaj justulojn kaj idealistojn
ni vidas dubeme en iliaj celoj*

*Ni adoras tiujn kiuj nian amikecon ne akceptas
ofte ni virinon neglektas
kiu fidele restas apud ni
ni frenezas pro sciencoj kaj scioj
kiujn neniam ni asimilis
enamiĝinte ni estas freneze
al nia egoismo nekorektebla*

Tirana, 31.10.2017

Vojaĝo per vespera trajno

*Skuiĝas ni pro trajna balancado
kaj sentiĝas vespera spirado
dum oni rigardas en senfinaj agrokampoj
kiel laboras ankoraŭ virinoj.*

*Pro ilia peza laboro
mem naturo ofendiĝas
pro ilia vizaĝo nostalgias
eĉ la forlasita spegulo.*

*Ke ili bezonas ripozu
Ĉu oni forgesis
ke inoj krom laboro bezonu
iom da tempo por sin beligi.*

*Enhavante virinan penon
eĉ plej bela pejzaĝo enmonde
perdas sian brilon, ĉiun valoron
kaj vana iĝas tio sence.*

*Aŭdi ĉirkaŭen ie ajn
kia tristeco kaj humilo en vivo estas
ke pezan laboron en agrikulturo
Ja virinoj kaj virbovoj faras.*

*Longajn paroladojn kompilas
la regantoj en la ĉefurbo
pri emancipiĝo kaj virinoj
dum iliaj edzinoj en vera lukso vivas!*

Lushnjë, julie 1985

Ĉu ekzistas civilizo enmonde?!

*Mia filo, studento pri historio
iutage tute desaponta
demandis min: Ĉu vere ekzistas
civilizeco en nia mondo?!
Vidante ke prave oni fieras
pro verkoj kiuj ege nin ravigas
piramidoj, gigantaj konstruaĵoj
ligantaj marajn bordojn pontoj.*

*Mirindaj longaj tuneloj,
konstruitaj sub la marakvoj,
transpasantaj iun ajn imagecpovon
kiam ligas kontinentan randon.*

*Kiom sennombraj civilizoj
praaj, eksterordinaraj
laŭ paso de tempo jam enterigitaj
sekvataj de pli postaj.*

*En la historiaj lernolibroj
senfine laŭdoj, estas faritaj himnoj
ĉar pereis aliaj civilizoj
ĉar oni fieras ke mortiĝis milionoj,*

*Ĉiam ni restas ravitaj
pro statuoj de la pratempo
pro atingita perfekteco
plej alta indiko de genieco.*

*Kia indiferenteco pri originaloj
de ĉi tiuj ordinaraj statuoj
ŝajnas nin tute kutima
kiam oni sklavigas aŭ murdas.*

*Oni ne parolas pri civilizo
kiam Dia kreitaĵo ne valoras
konstruu senfine mirindaĵojn
sed neniam ekzistos civilizo.*

Tirana , 28.11.2017

**“ Junulino- Universo” el Ĉamerio
dedikita al H.**

Kiam mi vidas frenezan sonĝon
ĉu vere freneza mi estas?
kiam en majesta palaco
subite en alo min trovas?!

Kiom belaj la muzikaj sonoj
ĉirkaŭan etoson ili ekbruligas
ĉiujara konkurso tie okazas
pri Junulino- Universo.

Mi sonĝis ene de sonĝo
tio min vere kapskuis
vidante preterpasante
plej belajn knabinojn de mondo

Angle konkursgvidanto parolas
lia voĉo eĥadas
Junulinon de Universo li proklamas
"Junulino Ĉameria" ja meritas

Mirinda knabino vere ŝi estas
pli ol vera ĉefverko
sed muzikon mi ne komprenas
ĉu gaja aŭ funebra tio estas?!

Kiam ĉaman belulinon li invitas
por surmeti ŝin kronon de reĝino
la alo kaj mondo antaŭ ekrano
antaŭ tiu diino stuporas

Kiuj estas nomoj de viaj gepatroj?
Kiuj estas tiuj bonŝancaj gepatroj?
Mi ne scias belulino respondas
ĉar ili apenaŭ naskiĝi ...povas

Nur la nomon de avo, avino mi scias
Kiam ĉiu ĉamo kun ili buĉiĝis
iliajn nomojn vi povas trovi
en longaj listoj de Killogjer 1)

Antaŭ la mondaj ekranoj
Homoj kortremiĝas

kiel eblas oni naskiĝi
el gepatroj jam mortintaj?!

Ho, tio realo ne estas
sed nur imagebla eblo
por ke vere alvenu en vivo
oni ne devus ekzekuti gepatrojn.

Ankaŭ ĉiuj aliaj junulinoj
el la tuta nia globo
povus naskiĝi nur
se oni ne murdus ties gepatrojn.

Jen, vidu Junulinon Kosovo, ŝiaj gepatroj
mortiĝis antaŭ ol ŝi naskiĝu
kiel junulino el Palestino
kaj ceteraj landoj en Oriento.

Kia junulina ĉarmo el Afganio
kia beleco ankaŭ ĉi tiu junulino
de eblaj gepatroj el Kurdio
gepatroj de ĉi tiu feino mortiĝis de ISIS0

Vekiĝinte de freneza sonĝo
apenaŭ konsciiĝinta
klarvide mi komprenis
ke freneza mi ne estis.

Freneza estas ja ĉi mondo
kiu nur vorte estas homeca
mortiganta kaj etnopuriganta
revenon en patran kamenon ne permesanta.

Tirana, 26.11.2017

Noto: Ĉamerio estas regiono loĝata de albanoj aŭtoktonaj, pli frue ol alveno de grekoj en Balkanio. En la jaro 1913 tiu regiono aneksiĝis de Grekio. Grekoj mortigis, buĉis milojn da ĉamoj kaj forpelis milojn aliajn disde iliaj teroj kaj ne permesas al ties posteuloj reveni en la patraj hejmoj.

1) Klllogjer: Loko kie oni starigis memorigilon dedikita al viktimoj de greka genocido.

Ĉirkaŭbrako de infanoj

Tiu ĉirkaŭbrako de ambaŭ flankoj
malforta kaj fragila

havas energion ne akireblan
danke al neniŭ nutraĵo.

Danke al neniŭ vitamino
ĝi ricevas amon kaj ĝojon
kiel de tiu ĉirkaŭbrako.

Ĉu ne estas vivofonto
ĝuste en tiu ĉirkaŭbrako
de ambaŭ flankoj
malforta kaj fragila?!

Eĉ mem teruro timas
pro tiu ĉirkaŭbrako
kvazaŭ diablo pro incenso.

Eĉ stratan katon
ĉi tiu ĉirkaŭbrako
turnas al tigro.

Ho, ĉi tiu ĉirkaŭbrako
kiel la reĝo Midas
iun ajn tuŝitan objekton
turnis al oro.
turnas eĉ plej ordinaran virinon
al sankta patrino
kaj plej ordinaran viron
al patro je reĝa aspekto.

Tristo, ĉagreno, streso
trovas neanstataŭeblan medikamenton
en tiu ĉirkaŭbrako
kaj igas ilin strata pulvoro
kiun vento forĵetas tre foren.

Sen tiu ĉirkaŭbrako
Mondo apartenus nur al lupoj.

Tirana , 2.12.2017

Senco de vivo

Oni diris ke ĉe iu ajn vizaĝo
virina estas iom da Heleno
Iu ajn virina vizaĝo
donas sencon al vira vivo.

Ĉiu vira vizaĝo
donas feliĉon al virina vivo
Ĉiu infano, frukto
de ilia amo
donas sencon kaj feliĉon
al ambaŭ kune..

Tirana, 22.12.2017

Mia biblioteko

En la multaj libroj
de mia biblioteko
miloj da homaj sortoj
kvazaŭ dormadas
sur lito inter vicoj.

Roluloj, kvazaŭ en infana fabelo
estas jam ŝtonigitaj
per magia bastono de sorĉistino.
Nur trafoliumante
mi ilin vekus
por viva rekomenco.
Ho, kiom multe da libroj mi posedas
kaj nur malmulte da tempo ĉe mi restas.
Tamen mi certas
Ke en plimulto de libroj
apenaŭ mi vekigos
ties ŝtonigitajn rolulojn.

Mi rigardas amece
tiujn indiferentulojn
kiuj preskaŭ min forgesis.
Sufokas nostalgio
Min, homon
kiu karajn proksimulojn

neniam plu renkontos.

Ŝovas ni tagojn per iluzio
ke ni posedas la librojn.
Dume ili tute kvietaj
atendas novaj amojn
por sin vek
de longa dormeto

Ĉar ni estas pli provizoraj
ol niaj libroj mem.

Tirana, 28.12.2017

Alia paradizo ne ekzistas

Mi estis pripensante
tion kion ĉiuj homoj
fakte rememoras ofte:
Ĉu ekzistas paradizo?

Aŭ tio estas imageca rezulto
naskita de nia eterna deziro,
por ke ne finiĝu ĉi tiu laciga vivo
plenplena je senfina malkvieto
entombigita en du kvadrataj metroj.

Transpasinte ondan maron da zorgoj
Tra multaj hatoj kaj amoj
Tra forlasoj kaj indiferentecoj,
Fare de niaj karaj kaj proksimaj homoj.

Ĉe fino de la vojaĝo
Ni komprenas gravan kozon:
Nenia paradizo ekzistas

Ĉio estas ja iluzio

Rezulto de deziro kaj imageco

Kreaĵo kvazaŭ en infanaj fabeloj

Ekzistas en nia vivo nur reala paradizo

Kio ofte similas al infero.

"La tempo kiam oni amis kaj ni amis vere
niajn karajn kaj proksimajn homojn.."

Tirana, 27.2.2018

Portreto de la patrino

Ekstere jam neĝis
Mateno viglas nur hodiaŭ.
Mi frontas al korŝira portreto de patrino
Mentone min apogas sur la manplato.

Per tristaj okuloj ŝi alrirdas min kompare
Ho kion ajn mi fordonus
Por ke mi vidu tiun karecan geston
Ke ĝi okazu realece..

Tirana, 1-an de marto 2018

Akeoj

Maurico Druon, sekretario de la Franca Akademio diris:

Albanoj apartenas al popoloj pli malnovaj ol mem historio. Praavoj de albanoj partoprenis en la Milito de Trojo, gviditaj de Akilo, unuflanke kaj Hektoro, aliflanke.

Pelazga brava raso
iradis vi al milito
kvazaŭ al nuptofesto
rajde sur rapida ĉevalo,

Aventuroj kaj luktoj
Estis parto de vivo via
samkiel samrasaj gentoj,
estis ankaŭ trojanoj

Bravaj kaj fieraj dardanoj,
tiel pensadas greka historiisto
adore kaj malĝoje
ili estis barbaroj simple.

Enamiĝinte al historio
kaj gloro de lia lando.
diris al si, ho se ili estus
kiel oni diris, vere grekoj

Konvinkita ke neniu inventaĵo
povas resti kaŝita porĉiam

Tirana, 28.03.2016

Mi enŝatus en monaĥon

Mi komencis laboron en agrokampo,
punita de tiutempa ŝtato
Ho, povra mia "biografio"
Mi estis ja forgesita "malamikoj".

Sovaĝa, blinda diktaturo,
Grave eraris en nia kazo,
ĉar alia "raso" kvazaŭ ni estas,
tial edukiĝo por ni malpermesas.

Oni maldungis min de mia oficeja posteno
Ankaŭ supera lernejo pardonon fermis
Nin, senkulpajn, oni persekutis
ĉar kelkaj ministroj "perfidis".

La unuajn tagojn en agrokampo
Al mi ege teruraj vere ŝajnis
kvankam mi estis juna knabo
kiel maljunulo fakte enpensadis.
Kabano aspektis kiel prizono
laciga estis pejzaĝo, kia enuo!
Mi eĉ monaĥon envidus,
kiu soleca de mondo restus.

Kiam laboristojn mi ekkonis
de proksime kiaj ili ja aspektis
ho, tiam mi eklernis
ke ili veraj homoj estis

Kaj konis mi knabinon tie
kiu pensis ne kiel ŝtato mem
min malamikon ŝi ne konsideris
sed kiel reĝo al ŝi mi aspektis

Iun tagon en agrokampo laborante
Komenciĝis pluvo senĉese
Ni devus tuj forkuri
saviĝon en kabano trovi.

Unu apud la alia, tiel proksime
Algluis ni plenajn lipojn
Kie foriris miaj malkvietoj do?!
Nun ili ŝajnis tute vanaj.

Ŝia korpo- novbranĉeto kvazaŭ birdo tremis
Kune algluitaj tion mi klare sentis...
Kaj koro, do, kial ĝi eksaltis

Kvazaŭ en Paradizon ĝi descendis?!

Ebriigan aromon de via korpo,
porĉiame mi tenos en mia animo
neniu loko ekzistas kiel tiu kabano
nek plej bela en Dubai palaco.

Vi iĝis por mi ia bordo
kie mi malŝarĝis ĉiujn enuaĵojn
vi iĝis tiu rokego
kie mi rompis miajn necertecojn.

Vi fariĝis kvazaŭ maro somere
kien mi pasigis bonŝancajn tagojn
Ho, neniam oni devas kapitulacii
Eĉ kiam reĝo kaptiĝas per ŝah-mato.

Neniu diktaturo en la mondo
apenaŭ povas forpreni spiritan liberon
ĉiamfoje troveblas pordo
eĉ kiam vi plonĝas en infera cirklo.

Plug,Lushnjë , 1985

Interparolo kun patro pri paco enmonde

-Ĉu eblas paco en la Mondo
kiam militoj kaj murdoj neniam finiĝas
kiam klopodoj por haltigi ilin vanas,

kiam paco estas provizora
kaj militoj senfine daŭras?!

- Malfacile, sed ne maleblas
Paradokso estas ke ni ĉiam esti feliĉaj volas
sed ni alies feliĉon rompi deziras,
ĉiuj por paco daŭre preĝas
kaj preta por milito armeon ni havas..
Kiam ni kokinon buĉas
pluraj el ni sin malbone sentas
Je miro, pro murdoj en idiotaj militoj ni orgojlas
kaj same per plezuro spirito nia ebriiĝas

Kiel estu paco en ĉi tiu Mondo
kiam ni preĝas al komuna Dio
en kirko, moskeo, turbedo, sinagogo?!

Mirinde kial tiel frenezaj ni estas..

Ununura preĝejo ja sufiĉus, ĉar Dio estas unu
ke homoj enpace estu porĉiam,
ĉar paco en Mondo neniam ekzistos
antaŭ ol religioj reconciliĝos
sen reconciliĝo de Islamo kun Kristanismo
kaj religioj kun Scienco por la tuta homaro.

Kiel povus esti paco en Mondo
kiam ie ajn en la lernolibroj de historio
oni instruas infanojn orgojli
pro grandaj psikopataj murdistoj
kiuj mortigis multajn homojn de aliaj popoloj?

Kial ĉiuj haste postulas
igi sian Grandan Aleksandron
Napoleonon, Ĝingis Khanon kaj Atilon?!
(du unuaj originas el mia lando)
kiam ili estis simple mortaj geniuloj
kaj mortigis kaj perdis milionojn da homoj
kaj nur dezertiĝon alportis al mondo?!

Ĉu ne estus pli prava
por plej grandaj mondaj historiistoj
ke ili kompilu por ĉiuj ŝtatoj komunan lernolibron
kie oni kondamnu krimojn de la pasinto
kaj unuafoje infanoj eklernu vorton paco?!
Aŭ eterne daŭrigu kun ĉi tiu paradokso?!

Tirana, 12.09.2016

Mi sentas solecon de Tero

Ho solecon de Tero mi sentas
En ties orbito poreternas
Vivi sen Suno, Luno ĝi ne povas.

Ankaŭ nian solecon mi sentas
Vivi sen proksimuloj ni ne povas
Tamen daŭre samtiel en soleco
Ni rondiras ĉirkaŭ nia orbito.

Tirana, Marto 2015

Estas io

Estas io kion neniam mi amis,
sed ne povas foriĝi de ĝi
io kiu ĉiam apudrestis
kaj eĉ paŝon ne disiĝis
ankaŭ kiam mi haltis
nek kiam mi irkuris.

Plej intima estas tio
sed ne mia amatino
ankaŭ kiam mi vekigis
kaj kiam mi endormigis.

Ie ajn kie mi troviĝas
ĝi min kiel ombro postsekvas
Pli insistema ĝi ja estas
ol mem mia ombro
kio ja ombrigas
nur pro efiko de lumo.

Tiu ombro estiĝas
eĉ en profunda mallumo
tiel mi en ties ombro turniĝas
Redonas mi per fidelo
Neniam min ĝi perfidos
Kaj ĝis la tombo postsekvos.

Estas io kion neniam mi amis

sed foriĝi de tio mi ne povis..

(ENUO)

Tirana, 2016

Fantomo de Patro Kristo Negovani

Mi neniam vin forgesis
Tial fantomon mi ree venis
Albanio, benita Patrio
Ĉe vi restas mia menso.

Kiam grekoj per tranĉilo min buĉis
Por ke nia benita lingvo ne disvastiĝu
Ili kriegis kaj miaj okuloj malheliĝis:
Aŭdinte ke "Albana ja malbenita estu"

Dum sango kiel rivero elverŝiĝis
Oni denove tranĉilon ĉe min enigis
Albana vorto ege ilin rabiigis
Tutan tempon greke ili parolis.

Mi kriegis ree pro la vundoj,
Albane mi parolis kaj ululis
Kaj mia voĉo pli kaj pli reduktiĝis
Pro turmentoj de vandaloj el Grekio.

Dum mia animo eksteren eliris
Kaj tempon por aldiri ilin mi ne havis

Ke neniam sen albanoj ekzistus
kaj Grekio tiel multe enmonde konatus

Mi pacon en Paradizo ne trovas
Kiam religiajn ritojn oni kantas
En la lingvo de miaj buĉistoj
Kaj samtempe albanlingvo neniigistoj.

Tirana, 11.08.2016

Noto: Patro Kristo Negovani, albana ortodoksa pastro, kiun grekoj mortbuĉis ĉar li deziris disvastigi la albanan lingvon en la sudajn regionojn de Albanio, restinta post la granda dispecigo de albanaj teritorioj en la jaro 1913

Eterna enigmo

Eterna kaj ne enigmo dismetita
Tiel diina kaj ankaŭ tiel malĉasta

Bela ci, kiel plenaroma floro
Sed ankaŭ malbela, sen formo.

Ci ja konstruas vivodomon
sed ankaŭ faligas ties ŝtonon

Ci estas feliĉo kaj ĝojo
sed ankaŭ malĝojo, detruo.

Mi portas pacon, kvieton,
sed ankaŭ militon, malkvieton

Ci estas honoro kaj revo
Sed ankaŭ honto kaj infero

Ci estas kuracilo por ĉiu vundo
Sed ankaŭ ci brogas kiel veneno

Ci estas plibeliganta la vivon anĝelo
Sed ankaŭ impertinenta diablo

Ho, ci estas miraklo de ĉi tiu mondo
sed ankaŭ plej granda malbono

Ne ekzistas pli fascina ol ci mem floro
Sed ankaŭ ĝermata harbruliga urtiko

Ci estas ja ebriiga parfumo
Sed ankaŭ plej malpura sterko

Ci estas pli intima amiko
Sed ankaŭ plej fia malamiko

Ci estas plej profunda amo
Sed ankaŭ plej nigra malamo

Ci estas plej fatala sekreto
Kaj samtempe ĉiutaga banalaĵo

Ci estas dorlotanta karesado
Kaj plej pereiga turmentado

Ci estas freŝiga venteto de aprilo
Kaj samtempe blovego de spirito

Ci estas plej alta adorado

Kaj plej maldigna humilado

Ci estas pura montara akvofonto
Kaj samtempe senmova marĉa ŝlimejo

Ci estas ja Dia benito

Kaj same trifoje malbenito

Neniu allogas min ol cia muziko
Kaj ci estas ekskoria de lado bruo

Ci estas sanktulino kiu dresas eĉ bestion

Sed ankaŭ plej ordinaran prostituinon

Nur ĉe vi brilas kiel oro la virto
Sed ankaŭ kroĉanta koron malvirto

Kara, respektita kiel ĉiu reĝino

Sed ankaŭ al la vivo servutulino

Kiu estaĵo donas varmon kiel ci
Sed ĉu malvarmon kaj froston portas ci?!

Nenio kiel ci nian animon skuas

Kaj nenio kiel ci nin enuigas

Kiel alie estus, ĉar edzan Genon ci heredis?!
Ĉar Dio, virino, cin el ties ripo ja kreis.

Lushnjë, oktobro 1985

Ĝojo de militista gvidanto

La gvidanto aspektis tute kiel ŝtono
Rigardante batalon en sekura loko

Severa luktado kie vivoj vetiĝas
Gvidanto surĉevale al neniuj buŝparolas

Maltrankvila, laca, senagema li sentiĝas
Dum morto murdas, buĉas kaj libere promenas
Vesperiĝas. Trumpetoj militfinon anoncas
Kaj armeoj en siajn tendarojn revenas.

Sur la batalkampo miloj da mortigitoj kuŝas
Estas tio loko kie homa vivo malkare vendiĝas
Mortigitoj estas jam poreterne kvietaj
Vunditoj ĝemas, ili sin sentas forgesitaj

Gvidanto kunvenigas sian stabon en la tendego
Pro multaj perdoj stabanoj sentiĝas en funebro
Orgojlita gvidanto diras: Mi ĝoja ja sentiĝis
Batalo okazis ĝuste kiel mi tion antaŭvidis

Mi pensis ke mortigitoj estus multe pli

Sed ne, entute estis nur tridekmiloj da ili

Tirana, 29.08.2016

Mesaĝo de Kristo, Muhamedo...

Mi ne scias ĉu mi en sonĝo
aŭ vere, de kelkiu pado
malfermita en la ĉielo
kvazaŭ ia diina beno
sur la luma vindaĵo
alportanta spiritan kvieton
du anĝeloj navigantaj

kvazaŭ venis en ĉi mondon

frenezan kaj misuzitan

pro impertinentoj, por savi ĝin.

Kvankam jam vesperiĝis
kaj kozoĝoj en ombro degelis
el supro, kiel lumoj venis
per magia inspiro ĝi varmigiĝis
tiun lacan pejzaĝon
pro anksio kaj fiero.

Jen, antaŭ mi du anĝeloj..
De kie tiu inspiro venis
en vespera aero kaj digestis
ĉi tiun reton da kruelaĵoj, humilaĵoj
en la mondo kun mizeroj, difektoj?!

Ambaŭ, vere tiel ĉarmaj
Kvazaŭ mi delonge ilin konis
Unu kun densaj haroj (longaj)
bela, ĉarma, kiel Kristo
alia kun kurtaj haroj, bela
Kiu do Li estis?!

Frato, Muhamedo- longharulo diris
per tristaj okuloj, lumplenaj
- komuna maltrankvilo, denove
en nian mondon nin venigis

kiu neniam trankvilon trovis

- Frato Kristo- aliulo diris

(kompreneble profeto Muhamedo estis

Maltrankvilo sur bela vizaĝo)

- Niaj nomoj, tiel multe

estas ja misuzitaj

En nia malsana mondo!

- Ĝuste, per ambaŭ niaj nomoj

du plej grandaj religioj

estas jam fonditaj.

Tion neniu el ni

de siaj adorantoj ne postulis.

- Prave, ni Dio ne estis

Ĉe homoj ni alportis

Nur ties sanktan vorton

kaj nuk tion ni kondukis.

- Ĉu ni mem ne naskiĝis

kiel miliardoj da aliaj

en certa tempo?!

Dio estas unu, tutegala por ĉiuj

en tempo kaj spaco, ne limigita

-Finu do trouzado!

Sub niaj nomoj

okazis krucvojiroj

per propagando kaj pompo

mortiĝis miliardoj

pro intereso de fortuloj
sango elverŝiĝis kun abundo.
landojn oni okupadis
Kaj sciulojn fajrbruligis
teruraj genocidoj okazis
Kaj kulturoj jam pereis
Pro falsaj konfesioj

Homaro do havu
Ununuran religion
Tiun de fido al Dio
kun ties diina mesaĝo:
homon en mondo mi kreis
ĉiu naskito, sanktulo estis!

Niaj spiritoj ne trovos
pacon kaj kvieton
ĝiskiam ĉe la homoj
ne ekzistu bonkomprenemo.

Kun Biblio kaj Kurano
brakĉebrake kiel frato
kiu scias al kiu ĉielo
ili kune forflugas
postlasinte ĉi mesaĝon
por ĉi tiu perturbita mondo.

Tirana, 18.10.2015

Kial mi estis tristita, tion ne scias

Kial ĉimatene mi estas tristita, tion ne scias
Kiel ĉiutage burĝoniĝon de floroj mi rigardas
Kio kvazaŭ per magia animo en la vazoj okazas
tie sur la fenestra kornico de la ĉambro
tie en Tirana, en mia propra domo
sed mi fakte dolorige konsciiĝas

ke la malfermitaj floroj ne estas
ĝuste samaj al tiuj
kiujn mi floriĝante vidis
jam en pli fruaj tagoj.

Tirana, 09.04.2016

Portreto de mia maljuniĝinta patro

Pala, oldiĝinta vizaĝo
En faltoj

spuroj de vivo

malhela kaj etĝoja

Kuŝanta

sur la ordinara divano

mi rigardas ties blindajn okulojn

senlumajn

kie ja estas nun tiu reflekso

je saĝeco kaj rara humoro?!

Senagema

sian korpon li movas

per la elĉerpitaj manoj

sian enuan vizaĝon tuŝas

kaj densajn harbuklojn

ekdubas ke lin ankaŭ ili forlasas

en ĉi tiu soleca fino

En la sefo de sia cerbo

estas enŝlosita sperto de riĉa vivo

spirita kaj morala

malfeliĉe la homo

en sia lasta dormo

al neniu ŝlosilon enmanigas

Nek al edzino, nek al infano

En niaj febraj manoj

nur kelkaj memoraĵoj plurestas

ankaŭ ili doni vane klopodas

plenan kaj skuigan imaĝon

de homo sen revenvojo.

Lushnjë, aprilo 1986

- **Marie-Anne jouanique**

21:43 (18 hours ago)

Esperanto- nia kurĉevalo

(Rakonteto de Sean)

Ni havas fieran purrasan kurĉevalon idealan por internacia komunikado (Esperanto). Tamen iuj ekstreme riĉaj kaj potencaj homoj produktas azenojn (... angla). Ili estas tiel riĉaj kaj potencaj, ke ili cerbolavis la tutan mondon, kredigis, ke iliaj azenoj estas la plej rapidaj kvarpieduloj kaj ke la kurĉevalo ne ekzistas, ke eĉ se ĝi ekzistus, ĝi ne kapablos kuri ! La azenposedantoj faras grandegajn profitojn vendante azenojn. Ili kredigis al multaj homoj en ĉiuj landoj, ke « ĉiu devus posedi azenon ». Tiu situacio alportas astronomie altajn profitojn al ili, tial por ili gravas kaŝi la veron. Ajna normala persono, kiu objektive ekzamenas la situacion, povas vidi, ke la kurĉevalo ekzistas, estas kvaroble pli rapida ol la azeno kaj fakte kosta multe malpli ol la multekosta azeno. Sed la propagando de la azenposedantoj iĝis ekde 1945 tiel potenca kaj ĉien penetranta, ke homoj ne volas aŭdi la vorton « kurĉevalo », ili ĉiuj ŝparas por posedi propran azenon ! Multaj jam investis en azenojn kaj timas, ke la kurĉevalo iam estos serioze konsiderata... En Esperanto ekzistas bela proverbo: « Se la homaro subite malstultiĝus ! »